- 1929 **Lingva Komitato** (Sekcio: “Komuna Vortaro”). Kvara Aldono al U.V. 118 vortoj kaj la prefikso mis/ En: Oficiala Bulteno de la Esperantista Akademio. Paris: Esperantista Centra Librejo, 1929. 24 p. — 2 vol. pr. Centra Presejo Esperantista V. Polgar, Paris. 23x15 cm. Aldonaj vortoj oficialigitaj de Lingva Komitato. Siglo: **OA 4**.
 vol. 1: Esperanto → franca, angla, germana.
 vol. 2: Esperanto → hispana, itala, pola
- 1934 **Esperantista Lingva Komitato**. Kvina Oficiala Aldono al la Universala Vortaro (Junio 1934). 8 kapvortoj. En: The British Esperantist. v XXIV n-ro 353 p. 340. London: The British Esperanto Association (Inc.), 1934. — 22 x 14 cm. Ok pliaj vortoj oficialigitaj de la Lingva Komitato. Inkl. de difinoj en Esperanto. Siglo: **OA 5**.
 Esperanto → angla
- 1935 **Lingva Komitato** (Sekcio: “Komuna Vortaro”). Oficialigitaj Vortoj En: Jarlibro de la Lingva Komitato kaj de ĝia Akademio. Paris: Esperantista Centra Librejo, **1935**. p. 38-40 (de entute 40 p.). — pr. Centra Presejo Esperantista J. Polgar, Paris. 16x12 cm. Kvina kaj Sesa Aldonoj al Universala Vortaro [**OA 5**, **OA 6**]. 29 vortoj, nome 8 kaj 21 vortoj.
2a eld. En: Jarlibro de la Lingva Komitato, **1936**.
 Esperanto → angla, franca, germana, hispana, itala, pola
- 1935 **Esperantista Lingva Komitato**. Sesa Oficiala Aldono. En: The British Esperantist. vol. XXX n-ro 362 p. 107. London: The British Esperanto Association, Inc., 1935. — 25 x 17 cm. 21 pliaj vortoj oficialigitaj de la Lingva Komitato en 1935, inkl. de difinoj en Esperanto. Siglo: **OA 6**.
 Esperanto → angla
- 1937 **Grenkamp**, S[alo, t.e. Salomon **Kornfeld**] (1896-1943) [W]. Oficiala vortaro

- de Esperanto. Paris: S. Grenkamp, 1937. 249, [8] p. — pr. Girault, Saint-Cloud. 14 x 11 cm. Poŝformata vortareto kun 4.398 kapvortoj, ĉefe tiuepoke oficialaj plus kelkaj neoficialaj, klarigitaj per koncizaj, plej parte neoficialaj difinoj. Spec.:
- paco** **1** Stato de ŝtato, kiu ne militas kontraŭ alia ŝtato. **2** Stato inter personoj, nacioj, popoloj, ĉe kiuj forestas malakordo, malamikemo. **3** (f) Ripozo; trankvileco de l'animo.
- pacienco** **1** Virto, dank' al kiu oni eltenas trankvile la malbonon. **2** Kvalito de iu, kiu atendas trankvile iun aŭ ion malfruiĝantan. **3** Persisto.
- paciento** (*med.*) Malsanulo, kiu submetiĝas al kuracado.
- 1938 **Isbrucker**, J.R.G. (1889-1967) [W]; **Bailey**, William (1866-1946) [W]. Difinoj de vortelementoj. Publika propono. En: "Heroldo de Esperanto" n-roj 9 (965) - 11 (967) kaj 24 (1029) - 29 (1034). Scheveningen, "Heroldo de Esperanto", 1938 kaj 1939. Difinoj en Esperanto de oficialaj radikoj el "Universala Vortaro" kaj la unuaj ses "Oficialaj Aldonoj al la Universala Vortaro" (nur radikoj komenciĝantaj per litero A, pli ne aperinta).
- 1954 **Butler**, M[ontagu] C[hristie] (1884-1970) [W]. Fifth and Sixth Oficialaj Aldonoj al la Universala Vortaro. 30 kapvortoj. En: The British Esperantist. n-roj 591/592. p. 72. London: The British Esperanto Association, 1954. — 22 x 14 p. Sigloj: **OA 5**, **OA 6**. Enhavo nun en Pabst 2013 (vd. malsupre en tiu ĉapitro).
Esperanto → angla
- 1958 Akademia Sekcio pri la Ĝenerala Vortaro. Sepa oficiala aldono al la Universala vortaro. s.l., Akademio de Esperanto, 1958. 4 p. — 21 x 15 cm. 159 radikoj. Siglo: **OA 7**. Enhavo nun en Pabst 2013.
- 1975 **Ockey**, Edward [Philip] (1913-2006) [W]. Fundamenta vortaro-radikaro. Banstead: Edward Ockey, 1975. [127] p. — 30 x 21 cm. ĉ. 2.750 kapvortoj kaj radikoj.
2a eld. 1980. [3], 47 p. — 30 x 21 cm. Indeksita listo de ĉiuj vortoj kaj radikoj en la Fundamento de Esperanto.
- 1975 **Albault**, André (red.). Baza Radikaro Oficiala. En: Aktoj de la Akademio II. 1968-1974. Rotterdam: UEA [Universala Esperanto-Asocio]; Paris: S.A.T, s.j. [1975]. p. 28-54. — pr. The Blackburn Times Press, Blackburn. 23 x 15 cm. Siglo **BRO**. Indiko de jaro laŭ la dato de la antaŭparolo 1975-06-03. 2.460 kapvortoj ordigitaj laŭ naŭ oftec-klasoj.
2a rev. eld. [1978]. Baza vortlisto rekomendita de Akademio de Esperanto. Konsultebila kiel datumbazo en la retejo de la Akademio. Rec.:
— **2014:** Pabst, Bernhard. Berlina Komentario pri la Fundamento de Esperanto. Vol. I, 2a eld. Berlino Sept. 2014, p. 281-286: Kvankam publikigita en la „oficiala“ parto de la „Aktoj“, tamen „privata“, do ne „deviga“ verko en la senco de la Fundamento.
- 1975 Akademio de Esperanto (Sekcio pri la Ĝenerala Vortaro). Oka Oficiala Aldono al la Universala Vortaro. En: Aktoj de la Akademio II 1968-1974, p. 13-27. Oficiala bulteno de la Akademio de Esperanto n-ro 10. Rotterdam: U[niversala] E[speranto-]A[socio], 1976, 79 p. — pr. The Blackburn Times Press, Blackburn. 23x15 cm. Siglo **OA 8**.
Esperanto → angla, franca, germana, hispana, itala, portugala
- 1978 **Ockey**, Edward [Philip] (1913-2006) [W]. Akademia vortaro-radikaro. Banstead: Edward Ockey, 1978. [1], 50, [4] p. — 30 x 21 cm. Indeksita listo de ĉiuj vortoj kaj radikoj rekomenditaj en Oficialaj aldonoj al Universala vortaro. ĉ. 2.020 kapvortoj.
- 2008 **Kück**, Andreas (1963-). Oficialaj lingvoelementoj de Esperanto. Rechtenfleth: Aŭtoro. [Feb.] 2008, 54 p. — A4. ISBN 978-3-00-023800-0. Siglo: **OLEO**. Unupaĝa listo de sep amendoj (ĉefe tajperaroj kaj formalajoj) de 2008-05-18

(pdf). Uzas h-anstataŭigon (ch, gh k.t.p. anstataŭ ĉ, ĝ k.t.p.). Rete konsultebla (pdf). La plej fidinda registro de la lingvo-elementoj enestantaj en Oficiala Aldono 1 (1909) ĝis OA 7 (1958), kun la difinoj kaj tradukoj, tamen sen la rusaj, kaj indikoj de bibliotekoj, konservantaj la originalajn dokumentojn. La informoj plejparte eniris Pabst 2013.

2a [kor.] eld. s.l. CreateSpace Independent Publishing Platform [Dec.] **2014**. 96 p. — 20x13 cm. ISBN 978-1505530926. Enhave senŝanĝa, sed kun kelkaj korektoj kaj forme pli profesia. *Spec.*

2a [kor.] eld. kiel e-libro (**Kindle**) [Dec.] **2014**. 96 p.

2013 **Pabst**, Bernhard (1960-) [W]. Berlina Komentario pri la Vortaro Oficiala. Berlino: Aŭtoro [Dec.] **2013**, 342 p. — 30 cm, A4. Siglo: **BK**. Rete konsultebla (pdf, 2,5 mb). Daŭrigita sub la nova titolo „Berlina Komentario pri la Fundamento de Esperanto“.

Unua Parto - Antaŭparolo, Gramatiko kaj Ekzercaro. — Siglo **BK I**.

1a eld Berlino: Aŭtoro [Marto] **2014**.

2a plil. eld. Berlino: Aŭtoro [Septembro] **2014**. 304 p. — A4. pdf. Stato 2014-09-28.

3a plil. eld. Berlino: Esperanto-Akademio [Aprilo] **2015**. — A4, pdf. Stato 2015-04.

Dua Parto - Vortaro Oficiala. — Siglo **BK II**.

1a eld. Berlino: Aŭtoro [Dec.] **2013**. 342 p. — Sub la malnova titolo, vd. supre.

2a plil. eld Berlino: Aŭtoro [Marto] **2014**. — A4. pdf.

3a plil. eld. Berlino: Aŭtoro [Junio] **2014**. — A4. pdf.

4a plil. eld. Berlino: Aŭtoro [Septembro] **2014**. 365 p. — A4. pdf. Stato 2014-09-28.

5a plil. eld. Berlino: Esperanto-Akademio [Aprilo] **2015**. — A4. pdf. Stato 2015-04.

BK I temas pri ĝeneralaj demandoj de la Fundamento, ĝia Antaŭparolo, Gramatiko kaj Ekzercaro. Tiu Unua Parto komentas aspektojn, kiuj transiras la sferon de unuopaj vortoj.

BK II precize notas ĉiujn ĉ. 5000 oficialajn vortelementojn el Fundamento kaj Oficialaj Aldonoj, tiel kiel ili estas troveblaj en la oficialaj dokumentoj kaj klarigas ilin per etimologiaj indikoj, Lingvaj Respondoj de Zamenhof, referencoj k.t.p. *Spec.*

Binokl' {legu: binokl' } [OA 3.2] {en} binocle, double eyeglass, opera-glass | {fr} jumelle {legu: plurale: jumelles} (de théâtre, etc.) | {de} Binocle {2012: ark.}, Opernglass {legu: Opernglas} | {es} gemelos de teatro | {pt} binoculo {legu: binóculo} | {it} binocolo | {pl} - -- {traduko mankas}. — [EG 1] Opernglas, Binocle.

blank' - blanc | white | weiss {legu: weiß} | бѣлый | biały. — **blanka** - blanc | white | weiss {legu: weiß} | бѣлый | biały [FE 10]. — [UL]. — *pli blank'a ol neĝ'o* — plus blanc que neige | whiter than snow | weißer als Schnee. | бѣлѣ снѣга | bielszy od śniegu. [FG 3]. — Papero estas blanka [FE 10.1]. Blanka papero kuŝas sur la tablo [FE 10.2]. La blanka papero jam ne kuŝas sur la tablo [FE 10.3]. La papero estas tre blanka, sed la neĝo estas pli blanka [FE 10.14].

Ambaŭ partoj senkoste elŝuteblaj kiel pdf de

www.esperanto-konsultejo.info/bk.htm kaj <http://esperanto-akademio.wikispaces.com/eniro>.

2.2 Tradukoj de la Universala Vortaro

Armena

- 1912 **Zamenhof**, L.L. Universala vortaro de la lingvo internacia Esperanto. Eldono armena. Paris: Hachette, 1912. 51 p. — pr. Ahmed Ihsan. 19 x 13 cm.
Esperanto → armena

Bulgara

- 1910 **Oreškov**, G[eorgi] (1864-) [W]; **Atanasov**, G[eorgi] (1881-1960) [W]; **Zamenhof**, L.L. k.a. Fundamenta universala vortaro de la lingvo internacia Esperanto (Bulgara eldono). Osnoven universalen reĉnik na mezduardniya ezik Esperanto. Sofia: S.M. Stojkov, 1910. [4], 96 p. — 16x11 cm. ĉ. 2.630 radikoj.
Esperanto → franca, angla, germana, rusa, pola, bulgara

Ĉeĥa

- 1909 **Kühnl**, Eduard (1884-1966) [W]. Universala Vortaro. En: Fundamento de Esperanto, Eldono Bohema. 2.631 radikoj. Paris: Hachette & Cie, 1909 / Praha: F. Topic, 1909. xi, 92 p. — 17x11 cm.
Esperanto → ĉeĥa

Ĉina

- 1930 **Lǐ Luò** [t.e. **Li Lok**]. Universala Vortaro. En: Fundamento de Esperanto (Gramatiko, Ekzercaro, Universala Vortaro) - Shìjièyǔ zhī jīchǔ. Guǎngzhōu (Canton): Guǎngzhōu shìlì Shìjièyǔ shīfān jiǎngí suǒ (Kantona Esperanto-Instituto), 1930. vi, 104 p.
Esperanto → ĉina

Greka

- 1907 **Kuluri**, Konstantino. Universala Vortaro de la Lingvo internacia “Esperanto”. En: Fundamento de Esperanto, Eldono Greka. Paris: Hachette, 1907. XI, 105, [6] p. — pr. Imprimerie Lahure, Paris. 17x11 cm. 2.631 radikoj.
Esperanto → greka

Hispana

- 1907 **Inglada [Ors]**, Vicente (1879-1949) [W]. Universala Vortaro de la Lingvo Internacia “Esperanto”. En: Fundamento de Esperanto. Paris: Hachette, 1907. — 2.631 radikoj
2a eld. 1913. XI, 92 p. — 17x11 cm.
Esperanto → hispana

Hungara

- 1909 **Lengyel** Paul, de (trad.) (1868-1932) [W]. Universala Vortaro de la Lingvo internacia “Esperanto”. Az Esperanto Nemzetközi Nyelv Egyetemes Szótára. En: Fundamento de Esperanto, Eldono Hungara (Az Esperanto Alapkönyve). p. 51-95. Paris: Hachette / Budapest: Kókai Lajos Könyvkereskedése, 1909. xi, 95, [5] p. — pr. Imp. Paul Brodard, Coulommiers. 17x11 cm. 2.631 radikoj.
Esperanto → hungara
- 2006 **Horvath** J[oszef] (1949-) [W]. Fundamento de Esperanto, Eldono Hungara. Antwerpen: FEL [Flandra Esperanto-Ligo] 2006. 142 p. — 21 cm. ISBN 9077066241. Foto. Nova traduko.
Esperanto → hungara

Itala

- 1907 **Junck**, Rosa [trad.] (1850-1929) [W]. *Universala Vortaro*. En: *Fundamento de Esperanto*, eldono itala. Paris: Hachette, 1907. ix, 94 p. — 17x11 cm. BIL 2689. 2.631 radikoj. — Rec.
Giambene, Luigi. En: *Roma Esperantisto*. 1908, p. 99: „pli ol 100 malĝustaĵoj“ (cit. laŭ BIL 2689). Junck devene estis ĉeĥino, edziniĝinta al germano kaj post ties morto translokiĝinta al la itala Lazura Bordo. Ŝi ne sufiĉe bone parolis la italan por senpeke plenumi la tradukon, kiu pro tio estas multloke malĝusta.
2a eld. Milano: Avanti, **1922**. 179 p. —
Esperanto → itala
- 2008 **Fabretto**, Lilia; **Quartieron**, Daniela [trad.]. *Fundamento de Esperanto*. Itala Eldono. Venafro: EVA 2008, 68 p. — 20 cm = A5 broŝ. ISBN 9788896028070. Foto. Nova traduko de la *Fundamento*; sen la *Universala Vortaro*.

Japana

- 1933 **Ishiguro** Yoshi H. [trad.] (1898-?) [W]. *Universala vortaro de la lingvo internacia Esperanto*. En: *Fundamento de Esperanto*. Gramatiko, Ekzercaro, *Universala Vortaro*. Tokio: Hakubunkwan, 1933. 352 p. — IEMW. 2.629 radikoj.
Esperanto → japana

Nederlanda

- 1922 **Schoofs**, Frans (trad.) (1888-1934) [W]. *Universala Vortaro de la Lingvo internacia “Esperanto”*. En: *Fundamento de Esperanto*, Eldono Flandra-Holanda (*Fundament van Esperanto*). Antwerpen: Belga Esperanto Instituto / 's Gravenhage: Centra Esperanto Librejo / Paris: Esperantista Centra Librejo, 1922. 112, [12] p. — pr. Paul Brodard, Coulommiers. 17x11 cm. Foto. IEMW. 2.631 radikoj
2a rev. eld. **1929**. Paris : Esperantista Centra Librejo. **1929**, 112 p. — IEMW.
3a rev. eld. **1938**.
Esperanto → nederlanda
- 2005 **Desmet**, P[etro, t.e. Pierre de Smedt] (trad.) (1934-) [W]. *Universala vortaro*. En: *Fundamento de Esperanto*. Eldono Nederlanda. Antverpeno: Flandra Esperanto-Ligo 2005, 136 p. — 21 cm. ISBN 9077066195. Nova traduko.
Esperanto → nederlanda

Pola (brajla)

- 1932 **Rytenberg**, Eugenjus (1906-1997) [W] (trad.). *Uniwersalny Słownik*. *Universala Vortaro*. En: *Podstawy Języka Międzynarodowego Esperanto* (*Fundamento de Internacia Lingvo Esperanto*). Warszawa: Wydawnictwo Państwowego Instytutu Gluchoniemych i Ociemniałych (Ŝtata Blindul-Instituto), 1932. 48 p. — 33x26 cm. En brajlo. ĉ. 2.630 radikoj.
Esperanto → pola

Portugala (Brazila)

- 2013 **Braga**, Ismael **Gomes** (trad.) (1891-1969) [W]; **Ribeiro**, Hamilton **Leite** (trad.). *O Fundamento do Esperanto em Língua Portuguesa*. *Fundamento de Esperanto Portugallingve*.
Versio 2.0 de 2013-02. 106 p. — Nur rete konsultebla. Nur Antaŭparolo (trad. de Ribero), Gramatiko kaj Ekzercaro (ambaŭ trad. de Braga), sen UV. La Gramatiko en Esperanto laŭ la versio el PAG, la oficialaj kvin referenc-

lingvoj mankas. La portugala laŭ la ortografia reformo de 1990. Spec. (FG 5):
Patro kaj frato. - Um pai e um irmão.
Leono estas besto. - Um leão é um animal.
patro = pai.
-o = terminação do substantivo no singular.
kaj = a conjunção "e, mais".
frato = irmão.
leono = leão.
esti = ser, estar.

Esperanto → portugala

- 2015 **Flores**, Túlio (trad.). Fundamento de Esperanto. O Fundamento do Esperanto. Brazila Eldono. Braziljo: Brasila Esperanto Ligo [BEL] 2015. 384 p. — 20,5 cm. Foto. ISBN 978-85-88913-14-1. La originalo de 1905 (Antaŭparolo, Gramatiko, Ekzercaro kaj UV) kun traduko al la portugala.
Esperanto → portugala

Slovaka

- 1907 **Ŝkarvan**, A[lbert] (1869-1926) [W] (trad.); **Evstifejev**, N[ikolaj] P. [W] (eld.). Fundamento de Esperanto. Eldono Slovaka. Turčianský Svätý Martin, 1907. — La unua libro slovaklingva pri Esperanto.
2a eld. Chicigo (Usono): Rovnosti Ĝudo, **1918**. 128 p.
Faks. repr. Partizánske: Espero. **2007**. — 18 cm. ISBN 9788096953363.
Esperanto → slovakaj

Sveda

- 1897 **Nylén**, Paul (1870-1958) [W] (trad.). Esperantisk-svensk ordbok efter D:r L. Zamenhofs "Universala Vortaro". Uppsala, Uppsala Esperantoförening, [1897]. 68 p. — pr. Uppsala Nya Tidnings Aktiebol[ag] Tr., Uppsala. 18x13 cm. Rete konsulteblo. 2.629 radikoj.
Esperanto → sveda

Rumana

- 1908 **R[obin]**, G[abriel] (1869-1911) [W]; **M[itranj]**, D. Universala Vortaro de la Lingvo internacia "Esperanto". En: Fundamento de Esperanto, Eldono Rumana. Paris: Hachette, 1908. IX, 92, [1] p. — pr. Paul Brodard, Coulommiers. 17x11 cm. 2.631 radikoj.
Esperanto → rumana

Turka

- 1910 **Regno**, Ajdina [pseŭd. de J. Guéron] [trad.]. Universala Vortaro. En: Fundamento de Esperanto, Eldono Franca-Turka, Dua Parto. Paris: Hachette, 1910. 126 p. — pr. Ahmed Ihsan et Cie, [Aidin]. 18x12 cm. 2.631 radikoj.
Esperanto → franca, turka

2. Difinvortaroj - Definitionswörterbücher - Difining Dictionaries

Inkluzivas kolektojn de *multfakaj* teknikaj kaj sciencaj vortoj. Terminaroj de unuopaj fakoj vd. en Parto 3 Terminaroj. Inkluzivas ankaŭ vortarojn de kombineblaj vortoj, sinonimoj k.t.p.

- 1905 **Berthelot**, Paul (1881-1910) [W]. Vortareto Esperanto-Esperanta. En: Revuo Esperanto 1905, n-roj 2-3, 6-8, 10-12 – A ĝis debito, pli ne aperis. — La unua difin-vortaro de Esperanto, „unua provo de vortaro pure internacia“;

- ĝi restis torso pro malsano de Berthelot.
Skanaĵo rete konsultebla ĉe IEMW. Spec.:
anĝelo kreaĵo nur spirita. (teol.)
anĝino malsano de gorgĝaj membranoj.
animo parto spirita de l'mio l vorto esprimanta kune kaŭzon de sentado, komprenado kaj volado.
anizo veg. (*anisum*)
ankaŭ prep. ; same = vi kredas tion, mi ~; li ne venis, mi ~ ne; ne nur .. , sed ~ l samtempe = li estas bela, sed ~ malbona l eĉ =mi tion kredos ~ se vi neos; tio igas lin ~ pli kulpa.
- 1907 **Vérax**, Ch[arles] (1873-1943) [W]. *Vocabulaire technique et technologique Français-Esperanto*. Paris: Hachette, 1907. x, 130 p. — pr. Paul Brodard, Coulommiers. 21x15 cm. Siglo **VTT**. Alidirekta parulo = Vérax 1910. — Spec.:
Pachyderme dikhaŭtulo, * pakidermo.
Pagaie pagajo; PAGAYER pagaji, pagajremi.
Pagination paĝnumerado,
Palan (techn., mar.) * takelo.
— Rec.:
— **2011**: Bernardo. Verax, nia plej grava terminaro fru-epoka. En: Ipernity (2011-07-09). Kun foto de libro kaj aŭtoro.
— **2011**: Bernardo. Nia plej enigma hundo: laniario. En: Ipernity (2011-07-06): Detalstudo pri unuopa vortara artikolo „**Mâtin** (zool.) * laniario (*canis laniarius*).“
Franca → Esperanto
- 1908 **Coppet**, Henri de [W]. *Leksikono*. En: Frazaro. p. 95-102. Paris: Hachette & Cie, 1908. 102, [4] p. — 18 x 12 cm. 987 kapvortoj.
- 1909 **Boirac**, Emile (1851-1917) [W]. *Plena Vortaro Esperanto-Esperanta kaj Esperanto-Franca*. Dijon: Presejo Darantière, 1909 kaj 1910. 2 vol. vol. 1 **A-K**; vol. 2 **L-Z**
Supl. Paris: Hachette, [1910]. xxii, 430 p. — 25x17 cm. Inkl. de koncizaj difinoj en Esperanto kaj tradukoj al la franca. Rec.: Vikipedio.
- 1910 **Kabe** [pseŭd. de Kazimierz **Bein**] (1872-1959) [W]. *Vortaro de Esperanto*. Paris: Hachette & Cie **1910**, [4], 175, [9] p. — pr. Paul Brodard, Coulommiers. 21 x 15 cm. Esperanto: Kolekto de la Revuo. ĉ. 5.000 kapvortoj. Rec.:
— **1910**: Bourlet, Carlo. *Esperantaj Vortaroj*. Vortaro de Esperanto verkita de Kabe Paris. Enciklopedia Vortareto Esperanta verkita de Verax Paris. En: Antaŭen Esperantistoj! Lima, Peruo 1910:7:7 (85), p. 111-112.
— Pliaj recenzoj vd. en la komentoj al la 6a eld. 2013.
2a eld. Paris: Hachette & Cie **1911**. — Tiu kaj ĉiuj postaj eld. senŝanĝaj repr.
3a eld. Paris: Esperantista Centra Librejo, **1922**.
4a eld. Paris: Esperantista Centra Librejo, **1925**.
Brajla eld. Esperanto-Blindulligo de Germanujo, **1926** — pr. Esperanto-Ligilo, Stockholm.
Repr. de la eld. 1922 Seoul **1977**.
Repr. Peking: Ĉina Esperanto-Eldonejo, **1984**. 175 p. — 22 x ? cm.
5a enhance neŝanĝita eld. Berlino: Bernhard Pabst, **2013**. 208 p. — A4. Skanita, per tekstrekona programo prilaborita kaj komentita versio en nova grafika formato. Rete konsultebla (pdf, 1,5 Mb). Kun enkonduko de Bernhard Pabst (1960-) [W].
- 1910 **Vérax**, Ch[arles] (1873-1943) [W]. *Enciklopedia vortareto Esperanta*. Paris: Hachette, 1910. xx, 249 p. pr. Paul Brodard, Coulommiers. — 21x15 cm. Foto. Multifakaj terminoj kun difinoj en Esperanto kaj aldonaj tradukoj al la franca. Okazaj indikoj de la origino de vorto (ekz. M. = proponita aŭ reviziita

de Gaston Moch). Sen franca indekso. Kvar aldonoj: 1. Sciencaj afiksoj. 2. Kelkaj el la internaciaj simboloj kaj abreviacioj uzataj en sciencoj. 3. Nomaro de la geologiaj epokoj kaj etaĝoj. 4. Internaciaj atompezoj kaj simboloj fiksitaj de la Internacia Komitato en 1909. Reviziita kaj kompletigita inversigo de VTT = Verax 1907. Kun ĝia parulo la plej grava kaj influa ĝenerala terminaro multfaka de la epoko antaŭ 1914. Daŭris ĝis STT 1956 por atingi ion kompareblan, eĉ se ne tiel ampleksan. Multaj terminoj antaŭe prezentitaj en Internacia Scienca Revuo kaj aliaj sciencaj periodaĵoj tiuepokaj. ĉ. 8.600 terminoj. Spec. (komenco de lit. P):

Pac'agado, *pacigérance*, konservado, dum milito de la pacaj interesoj tuŝantaj la militantojn aŭ la neŭtrulojn (M.).

Paciencio (Bot.) *patience*, *oseille-épinard*, (*Rumex patientia*), sp. de Rumekso.

Paciento (Med.) *patient*, tiu, kiu suferas malsanon.

Paĉulo = **paĉolo** (Bot. *patchouli*, planto tre aromata, g. de Lamiacoj.

Padelo (Tekn.) *palett (de roue à aubes)*, ĉe hidraŭlika maŝino, tabuleto, sur kiu efikas la akvo. [...]

Esperanto → franca

1929 **Cseh**, Andreo (1895-1979) [W]; **Morariu**, Tiberio (1901-1987) [W] (gelernantoj en la kursoj de). Kurso vortaro. Stockholm: Eldona Societo Esperanta, 1929. 40 p.

1930 **Cseh**, Andreo (1895-1979) [W] (gelernantoj en la kursoj de). Konversacia vortaro. Hago: Internacia Cseh-Instituto de Esperanto, 1930. 47 p. — 12 x 8 cm. 499 kapvortoj.

Prilab. eld. Hago 2010, vd. tie.

1930 **Grosjean-Maupin**, E[mile] (1863-1933) [W]; **Esselin**, A[lbert] (1860-?) [W]; **Grenkamp-Kornfeld**, S[alomon] (1896-1943) [W]; **Waringhien**, G[aston] (1901-1991) [W]. Plena Vortaro de Esperanto. Paris: Sennacieca Asocio Tutmonda, 1930. xv, 517, [1] p. — pr. Centra Presejo Esperantista, V. Polgar, Paris. 20 x 15 cm. Siglo: **PV 1930**. Difinoj en Esperanto. Ĝia 2a eld., korektita de Waringhien kaj poste ĉiam senŝanĝe represita ĝis 1996 estis multfoje tradukita aŭ adaptita al vortaroj de la tipo Esperanto → xy. Kun ĝia posteulo PIV 1970 ĝi pro tio fariĝis la plej enflu-hava vortaro de Esperanto. Multaj recenzoj kaj studoj, jen nur eta selekto. 6.902 kapvortoj. Rec.:

— 1931: Kopar [t.e. Kalocsay Kálmán]. En: Literatura Mondo Literatura Mondo vol. III. 1931-32, p. 49.

2a rev. eld. 1934. 511, [1] p. — pr. Granchamp, Annemasse. 20 x 15. Siglo **PV 1934** aŭ simple nur **PV**. Rec.:

— 2010: Bernardo [t.e. Bernhard Pabst]. La forstrekita pastro. En: *Ipernity* (2010-12-08): Komparo inter PV 1930 kaj PV 1934 kun informoj pri la kunlaborintoj kaj la politika kaj ekonomia fono de ilia ekesto.

3a eld. Paris: Sennacieca Asocio Tutmonda, 1947. 511, [1] p. — 20 x 14cm. Senŝanĝa repr. de la 2a eld. 1934.

Supl. Waringhien, G[aston]. **Suplemento. 1954.** 63, [1] p. — pr. Munier, Paris. 21 x 16. Siglo **PVS**. 1.176 kapvortoj.

4a eld. inkl. Supl. 1953 [1954]. 511, 63, [1] p. — 14 x 10 cm. Rec.:

— 1955: W.P.R. [= Roelofs, W.P.]. [Pri Plena vortaro de E. 4a eld. Supl. Paris 1954]. En: Scienca Revuo 1955:2, p. 77-79.

5a eld. kun supl. 195? — Tiu kaj ĉiuj postaj eld. senŝanĝaj repr. de la 4a eld. kun supl.

6a eld. kun supl. Paris: Sennacieca Asocio Tutmonda, 1960. 511, 63 p. — 17 x 12cm.

7a eld. kun supl. Paris: Sennacieca Asocio Tutmonda, 1964. 511, 63 p. —

17 x 12cm.

8a eld. kun supl. Paris: Sennacieca Asocio Tutmonda, **1971**. 511, 63 p. — Ĉiuj eld. post 1964: 17 x 12 cm.

9a eld. kun supl. Paris: Sennacieca Asocio Tutmonda, **1979**. 511, 63 p.

10a eld. kun supl. Parizo: SAT, **1988**. 511, 63 p.

11a eld. kun supl. Paris: SAT, **1996**. 511, 63 p.

Laŭdire 7a ĝis 9a eld. 1964-1979 aperita ankaŭ en Nagoya, Japanio (?).

Skanaĵo en Reta Vortaro 1999, vd. tie.

1931 **Rollet de l'Isle**, [Maurice] (1859-1943) [W];. Scienca Fundamenta Esperanta Terminaro. Paris: Internacia Scienca Asocio Esperantista, 1931. vii, 100 p. — pr. Centra Presejo Esperantista (V. Polgar), Paris. 24x16 cm. Terminoj rilataj al la ĉefaj sciencoj matematikaj, fizikaj kaj naturaj. ĉ. 1.500 terminoj.

Esperanto → franca

1931 **Rollet de l'Isle**, M[aurice] (1859-1943) [W]; Sekcio de Teknikaj Vortaroj (T.V.), Internacia Scienca Asocio Esperantista (I.S.A.E.). Scienca Fundamenta Esperanta Terminaro. Paris: Internacia Scienca Asocio Esperantista, 1931. 24 p. — pr. Centra Presejo Esperantista (V. Polgar), Paris. 24x16 cm.

1937 **Grenkamp**, S[alo, t.e. Salomon **Kornfeld**] (1896-1943) [W]. Oficiala vortaro de Esperanto. Paris: S. Grenkamp, 1937. 249, [8] p. — pr. Girault, Saint-Cloud. 14 x 11 cm. Poŝformata vortareto kun 4.398 kapvortoj, ĉefe tiuepoke oficialaj plus kelkaj neoficialaj, klarigitaj per koncizaj, plej parte neoficialaj difinoj. Spec.:

paco 1 Stato de ŝtato, kiu ne militas kontraŭ alia ŝtato. **2** Stato inter personoj, nacioj, popoloj, ĉe kiuj forestas malakordo, malamikemo. **3 (f)** Ripozo; trankvileco de l'animo.

pacienco 1 Virto, dank' al kiu oni eltenas trankvile la malbonon. **2** Kvalito de iu, kiu atendas trankvile iun aŭ ion malfruiĝantan. **3** Persisto.

paciento (med.) Malsanulo, kiu submetiĝas al kuracado.

1954 **Waringhien**, G[aston]. Plena Vortaro de Esperanto - Suplemento. 1954. 63, [1] p. — pr. Munier, Paris. 21 x 16. Siglo: **PVS**. Vd. ĉe Plena Vortaro 1930. 1.176 kapvortoj.

1955 **Azorin**, Francisko (t.e. Francisco Azorín Izquierdo, 1885-1975) [W]. Ilustrita Vortaro de Esperanto. Kun bazo seslingvaj kaj etimologia de ĉiu radikvorto. Unua volumo A-K [pli ne aperita]. Mexico: Editorial Stylo 1955. XI, [5], 642 p. — 22x17 cm bind. 50 000 vortoj, grandparte ilustritaj. Kunlaborintoj: Berger, J[osef] F. (de), Broadribb, D[onald] R. (en), Caetano, Elisa (pt), Chomette, Charles (fr), Marchesi, Mirza (it), Postnikov, F.A. (ru). Oficiala kondamno de la Akademio kontraŭ la vortaro pro ĝia kontraŭfundamenteco en Oficiala Informo 22 de Marto 1956. Rec.:

— **1956**: Auld, W[illiam]. Ilustrita Vortaro de Esperanto. En: Esperanto (UEA) 1956:04 (605), p. 64: „monstraĵo“, „fundamenta danĝero“, „nepre malrekomendinda“, „rekomendas al la e-istoj, ke ili ne aĉetu ĝin“.

— **1956**: Conterno, Clelia. La Ilustrita Vortaro. En: Esperanto (UEA) 1956:05 (606), p. 77: Kritikas la lingvan kompetentecon de Azorin.

— **1956**: Vilborg, Ebbe. En: Espero (Svedio) 1956:2-3.

— **1956**: Waringhien, G[aston]. En: FrancE 1956:2 (151), p. 110-111.

1956 **Haferkorn**, Rudolf (1896-1988) [W]; **Dellian**, Kurt; **Belinfante**, F[rederiek] J. (1913-1991) [W]. Scienca kaj Teknika Terminaro. Kiel propono aŭ provizora skeleto destinita por komplementi la Plenan Vortaron de SAT. Tokio: Japana Esperanto-Instituto, 1956. x, 248 p. — 19x13cm. Siglo **STT**. Terminoj difinitaj en Esperanto laŭ la stilo de PV 1934, do en vortnestoj, kies teknika suplemento ĝi volis esti. „Instigita per diskutado en Terminologia

Sekcio de Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISAE)“. Ĉefaj terminoj ankaŭ trad. al angla, franca kaj germana. Kun referencoj al pli fruaj terminaroj, ekz. VE = Verax 1907. Spec. (komenco de lit. P):

padel-i (ntr), vd. PV.

~o (Mŝ, VE): rado, kies radrondo estas ekipita kun ŝoveliloj; por energitransigo rotaciebla (rotoro), por kondukanto de vaporo k akvo firme sur akso (konduka rado) ĉe turbinoj; ankaŭ moviga organo de vaporŝipo. G: *Schaufelrad*.

paĝo, vd. PV.

paĝo-presilo (Tg, nlg), vd. presilo ... G: *Blattdrucker*.

- 1968 **Eichholz**, Rüdiger (1922-2000) [W]. Slipara Vortaro. **1968-1981**, 1440 slipoj. — Siglo **SV**. Kun multfakaj esperantaj terminoj kaj difinoj en la stilo de PV 1934 kaj tradukoj al angla, franca kaj germana, identiga numero kaj indiko de fako per UDK-numero. Multaj ilustraĵoj. SV servis i.a. kiel diskutilo por prepari la Esperantan Bildvortaron 1988 kaj suplementi PV survoje al PIV 1970. Ĝia posteulo estis la sistemo „Per-komputora Termino-Kolekto“ (Pekoteko), vd. PP 1992 en tiu ĉi ĉap. Spec.:

<du-makzela> **pren-trog/o**. Ilo por preni kaj levi grandkvante ŝutaĵojn (ekz. karbon, ercon, sablon). Ĝi konsistas kutime el du ŝeloj, kiuj estas artikitaj kiel makzeloj, kaj kiuj estas fermeblaj per ĉirkaŭ pulioj glitanta kablo. 77/15a. DK 621.86.063

a grab bucket

f grappin (m)

g Greifer (m)

- 1969 **Setälä**, Vilho (1892-1985) [W]. Oportuna vortaro de ordinara Esperanto. Helsinki: Fondumo Esperanto, 1969. 96 p. — 15 x 10 cm. pr. Munkkiniemen Kopiolaitos / Munksnäs Kopiering, [Munkkiniemi / Munksnäs]. ISBN 951-9005-18-8. ĉ. 3.000 kapvortoj. ĉ. 470 ilus.

2a eld. Helsinki: Fondumo Esperanto, **1974**. 96 p. — 22 cm. Inkluzive de supl. de geografiaj nomoj kun mapo. Rec.:

— **2005**: n.i. [Kováts, Katalin] en: edukado.net kun foto (2005-07-08): „Tre praktika, delonge kun sukceso uzata poŝvortareto, enmanigebla al la studentoj tuj je la komenco de la studoj. Ĝi enhavas pli ol 2000 el la plej oftaj radikoj kun klarigoj en facila Esperanto; stimulas pensadon rekte en la lingvo sen bezono traduki. La vortklarigoj estas simplaj, ofte ne kompletaj, sed tute bonaj por kompreni la signifon de la konceptoj. Tion helpas ankaŭ la ilustraĵoj. Komence de la libreto troviĝas mallonga enkonduko al la lingvo, kun gramatikaj resumoj.“

- 1970 **Waringhien**, G[aston] (1901-1991) [W] (ĉefred.) k.a. Plena ilustrita vortaro de Esperanto. Paris: Sennacieca Asocio Tutmonda, **1970**. xxxvii, 1.299 p. — pr. The Blackburn Times, Blackburn. 20 x 14 cm. Siglo **PIV**. Manuskripto preta en 1968. ĉ. 15 250 kapvortoj, t.e. vortaraj artikoloj, al kiuj aldoniĝas derivaĵoj. 1 046 ilus. librofine. Listo de kunlaborintoj en Vikipedio. La plej ofte referencita kaj recenzita difinvortaro de la epoko. Antaŭulo PV 1930 / 1934. Posteulo PIV 2002 / 2005 (vd. tie). Rec. (selekto, ĉ. 200 recenzojn pri diversaj aspektoj de PIV vd. en EBEA; jen nur kelkaj pli ampleksaj, aperintaj libroforme):

— **1995**: Eichholz, Rüdiger. Kritikoj kaj komentoj kolektitaj dum kontrolo de la skanaĵoj de PIV-paĝoj 346-359. (G2). Cirkulero de la Akademio de Esperanto, Sekcio pri Fakaj Vortaroj de 1995-02-16.

— **1995**: Reiersøl, Olav. Kritika komentario al kelkaj vortoj en Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto. Nøtterøy: Aŭtoro, 1995. 24 p. — 30 cm.

— **1995**: Reiersøl, Olav. Notoj pri kelkaj matematikaj kaj stokastikaj terminoj en Plena Ilustrita Vortaro. Nøtterøy: Aŭtoro, 1995. 24 p. — 30 cm.

2a rev. eld. Paris: Sennacieca Asocio Tutmonda, **1977**. xxxvii, 1.303 p. — „Offset“-eld.

3a eld. Paris: Sennacieca Asocio Tutmonda, **1980**. — pr. Laballery & Cie,

- Clamecy.
Repr. Paris: Sennacieca Asocio Tutmonda, **1981**. — Laballery & Cie, Clamecy.
Pirata eld. (senŝanĝa repr. de la eld. 1980 [?]) Tehran, **1984**.
4a plil. eld. red. R. Levreaud; G. Waringhien. Plena ilustrita vortaro de Esperanto **kun suplemento**. **1987**. 1.392 p. — pr. Laballery, Clamecy. 20 x 14 cm. ilus. bind. Supl. ankaŭ kiel memstara broŝ., enmetebila en la baza verko, vd. PIVS 1987.
- 1972 **Donner**, Walter A. La komparo de 751 ofte uzataj Esperanto-vortoj elprenitaj el 879 vortoj en rilato al 1714 vortoj anglaj. Maple Heights, Ohio: Walter A. Donner, [1972]. 4 p. — 28 x 22 cm. Enhavas plej oftajn radikojn. 751 radikoj.
- 1976 **Ludovikito** [pseŭd. de Itô Kanzi]. Promenado tra la komenctempaj vortaretoj. En: Hebreo el la geto. p. 229-353. Kioto: Eldonejo Ludovikito, 1976. 455, [5] p. — pr. presejo dai nippon, Kioto. 21 x 15 cm. Radikoj el dek du frutempaj vortaroj.
- 1979 **Lopez Luna**, A. Populara vortareto. Buenos Aires: Amigos de Lopez Luna, 1979. 45, [3] p. — 16 x 11 cm. 401 kapvortoj.
2a eld. Buenos Aires: Amigos de Lopez Luna, 1986. 104p. — 17 x ? cm.
- 1979 **Pettyn**, Andrzej (1938-) [W]. Słownictwo. En: Program Nauczania Języka Esperanto na kursach prowadzonych przez. Polski Związek Esperantystów. Warszawa: Polski Związek Esperantystów Zarząd Główny, 1979. [2], 25 p. — 20 x 15 cm. 1.510 radikoj.
- 1980 **Lentaigne**, L[éon; esperantigita Leo] (komp.) (1909-2008) [W]. Kiel diri ...? Praktika esperanta frazeologio (5000 esprimoj). Laroque Timbaut: Cercle espérantiste de l'Agenais „Laute!“ **1980**. 85 folioj. — A5. Foto. La titolo estas erariga. Esence temas pri vortaro de kombineblaj vortoj, sinonimoj k.t.p. vd. la spec. Instrucele ordigita laŭ 67 „ĉefaj ideoj“ de *admoni, afero ĝis vivo, vojaĝi*. Ĉefaj fontoj: PIV 1970, Plena Gramatiko kaj Domfabriko 1975. Franca prilaboraĵo estas Lentaigne 1984, vd. Tradukvortaroj → franca. Rec.: — **1980**: Koiĉi Ŝimizu. Spertiĝu per „Kiel diri ...?“. En: Esperanto [UEA] 1980:11, p. 191: „... taŭga ilo por riĉiga praktika kurso“, tro multaj preseraroj, tro malmultaj ekstereŭropaj aferoj.
2a plil. eld. Laroque Timbaut: Cercle espérantiste de l'Agenais „Laute!“ **1988**. 132, 4 p. — A5-broŝ. Aldoniĝis al la fontoj PIVS 1987, el kiu ĉ. 30 vortoj estis ĉerpitaj. Kun kvarpaĝa indekso nomita „enhavo“. Spec. (komenco de temo 49 paroli – silenti):
„Parolo estas arĝenta, sed ora la silento.“
1. Parolo(j) klara, hakata, klarbilda, maskitaj. [...]. Parolon doni, rifuzi, interrompi. [...]. Paroli flue, senĉese, laŭte, senpaŭze, sence, decideme, tekse-mikse, fajre, severe, libere, trosenĝene, kviete, liprande, bombaste, emfaze, elokvente, lakone, kolere, senprepara, ŝerce.
Paroli, diri, deklari, raporti [...]
- 1980 **Mariano**, Michele. Alfabeto indekso de la vortoj entenataj. En: Esperanto-vortaro per temo-tabeloj. Ascoli Piceno: Lina Gabrielli, 1980. xii, 142, [1] p. — pr. Tipografia Saviglianese, Ascoli Piceno. 21 x 30cm. Pri la baza verko vd. la ĉap. „Sisteme ordigitaj vortaroj“. ĉ. 5.000 kapvortoj.
- 1985 **Ojalo**, Jaan (1914-2004) [W]. Esperantaj sinonimoj.
[1a eld.] Vilnius-Tallinn-Kaunas: s.i. [samizdata] **1985**. 82 p. — Tajpita. Sinonima vortaro surbaze de PIV 1970. 1.925 kapvortoj sur 50 p.; numerita indekso ĉ. 5.500-vorta (32 p.). Serĉante „malbela 1855“ en la indekso oni trovas je tiu numero jenan spec.:

1855 **turpa** malbela, hida; fia

Rec.: Wikipedio.

2a rev. eld. [Rotterdam]: UEA/Fundaciòn Esperanto **1993**. 96 p. — Rec.:

— **1994**: Broadribb, Donald. Helpilo por stilvario. En: Esperanto [UEA] 1994, p. 174: „preskaŭ 5500 vortoj listigitaj“, „tre zorge korektita, ... la elekto de vortoj pritraktendaj ... neriproçebla“.

3a rev. eld. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, **1999**. 96 p. — 21 cm = A5. ISBN 9290170670.

1987 **Levreaud**, R[oland]. (1919-1992) [W]; **Waringhien**, G[aston] (1901-1991) [W]. Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto - Suplemento. 1987. [Paris]: Sennacieca Asocio Tutmonda [SAT] 1987. 45 p. — 19,5x14 cm broŝ. Siglo: **PIVS**. Spec.:

Pac/a GEO Nomepiteto de oceano (= Pacifiko).

***paĝ/o** (fine de l); ~*fronto*, ~*dorso*; ~*montrilo*.

pajr/o Ĉiu el la nobelaj samranguloj en kortego, parlamento ks.

Pakistan/o GEO ANST Ŝtato en Sud-Azio [...]

pakt/o 1 JUR Reciproka deviga interkonsento. 2 Vd. PIV.

1992 **Eichholz**, Rüdiger (ed.) (1922-2000) [W]. Per-komputora termino-kolekto (Pekoteko). Plena Pekoteko [19]85-[19]90. Bailieboro (Ontario): esperanto press [Okt.] **1992**, 1816 p. en tri vol. — 21 cm = A5-broŝ. ISBN 0-919186-38-6. Siglo **PP**.

Vol. I – Nocio-kompleksoj kun daŭraj numeroj ekregistritaj en 1985-1990 [p. 1-640].

Vol. II – Nocio-kompleksoj kun provizoraj numeroj ekregistritaj en 1988-1990 kaj Pekoteko-terminoj 85-90 klasifitaj laŭ Universala Decimala Klasifiko [p. 641-1280].

Vol. III – Esperanta, Germana, Angla, Franca Indeksoj. Ilustraĵoj, Apendicoj. Enketilo [p. 1281-1816].

La plej ampleksa vortaro en Esperanto difinanta vortojn el multaj fakoj, iam aperinta libroforme. „Pekoteko“ estis sistemo por registri kaj diskuti esperantigojn de nocioj. Ĝi baziĝis sur la skribprogramo WordPerfect 4.2. PP 1992 estas libroforma eldono de la terminaraj diskutoj kaj rezultoj inter 1985 kaj 1990. Krom kaj ekster la plena kolekto aperis pluraj aliaj terminaroj uzantaj la sistemon, pri kiuj vd. en Parto II. PP enhavas i.a. la kompletan de SV 1968 (vd. supre en tiu ĉi ĉap.). La strukturo de Pekoteko estas jena (ekzemplo el la terminaro de terminologiaj fakvortoj):

{U1} 001.411.5 (+)

{T1} RBN

{eo1} **karakteriz/aĵ/o** *a

{de1} Merkmal *n* (eines Begriffs) *a

{de2} Charakteristikum *n* *a

{de3} Eigenschaft *f* *a

{en1} characteristic (of a concept) *a*b

{en2} quality *a

{en3} property *a

{fr1} caractère *m* *b

Imago de propreco de objekto, kiu servas por formi kaj limigi nocion. Ekzemplo: *Unu el la karakterizaĵoj de la nocio (93/005) „fiŝo“ estas „havi naĝilojn“*. *c laŭ *b

Fon: *a 85/289; *b 1087/90 (E/F); *c ej;

93/014

Rim: = [85/289, 86/014], 88/023. «94-02-27»

{U1} {U2} k.t.p. – unua, dua k.t.p. UDK-numero

{T1} {T2} k.t.p. – unua, dua k.t.p. numero laŭ la kanada terminara datumbazo Termium.

{eo1} {eo2} k.t.p. – unua, dua k.t.p. termino en Esperanto kun indiko de la strukturo de

kunmetaĵoj (*karakteriz-aj-o*); la simboloj *a, *b, *c k.t.p. sendas al la fonto-indikoj.
{de1} {de2} k.t.p. – unua, dua k.t.p. termino en la germana; kiel {eo1} kun indiko de la gramatika genro (*m, f, n* – in-genra, vir-genra, neŭtra).

{en1} {en2} k.t.p. - unua, dua k.t.p. termino en la angla; kiel {eo1}

{fr1} {fr2} k.t.p. – unua, dua k.t.p. termino en la franca; kiel {eo1} kun indiko de la gramatika genro.

difino

Fon: - fontindikoj, ekz. ej = Rüdiger Eichholz, be = Bernhard Eichkorn, pb = Bernhard Pabst k.t.p.

93/014 – Pekoteko-numero (14a termino registrita en 1993)

Rim: - Rimarkoj kaj komentoj; enhavas almenaŭ la daton de lasta prilaboro.

Memstare aperis samforme kaj samloke krome:

Provizora fotokopiita eld. (Julio 1992): Vol. I kaj II. El vol. III:

- La esperanta indekso de PP 85-90, p. 2002-2115.

- La apendicoj de Plena Pekoteko 1985-90, 160 p.

1999 **Diestel**, Wolfram (projektestro, iniciinto, tekniko) (1969-) [W]; k.a. Reta Vortaro [W]. — Siglo **ReVo**. Interneta difinvortaro surbaze de PV 1934 iniciita en 1997 kaj ekredaktita en 1999 kun (partaj) tradukoj al 65 lingvoj, inter kiuj 40 tamen havas malpli ol 500 (nesisteme kaj hazarde) tradukitaj vortoj (ekz. afrikansa, keĉua, kurda, oseta, tongaa, Volapuko k.a.) kaj nur kvar, nome la franca, rusa, hungara kaj germana, pli ol 30 000. Pliaj ok lingvoj havas inter 10 000 kaj 25 000 tradukoj, nome pola, nederlanda, belorusa, angla, portugala, hispana, kataluna kaj itala (stato 2015-01). Aranĝo laŭ vortnestoj kiel en PV 1934. Kun funkcio por inversa ordigo de la artikolo-titoloj, kiu donas inversan vortaron. Ordigeblaj ankaŭ laŭ fakoj. Kun (malfidindaj) indikoj pri aparteno de radiko al Fundamento aŭ Oficialaj Aldonoj kaj (ofte ĝeneralaj kaj pro tio ne kontroleblaj) indikoj de fontoj por uzo-ekzemploj. Kun ligiloj (elektronikaj referencoj) al Vikipedio kaj tezaŭra funkcio por trovi sinonimojn kaj aliajn nociojn en semantika rilato al iu vorto. Daŭre en taga ritmo prilaborita. Stato en 2014-03: 11 103 artikoloj, 25 384 derivaĵoj, 31 698 sencoj; 35 998 tradukoj francaj, 32 307 rusaj, 32159 hungaraj, k.t.p., vd. la funkcion „ktp. → statistiko“. url:

<http://www.reta-vortaro.de/revo/>


Ekzistas ankaŭ versioj por pluraj aliaj komputilaj formatoj kiel Andoid, Kindle, mobi k.a., vd. la paĝon „ktp. → Kiel uzi Retan Vortaron en la diversaj sistemoj“.

Spec. (komparo de „ofendi“ en PIV 2005 kaj ReVo):

PIV: *ofendi (tr)

1 Kolerigi aŭ ĉagreni iun, malrespektante ties dignon: postulo ne pretendas, rifuzo ne ofendas (Z); kiu premas malriĉulon, tiu ofendas lian Kreinton (X); ŝi estis certa, ke jam neniam ŝi (...) ekmurmuros kontraŭ la mano kiu ŝin ofendos (Z); mi ne povas plu toleri, ke oni min tiamaniere ofendu (Z); muso la katon ĉiam ofendis (Z) (pf); ŝi estas ofendata per plej eta malprudaĵo; la profunde ofendita virino respondis (Z). → kontuzi, skandali, ŝoki, vundi, indignigi.

2 Malrespekti (senton): ofendi ies pudoron; tio ofendas nian lingvan senton (Z).

ReVo: *ofendi  [= ŝaltilo al tezaŭro]

(tr)

1. 

Kolerigi aŭ ĉagreni iun malrespektante ties dignon: *vi ofendis lin per via rido; pardonu, se mi vin nevole ofendis [2]; ŝi estas ofendata per plej malgranda neprudaĵo; ofendi noblan senton; muso la katon ĉiam ofendis [3].* → indignigi, skandali, ŝoki, vundi

2. 

(figure) (malofte) Malobei sciencan regulon, paroli malkonforme al komuna scio: *ofendi*

fonetikan leĝon; tio ofendas nian lingvan senton⁷; mi ankoraŭ ofendis la geografion. →
kontraŭi, malobei, rompi, transpaŝi

Rec.:

Kvankam la teknikaj aspektoj estas modelaj kaj multifunkciaj, la enhavo ofte estas malmoderna (baze stato de 1934), nesufiĉa, metie mallerta kaj nefidinda. Ofte la ekzemplo-fraz(er)oj ne profundigas la difinojn aŭ eĉ nur harmonias kun ili. Tipa estas jena model-frazo por „kuirejo“: *la kuirsto sidas en la kuirejo*. Neniel ĝi helpas kompreni la nocion *kuirejo*. Krome oni tro ofte simple ne trovas respondon al demando pri vortoj de la nuntempo. En 2015-01 mankis ekz. eĉ ankoraŭ la vorto *kuirigi*. Ambaŭ misoj originas en la (tamen ne strikte aplikata) principo de ReVo, ke vortoj estu registritaj nur, se oni aldonas minimume du trafojn el la „literaturo“, kio praktike ofte signifas el iuj, ofte dubaj fontoj en Interneto. Entute la teknike mirinda projekto aspektas enhave-metie sufiĉe amatora.

Alia serĉfasado (interfaco) por ReVo estas www.simplavortaro.org. Ĝi importas (nur) la difinojn kun ekzemplofrazoj kaj la tradukojn de ReVo, forlasante ĉion alian. La serĉfunkcio estas „**erar-tolerema**“: Eĉ se oni ne tute precize literumas serĉvorton, la funkcio ofte trovas la deziratan vorton (serĉo je „spontana“ ekz. ankaŭ trovas „spontanea“). Ĝi krome estas **vortanaliza**: Serĉante je „fajrobrigadisto“, ĝi ĝuste analizas la vorterojn kiel „fajro-brigad-ist-o“. Serĉante je „pactraktato“, kiu mankas en ReVo (!), la interfaco tamen ĝuste analizas la vorton kiel kunmetaĵo „pac-traktat-o“ kaj per pliaj klakoj montras la ReVo-artikolojn pri *paco* kaj *traktato*. Ofte ĝi tiel mildigas la tromalvastecon de la reta vortaro. Similan rutinon cetere uzas la difinvortaro kaj tradukvortaroj de lernu.net.

2000 **Matubara** Hatiro. Vortareto de kombineblaj vortoj. Parto A-K [pli ne aperita]. [Loko eble ind. en la japana?] 2000, [4], 606 p., 1 ĉemetita p. de korektoj. Multaj kombinitaj esprimoj trad. al la japana. Rec.:

— 2009: Bernardo [t.e. Bernhard Pabst]. Japana modesteco instruas lingvan abundon. En: Ipernity (2009-03-28).

2001 **Pilger**, Wouter F. (1942-2006) [W]. Baza Esperanta Radikaro.

1a eld. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio **2001**, 160 p. — Rec.:

— 2002: Minnaja, Carlo. Baza Esperanta Radikaro. En: *Monato*, 2002:23:7 (Jul.), p. 24: Komparas difinojn el BER kun tiuj de PIV kaj rezumas 'tre utila libreto por baz-lernintoj k instruistoj (precipe rektametodaj)'.

— 2004: Vergara, José Antonio. Valora leksikografia kontribuado por lernado de Esperanto. En: *Esperanto* [UEA] **2004**, n-ro 4 (Apr.).

2a rev. eld. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio **2010**. 169 p. — 18 cm. ISBN 9789290171089.

Rete konsultebla. ĉ. 2 950 radikoj.

2002 [**Duc Goninaz, Michel** (reviziestro) (1933-) [W]; **Roux, Klaŭdo**, [t.e. Claude (1945-) [W]] (teknikaj aspektoj)]. La Nova Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto. Paris: Sennacieca Asocio Tutmonda [SAT] **2002**. 1265 p. — pr. Kava-Pech en Dobřicovice ĉe Prago. 25 x15cm. Siglo **PIV 2002** (ankaŭ **NPIV, PIV2**). Enigas PIVS 1987 en la ĝustan alfabetan ordon kaj metas la ilustr. apud la koncernaj vortaraj artikoloj, fine ŝanĝis multajn lingvajn detalojn. La nuntempe kvazaŭnormdona difinvortaro, laŭ kiu orientiĝas multaj vortaroj Esperanto → cellingvo. Detalojn vd. en Vikipedio. Rec.:

— 2002: Pabst, Bernhard. Post 32 jaroj: Nova PIV praktikas spagaton. En: Esperanto aktuell 2002. Repr. en Ipernity 2009-05-21.

— 2002: Wennergren, Bertilo. La nova PIV, Heroa verko - kun mankoj. En: *Monato* 23-a jaro 2002, n-ro 10, p. 25-27.

Skanaĵo de 2009-12-21 kiel netraserĉebla bild-pdf, nomita NPIV-2002.pdf (200 mb).

Rev. eld. 2005. Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto 2005. Paris: Sennacieca Asocio Tutmonda [SAT] **2005**. 1265 p. — 25 x15cm. ISBN 2950243282.

- Siglo **PIV 2005**. Rev. kaj kor. eld. de PIV 2002. La ŝanĝoj (ĉefe korektoj) okazis nur, se ili ne kaŭzis grandajn ŝovojn de la enhavo kaj tiel necesigis nur limigitan rekompstadon de unuopaj paĝoj. Aliaj misoj restis senŝanĝe de PIV 1970, tra 2002 ĝis 2005. Jen ekz. eraro, pri kiu jam atingis Eichholz en 1995, vd. supre ĉe PIV 1970:
grenadisto. Soldato speciale *dresita* [ĝuste: trejnita] ĵeti grenadojn.
 Rec.:
- 2002-2006**: Bertilo [t.e. Bertil Wennergren]. Kritikaj notoj pri la Plena Ilustrita Vortaro 2002 kaj 2005. En: Lingva Kritiko – Esperantologio Interreta.
- Pirata eld. 2010** kiel instalinda vinda programeto „MiniPIV“. — Kontraste al la oficiala reta eld. 2012 eblas serĉi ne nur laŭ titoloj de vortaraj artikoloj, sed ankaŭ laŭ trafoj de iu vorto en la difinoj de tuta PIV 2005 (serĉo je „fiŝ“ ekz. montras ankaŭ la artikolon pri „abundo“ pro la tiea proverbo „Fiŝo serĉas profundon, homo serĉas abundon [da mono]“).
- Reta eld. 2012** de la rev. eld. 2005 je <http://vortaro.net>. — Siglo **ePIV 2012**.
- 2008 **Portella**, Luiz. Ilustrita Oficiala Radikaro Esperanta por Lernanto. Difino nur per radikoj, kiuj estas difinitaj. Braziljo [= *Brasilia*] Eldonejo Pentuvio 2008, 100 p. — ISBN 978-85-60661-05-3. Poŝformata, ilustrita eldono de la Baza Radikaro Oficiala (BRO) de la Akademio de Esperanto kun simplaj, eĉ je baza nivelo kompreneblaj difinojn de la 500 listigitaj vortoj (ĉ. 520 bildoj). Ankaŭ rete elŝutebla (pdf de 2,2 mb, 2008-04) de edukado.net (aliĝo necesa). Spec. (altaj ciferoj indikas la oftec-klason laŭ BRO):
pacienca* havanta kapablon trankvile (longe) atendi⁶
Pacifiko parto de la oceano⁹ (b[ildo] pĝ. 98)
paco* stato de lando, kiu ne estas en milito; stato de socio, en kiu ne estas perforto³
- ĉ. Difinvortaro en la vortara datumbazo de **lernu.net**, vd. en Parto II
- 2009 Tradukvortaroj. Spec.:
- paco** (pac-o) **1.** stato de nacio aŭ tribo, kiu ne estas militanta; **2.** stato de socio, gento, familio... inter kies anoj ne estas malakordo aŭ malkonsento.
- 2010 **Cseh**, Andreo (1895-1979) [W]; **Borsboom**, Ed (red.) (1936-) [W]; **Van Dijn**, Jesse (ilustr.). Konversacia vortaro. Hago: Internacia Esperanto-Instituto (IEI), 2010. 111 p. — 10,5 x 18 cm. ISBN 978-90-805651-3-5. Pri-laborita, enhance kaj lingve modernigita eld. de Cseh 1930, vd. tie. Mallongaj dif. en baza Esperanto de ĉ. 500 kapvortoj. Rec.
 n.i. [Kováts, Katalin] en: edukato.net (kun foto de la titolpaĝo kaj du specimenaj paĝoj):
 „...La allogan libreton ni konsilas aĉeti por interesigantoj, studentoj kaj aplikantoj de la [Cseh-] metodo, ĉar ĝi reprezentas historian valoron. Verŝajne ĉefe pro ĝia prezo la libro eble ne vere popularos inter la lernantoj de la lingvo, kiuj povus pli apreci la multe malpli koston kaj pli ampleksan kaj seriozan oficialan radikaron de Luiz Portella.“
- Spec.:
- kampo** la verda tero de lando
kanalo malnatura rivero
kandelo lumigilo de pastro
- 2012 **Corsetti**, Renato (red.). Esperanto estas facila. s.l.: Redaktoro. 2012. 140 p. — Listo de (preskaŭ-) sinonimoj, ofte al grek- aŭ latindevenaj vortoj, kiujn la redaktinto malrekomendas uzi. Bazo de la verketo estas la retejo „Simplaj Samsignifaj Vortoj“ (siglo **SSV**), kie kolektiĝas anstataŭigaj proponoj de anoj de „bonlingvismo“ el la e-mesaĝa diskutlisto „La bona lingvo“.
 url: http://www.bonalingvo.org/index.php?title=Simplaj_samsignifaj_vortoj.
- Spec.:
- pacifismo**
 pacifism-o [3oa] ~ pac·ism-o, pac·am-o
pacifisto
 pacifist-o [3oa] ~ pac·ist-o, pac·am·ant-o

pado

pad·o → voj·et·o, pas·ej·et·o

paĥidermo

paĥiderm·o → dik·haŭt·ul·o, dik·haŭt·a mam·ul·o

pajaco

pajac·o [zam] ~ amuz·ist·o, rid·ig·ist·o, klaŭn·o [zam]

Rec.:

La principoj de „bonlingvismo“ estas parte kontraŭfundamentaj, se ili (ofte nur kaŝe kaj insinue) asertas, ke *nur* la anstataŭige proponitaj „simplaj, samsignifaj“ vortoj estas „bona“ Esperanto, vd. detale Pabst, Berlina Komentario pri la Fundamento de Esperanto, vol. 1, 2013 (BK I). Se oni kun la Fundamento akceptas, ke ambaŭ vojoj krei terminojn por nocio, nome kaj laŭ Regulo 11 (kunmetado, vd. supre „dikhaŭtulo“) kaj laŭ Regulo 15 (asimilado de „fremdvortoj“, vd. supre „paĥidermo“) estas samrangaj, SSV povas servi kiel vortareto de sinonimoj. Ĉar temas nur pri simpla vortlisto sen aplik-ekzemploj ĝia utilo tamen estas limigita.

3. Konkordancoj kaj Neologismoj – Konkordancen und Neologismen – Concordances and Neologisms

En la lingvaĵo de Zamenhof, la nocio „neologismo“ (aŭ novvorto) havas (nur) la signifon de „formo nova“ en la senco de alineo 8 de la Antaŭparolo al la Fundamento (A 8). La malsupre cititaj verkoj kontraste uzas ĝin vastasence, sendistinge celantaj kaj „formojn novajn“, kaj „novajn vortojn“ (en la senco de A 7) kaj eĉ „vortojn fremdajn“ en la senco de Regulo 15 de la Fundamenta Gramatiko (R 15). Laŭ tiu (malpreciza) uzo, „neologismo“ kutime estas radiko, ne jam notita en iu gvida referenc-verko de la epoko (ekz. UV 1893, Kabe 1910, PV 1934, PIV 1970). Detalojn vd. BK I, 2013.

- 1904 **Th., E.** Novaj vortoj Esperantaj donitaj aŭ aprobitaj de d-ro L. Zamenhof. Bystrice-Hostýn: „Český Esperantista“, 1904. 12 p. — pr. Družstvo Knihotiskárny, Hranice. 20x14 cm. 1 381 kapvortoj.
- 1907 **Corret, P.** Vortoj ĉerpitaj el „Hamleto“. En: Lingvo Internacia 1907:12, p. 315-316.
- 1907 **Ellis, John; Millidge, Edward Alfred; Wackrill, Alfred Edward; Schafer, Adela.** Vortoj elĉerpitaj el Hamleto kaj ne troveblaj en Universala vortaro. Paris: Esperantista Centra Oficejo, 1907.
- 1907 **Parisot, J.** Pri la vortoj ĉerpitaj el „Hamleto“. In: Lingvo Internacia 1907:12, p. 365-366.
- 1907 **Mencel, Riĉardo.** Vortoj ĉerpitaj el „Fundamenta Krestomatio de la lingvo Esperanto“. En: Lingvo Internacia 1907, p. 554-556. **Skanaĵo** en la retejo de IEMW.
- 1907 **Wackrill, Alfred E[dward].** Konkordanco de Ekzercaro. Paris: Hachette, 1907. [4], 95 [1] p. — pr. Lahure, Paris. 19x12 cm. Enhavas oficialajn radikojn kaj vortojn kaj ekzemplojn de ilia uzado. 843 radikoj.
- 1908 **Boulet, Paul (1884-?) [W].** Du mil novaj vortoj ĉerpitaj el la Verkaro de Dro L.L. Zamenhof netroveblaj en Universala Vortaro kun sep naciaj tradukoj kaj referencoj montrantaj la lokon, kie ĉiu vorto troviĝas. Paris: Hachette, 1908. xv, 72 p. — pr. Imprimerie Espérantiste V. Polgar-Politzer, Paris. 18x11 cm. BIL 3163. 2.029 radikoj. Rec.:
— 1908: Cart, Théophile. En: Lingvo Internacia 1908, p. 482.
- 2a rev. eld.** Paris: Hachette, 1909. xv, 75, [2] p. — 18x11 cm. 2.126 radikoj. **Skanaĵo** de la unua kaj korektita dua eld. kiel Guglo-libro ĉe hathitrust.org. Esperanto → franca, angla, germana, hispana, itala, rusa, pola

- 1908 **Wackrill**, Alfred E[dward] (1862-1924) [W]. Zamenhofaj vortoj netroveblaj en la Universala vortaro tiritaj el Ekzercaro, Hamleto, Fundamenta krestomatio, La revizoro kaj La rabistoj kun citaĵoj. Paris: Esperantista Centra Oficejo, 1908. 52 p. — pr. Gauthier-Villars, Paris. 24x16 cm. 843 kapvortoj. Inkl. de citaĵoj kaj fontindikoj.
- 1910 **Ŭoago** [pseŭd. de Walter A. **Gale** (1855-1924) [W]]. Konkordanco de “La sentencoj de Salomono”. London: Stead’s Publishing House, 1910. 63 p. — 16x10 cm.
- 1927 **Butler**, Montagu C. Kelkaj vortoj kaj esprimoj en la zamenhofa traduko de la Malnova Testamento. En: Kristana Revuo I. 1927-1929, n. 6-15.
- 1927 **Wüster**, Eugen; **Kirschke**, Paul. Zamenhof-radikaro kun derivaĵoj kaj fontindikoj. Leipzig: Ferdinand Hirt & Sohn, 1927. 84, [4] p. — pr. Breitkopf & Härtel, Leipzig. 25x17 cm. Foto. Ankoraŭ la plej fidinda sistema verko, preparlaboraĵo por EV 1923. Mankas nur malmultaj Zamenhofaj radikoj el verkoj, pri kiuj Wüster ne disponis, ekz. el la Granda Vortaro Germana-Esperanto de 1894, kelkaj kajeroj de „La Esperantisto“ k.t.p.
- <1924 **Ŭoago** [pseŭd. de Walter A. **Gale** (1855-1924) [W]]. Konkordanco al „Marta“. — Neeld. manuskripto, laŭ EdE en 1934 en la biblioteko de Brita Esperanto-Asocio.
- 1929 **Wörterbuchbausteine** aus Goethes „Geschwister“ und Schillers „Räuber“. Vortrezoro el „Gefratoj“ de Goethe kaj „Rabistoj“ de Schiller. Prag: Deutscher Esperanto-Verein „Verda Stelo“, 1929. 53 p. — 17x10 cm. Eldonita omaĝe al Siegfried Lederer (1861-1911) [W]. La unuakta komedio „La gefratoj“ en la traduko de Grabowski aperis en 1889, la kvinakta dramo „La Rabistoj“ en la traduko de Zamenhof en 1908.
Germana → Esperanto
- 1936 **Kawasaki** Naokazu. Esperantologia raporto de Kawasaki, n-ro 1 -O-: Z[amenhof]aj ekzemploj. Osaka: Kaokazu Kawasaki, 1936. 11, [1] p. — 22x15. Listo de kunmetitaj vortoj kun intera -o- el la verkoj de d-ro L.L. Zamenhof. 1.416 kapvortoj.
- 1937 **Stancliff**, Fenton [S.]. Konkordanco al la Originala verkaro de Zamenhof [1929]. Rockford, Ill[inois]: Amerika Esperanto-Instituto, 1937. 50 p. — 22x15 cm. Represaĵo el “Scienca gazeto”. Skanaĵo (pdf) ekzistas. Sen rekonebla sistemo, nek pri lingvaj, nek enhavaj aspektoj tre helpa.
- 1953 **Kawasaki**, Naokazu. Trikonsonantaj kombinoj en Esperanto. Osaka: Fremdlingva Universitato de Osaka, 1953. 31 p. — 26x18 cm.
- 1973 **Ĝivoje**, Marinko. Esperantonimoj: listo de antonimoj, homonimoj, paronimoj, sinonimoj kaj vortludoj. Milano: Marinko Ĝivoje, 1973. [3], 111 p. — pr. Italcopy, Cinisello Balsamo. 17x12 cm.
1a eld. Milano: Literatura Rondo ‘La Patrolo’, **1973**.
2a eld. Pisa: Edistudio, **1979**. 117, [2] p. — pr. Vallerini Offset, Pisa. 17x12 cm.
- 1974 **Kawasaki** Naokazu. Esperantologia raporto de Kawasaki, n-ro 3. Prefiksitaj vortoj el Zamenhof, Plena vortaro rusa-internacia, 2-a eld., 1896 [= identa al la 1a eld. 1889]. Osaka: Naokazu Kawasaki, 1974. 84, 42 p. — 18x25 cm.
- 1976 **Ludovikito** [t.e. Itô Kanzi]. Malnudaj vortoj el no 17. En: **Hebreo el la geto**. p. 175-223. Kioto: Eldonejo Ludovikito, 1976. — pr. presejo dai nippon, Kioto. 21x15 cm. 455, [5] p. Listo de kunmetitaj vortoj el d-ro Esperanto, Plena vortaro rusa-internacia. 2a eld. 1896 [= identa al la 1a eld. 1889].
- 1983 **Vatré**, Henri (1908-1998) [W]. Neologisma glosaro. Eta postrikolto al PIV.

- Saarbrücken: Artur E. Iltis **1983**. 48 p. — A5-broŝ. tajpita. 1.000 kapvortoj. Kolekto de vortoj ne registritaj en PIV 1970, sed troveblaj en klasikaj vortaroj, literaturaĵoj aŭ glosaroj, ekz. Boirac 1909, Grosjean-Maupin 1911, Christalle 1923, Minor 1924, Fulcher kaj Long 1925, Bennemann 1926 k.t.p. Koncizaj difinoj en Esperanto, traduko al la franca, okaze al aliaj lingvoj. Kun neprecizaj fontindikoj (ekz. „77 – Piĉ: Klaĉejo“). La fokuso estas sur ĝenerallingvaj vortoj, ne sur teknikaj. Forte „iltisma“ kun tre multaj ne ĝenerale akceptitaj piĉismoj, ofte paralelaj formoj al pli akceptitaj.
- 2a [plil.] eld.** Saarbrücken: Artur E. Iltis **1987**, 71 p. — ISSN 0179-1052. Jubilea Eldon-serio II. Esperantologio 4. Nova subtitolo: Postrikolto al PIV. Kun laŭtema klasifiko en suplemento. ĉ. 2.000 kapvortoj.
- 3a eld.** Saarbrücken: Iltis **1989**. — 21 cm = A5 broŝ.
- 4a eld.** Saarbrücken: Iltis **1997**. 87 p. — 21 cm = A5 broŝ. Kun laŭtema klasifiko kaj rimaro. Spec.:
- pompono** lana bulkvasto. F. pompon 11
pon malantaŭ F. derrière 65
poni meti, starigi, F. poser 13
pondi ekvilibre moderigi la valoron de iuj grandoj laŭ ilia relativa gravo. F. pondérer 67.
ponio poneo*; speco de etkreska ĉevalo. F. poney 02.
- 1988 **Cherpillod**, André (1930-) [W]. Nepivaj Vortoj. Listo de 6800 vortoj ne troviĝantaj en la PIV – el kiuj kelkaj povas esti utilaj. s.l. [Nanterre]: aŭtoro **1988**, 179 p. — 21 cm = A5-broŝ. ISBN 2-906134-05-8. 6.800 kapvortoj ne registritaj en la ĝusta alfabeto pozicio en PIV 1970, sed troveblaj en ĉefe aliaj vortaroj („BS Esperanto-germana vortaro, de Butin-Sommer“), foje ĉe aŭtoroj („RH uzita de R. Haferkorn“) aŭ el la periodaĵo Mon[ato]. Kun tre koncizaj klarigoj (difinoj), okaze kun la vorto en la fontolingvo(j) en la respektivaj alfabetoj cirila, japana, korea k.t.p. La antaŭparolo subskribita en Nanterre. Spec.:
- pompono** (plumtufo) BS Dk HL OJ PI Sv
Ponapeo (ĉefurbo de Mikronezio: **Ponape**) Mon
ponciro (planto *poncirus*) MM
pondo (unito de forto) HL RH
- 2a eld.** Montmirail: **1991**, 180 p. — 21 cm = A5-broŝ.
- 1989 **Nomura** Rihej (1907-?) [W]. Zamenhofa Ekzemplaro – La uzado de vortoj kaj esprimoj el la verkoj de D-ro L. L. Zamenhof. Nagoya: Nagoja Esperanto-Centro 1989. xxi, 512 p. — 26x19 cm. Konkordanco kun indiko de trovlokoj en la verkaro de Zamenhof kun enkonduko de Gaston Waringhien, suplemento kaj detala indekso.
- 1992 **Günkel**, Claus J. (1963-) [W]. GuVo - Gunkela Vortaro. Paderborno 1992. [22 p.]. — 21 cm = A5-broŝ. tajpita kaj malbone legeble kopiita, sen indiko de paĝnumeroj. 912 kapvortoj kun PIV-stilaj difinoj kaj fako-indikoj. Vortoj trovitaj aŭ proponitaj post apero de Plena Ilustrita Vortaro de 1970, inkluzive de multaj propraj nomoj. Spec.
- lambad/o**. Moderna Brazilo danco kun iom erota karaktero. Ĝi floris fine de 1980-aj jaroj. ~i. Danci ~on.
- lambreken/o**. Ornama pendaĵo kovranta la randon de breto aŭ la supran parton de fenestro aŭ pordo.
- 2a plil. eld.** Paderborno **1994**. [48 p.]. — 21 cm = A5-broŝ. tajpita kaj malbone legeble kopiita, sen indiko de paĝnumeroj.
- 3a eld.** Viersen: **1997**, 43 p. — 21 cm = A5-broŝ.
- 2008 **Dörr**, Josef. Lingvoteorio de Karolo Piĉ. EldonejOverlag 2008. 90, 123 p. — Celas eltiri la kvintesencon de la piĉ-a teorio pri la esperanta lingvo kaj lingvaĵo kaj kunigas ties disajn glosarojn en unun piĉan glosaron de entute

1168 glosoj (ĉefe komunaj vortoj, geografiaj kaj personaj nomoj). Eltiro de doktoriĝtezo kadre de AIS.

- 2011 **Neves, Gonçalo** (1964-) [W]. Historia vortaro de Esperanto. 1887-1888. (Bad Bellingen): Edition Iltis 2011, 113 p. (Schriften zur Esperantologie und Interlinguistik. 25.). — A4. ISBN 978-3-932807-96-1. Siglo: **HV**. Tre fidinde notas la unuan uzon de radikoj en la unuaj du jaroj de Esperanto. Rec.: — 2012: Bernardo. Mirinda: Historia Vortaro de Esperanto de Neves. En: *Ipernity* (2012-01-07).

4. Vortaroj pri Mallongigoj – Abkürzungswörterbücher – Dictionaries of Abbreviations

Preskaŭ ĉiuj iom ampleksaj difin- aŭ tradukvortaroj ankaŭ enhavas listojn de la plej kutimaj ĝeneralaj mallongigoj, kiel ekz[emple] „k.t.p.“ [kaj tiel plu] k[aj] a[liaj]. Krome ekzistas multaj mallongigoj de esperantaj organizaĵoj, verkoj, periodaĵoj k.t.p., ekz. UEA – Universala Esperanto-Asocio, PIV – Plena Ilustrita Vortaro, HdE – Heroldo de Esperanto (gazeto). Aparte menciindaj verkoj pri tiaj mallongigoj estas la sekvaj. Kolektoj de fakspecifaj mallongigoj enhavas i.a. diversaj listoj pri komputikaj simboloj kaj mallongigoj, vd. Parton 3.

- 1982 **Hauptenthal, Reinhard** [komp]. Listo de mallongigoj. Saarbrücken: Artur E. Iltis 1982. 16 p. — A5-broŝ.
- 1994 **Wulff, Jürgen**. Das Esperanto-Dschungelbuch. Kleiner Führer durch den Esperanto-Dschungel von Abkürzungen und Begriffen. — „Malgranda gvidilo tra la esperanta ĝangalo de mallongigoj kaj nocioj“. **2a eld.** Hamburg: [Aŭtoro] 1994. 22 p. — A5-broŝ. Ilus.
- 2008 **Dörr, Josef** [W]. 100 kurtigoj por sms. Quierschied: Eldonejferlag, 2008, 9 p. — 17 cm. ISBN 9783939517108. 100 vortoj kaj kelkaj frazkurtigoj por rapida poŝtelefona mesaĝado.
- 2015 **Pabst, Bernhard**. Berlina Vortaro de Mallongigoj, Sigloj kaj Akronimoj de Esperanto. Berlino 2015 (aperonta) — Siglo **BVM**. ĉ. 1100 mallongigoj uzitaj aŭ ankoraŭ uzata en Esperanto kun indiko de kategorioj, fontoj kaj kritika pritrakto. Spec.
p. – [ĝen.] paĝo, paĝoj; okaze, sed evitinda ankaŭ: **pĝ**.
(de) **S.** - Seite Seiten.
PAG – [libro] Plena Analiza Gramatiko; vd. ankaŭ: **PG**
PG - [libro] Plena Gramatiko; vd. ankaŭ: **PAG**
PIV - [libro] Plena Ilustrita Vortaro. La gvida difinvortaro de Esperanto, aperinta en 1970, 2002 kaj 2005; vd. ankaŭ: **PV, PVS, PIVS, NPIV, ReVo**.
PIVS - [libro] Plena Ilustrita Vortaro - Suplemento: Suplemento de 1987 al → PIV 1970.
plil. – [bibl.] plilarĝita: pp eldono de libro: *PV, 2a plil. eld. Parizo 1934*.

5. Frazaroj – Phraseologien – Phraseologies

En tiu ĉi ĉapitro estas notitaj nur unulingvaj frazaroj kaj proverbaroj en Esperanto. Plurlingvaj frazarojn vd. ĉe la koncerna(j) lingvo(j) en Parto 2. Ofte temas pri tradukoj kaj adaptiĝoj de la Zamenhofa Proverbaro 1910, vd. la tuj sekvan tabelon. Frazarojn de unuopaj fakoj (ekz. de aŭtomobilismo) vd. en Parto 3 (Terminaroj).

- Angla** ĉ. 1925 (Butler), 1969 (Woolf).
Finna 1999 (Röntynen)
Franca 1984 (Lentaigne), 1985 (Bourgois).

- Germana** 1908 (Velten), 1921 (Loy), 1922 (Minor), 1953 (Butin), 1969-1972 (Kessler), 1995 (Wiersch).
- Hungara** 1975 (Csiszár, Kalocsay).
- Kataluna** 2014 (Martín Burutxaga).
- Malta** 2011 (Mellia).
- Nederlanda** 1936 (Waard).
- Portugala** 1964 (Fernandes)
- 1888 **Zamenhof**, L.L. Popoldiroj. En: Dua Libro de l' Lingvo Internacia. Varsovio 1888, § 18. — 15 proverboj, la unua proverbareto de Esperanto.
Skanaĵo rete konsultebla ĉe IEMW. Spec. (n-roj 1,3, 5, 7):
 1. Ĉiu „tial“ havas sian „kial“.
 3. Kia patrino, tia filino.
 5. Se infano ne krias, patrino ne scias.
 7. En sia urbeto neniu estas profeto.
- 1910 **Zamenhof**, L.L. Proverbaro Esperanta - laŭ la verko „Frazologio rusa-pola-franca-germana“ de M. F. Zamenhof aranĝis L. L. Zamenhof [W]. Paris: Hachette 1910. 82 p. — La unua eld. de la klasika proverbaro de Z. kun 2 630 proverboj, multfoje reeldonita, kiu (parte) eniris en ĉiuj iam ampleksaj vortaroj. Ĝia enhavo estas ankaŭ troveblaj en diversaj prezentoj en multaj retejoj, i.a. en Vikipedio (tie ankaŭ fotoj de div. eldonoj), lernu.net kaj www.proverbaro.net.
2a eld. Paris: Esperantista Centra Librejo **1925**.
3a eld. La Laguna: Stafeto **1961**.
4a eld. La Laguna: Stafeto **1974**. — Serio: Beletraj Kajeroj.
5a eld. [Ĉinio] **1990**.
 Spec.:
- 19. Malriĉo**
 19.01 Por riĉulo fasto - por malriĉulo festo.
 19.02 Pli bona io ol nenio.
 19.03 Al malriĉulo ovo kiel al riĉulo bovo.
- 1933 **Fontsono** Ĉaj (trad.). Ĉinaj proverboj. En: Esperanto (UEA) Feb. 1933, p. 32. — Listeto de kelkaj ĉinaj proverboj trad. al Esperanto. Spec.:
 - Pli facile estas kapti ol liberigi tigron.
 - Akvo disverŝita estas malfacile rekolektebla.
 - Kiam sur monto ne estas tigro, la simio proklamas sin reĝo.
- 1935 **Šupichová**, Julie. Samideana vortaro. Jablonné nad Orlici, Ant. Pražák, 1935. 18, [2] p. — 14 x 10 cm. Kolekto de 160 „samideanaj pensoj“. Spec.:
 - Koni Esperanton povas multaj. Sed scii?
 - Skribi en Esperanto: afero evidente facila. Sed skribi internacie?
 - Fratoj amataj, kie vi estas? kion vi faras? Kion dirus hodiaŭ al ni la Majstro?
 Rec.:
 — **1935**: N.i. [Montagu C. Butler (?)]. Samideana Vortaro. En: Brita Esperantisto 30a jaro, 1935, p. 206.
- 1999 **Röntynen**, Erkki. Proverbaro - nia komuna heredaĵo. Aŭtoro 1999. 202 p. — ISBN 92-9017-057-3. Kolekto de proverboj el la tuta terglobo, tradukitaj plej ofte el la finna lingvo, ordigitaj laŭ temoj, kun koncepta enkonduko.
- 2004 **Fiedler**, Sabine; **Rak**, Pavel (ilustr.). Ilustrita frazeologio. KAVA-PECH **2004**. 136, 4 p. — ISBN 80-85853-57-4. Elektitaj esperantaj parolturnoj kun klarigoj pri la signifo, ekzemploj el la esperanta literaturo, kaj similaj esprimoj en aliaj lingvoj. Kun ilustr. de Pavel Rak.
2a eld. senŝanĝa KAVA-PECH **2009**. 136, 8 p. — ISBN 978-80-87169-08-7.
- 2008 **Al-Amily**, Hussein M. La trezoro de Arabaj proverboj kaj anekdotoj.

- Rotterdam: Araba Komisiono de Universala Esperanto-Asocio. 2008. 136 p. — Ilustr. kolekto de ĉ. 3000 proverboj kaj anekdotoj el la araba kaj islama kulturo, kun klarigaj notoj, aldone transliteruma tabelo.
- 2010 **Cherpillod**, André. Proverbaro tutmonda. Proverboj, sentencoj, dirmanieroj el 90 lingvoj. La Blanchetière: Aŭtoro 2010. 157 p. — ISBN 2-906134-89-9.
- 2014 **Adjé**, Adjévi. Afrikaj Proverboj. Lomé: Agado por la Progresigo de Esperanto en Togolando [APET] 2014 [?]. 30 p. — 23 cm. Foto. Kolekto de ĉ. 500 afrikaj proverboj kaj diraĵoj.

6. Korpusoj – Korpora – Corpora

- ĉ. 2003 Wennergren, Bertil. **Tekstaro**. — La „klasika“ elektronika korpuso de Esperanto, relative malgranda (iom malpli ol 4,7 milionoj da vortoj), sed kun multaj klasikaĵoj el la fruaj jarcentoj, tamen ankaŭ kun granda „truo“ de la 1930-aj jaroj ĝis la komenco de la elektronika epoko en la 1990-aj jaroj. De la lastaj du jardekoj ĉefe tekstoj el modernaj periodaĵoj (ĉefe *Monato*, *Ondo de Esperanto*). La traserĉotaj tekstoj povas esti elektitaj (ekz. ĉiuj, nur Zamenhofaj, nur el iuj verkoj, periodaĵoj k.t.p.). La korpuso (sen la per kopirajto protektitaj verkoj) estas elŝutebla. Stato 2009-02 (ne plu daŭrigita).
<http://tekstaro.com/>
- 2004 Bick, Eckhard. **Corpuseye**. — Korpuso de la tuta esperant-lingva Interneto (ĉ. 58,4 milionoj da vortoj), partoj el kiuj estas elekteblaj (ekz. nur esperanta literaturo, nur esperanta Vikipedio k.t.p.). Lasta aktualigo en 2010, de tiam ŝajne ne plu modernigita.
<http://corp.hum.sdu.dk/>
- 2005 Vaché, Jérôme. **Kukolo**. — Esperantlingva fasado por Guglo (*Google*), kiu per unu serĉo trovas ĉiujn deklinaciajn kaj konjugaciajn formojn de Esperanto-vorto en tiaj tekstoj, kiujn ankaŭ trovas Guglo. La ofte riĉan rikolton necesas zorge kribri por eligi nefidindajn fontojn. **44a eld.** de la programo de 2013-10-18.
<http://www.tekstoj.nl/kukolo/kukolo.htm>
- 2008 Bick, Eckhard. **DeepDict** Lexifier. Dato de la unua publikigo en interneto: 2008-04-11. — Komputila programo, kiu surbaze de la esperant-lingva interneto indikas tipajn rilatojn inter vortoj. La resenditaj rezultoj donas vortaron de kombineblaj vortoj (kutima kombino estas ekz. *hundo* kaj *boji*, sed ne *hundo* kaj *miaŭi*). Necesas (senkosta) ensaluto. Pliajn detalojn vd. en la rec. Bernardo 2010.
url: <http://gramtrans.com/deepdict/>
Spec. (atributoj, t.n. „premodifiers“ de **hundo**):

Premodifiers:

4.58:3 rabia · 4.93:2 mopsa · 4.49:2 dalmata · 0.82:5 **granda** · 3.68:2 purrasa · 1.48:4 **sovaĝa** · 1.43:4 **nigra** · 4.36:1 trikapa · 4.24:1 nelaca · 4.24:1 mallonghara · 3.18:2 andaluza · 0.89:4 **malgranda** · 2.53:2 vila · 1.35:3 flava · 2.16:2 paŝtista · 2.04:2 senhejma · 2.85:1 miksrasa · 2.85:1 preria · 2.75:1 bonrasa · 0.69:3 grandega · 2.45:1 senmastra · 2.3:1 terapia · 2.3:1 ŝafista · 2.22:1 kontraŭtanka · 2.04:1 vagabonda

Laŭ tio la plej oftaj atributaj kombinoj kun *hundo* estas:

1. 0.82:5 **granda** · *hundo*
2. 1.48:4 **sovaĝa** *hundo*
3. 1.43:4 **nigra** *hundo*
4. 0.89:4 **malgranda** *hundo*
5. k.t.p.

Rec.:

— **2010:** Bernardo [t.e. Bernhard Pabst]. DeepDict: Vortoj kaj iliaj amikoj. En: Ipernity (2010-12-31).

2013 Universität Leipzig. Wortschatz [**Lepsika Korpuso**]. — La nuntempe plej ampleksa kaj aktuala, profesie farita korpuso de Esperanto, unu el 230 samspecaj *Corpus-Based Monolingual Dictionaries*. Fasada lingvo estas la angla. La rezultoj ĝenerale estas el lingve fidindaj fontoj, precize indikitaj (kaj do kontroleblaj). Spec. (malgranda eltiraĵo el serĉo je *paco*):

term: *paco*

number of occurrences: 4279

class of frequency: 9 (i.e. *la* has got about 2^9 the number of occurrences than the selected word.)

example(s):

Ni preĝas, ke Dio donacu helpon kaj gracon, por ke la popolo de Ĉeĥoslovakio trovu ripozon kaj ke la **paco** restu konservata. (source: http://www.esperokatolika.org/ek19661970/ek1968_09.htm)

Poetinoj gravos en la morgaŭa tago, dediĉita al "Bildoj de virinoj en literaturo kiel vojo al **paco**". (source: <http://www.esperantio.net/indexdae8.html>)

"Kaj la frukto de justeco estas semata en **paco** por tiuj, kiuj faras pacon" (Jakobo, 3, 18). (source: <http://www.esperantio.net/indexb88d.html>) [more examples](#)

significant cooccurrences of *paco*:

[justeco, milito, mondo, amikeco, popoloj, stabileco kaj multaj aliaj vortoj, kiuj kutime aperas en rilato al *paco*]

significant left neighbours of *paco*:

[la, pri, de, monda k.m.a.]

significant right neighbours of *paco*:

[kaj, en, inter, kun, estu k.m.a.]

url: <http://corpora.informatik.uni-leipzig.de/>

7. Sisteme Ordigitaj Vortaroj – Systematisch geordnete Wörterbücher – Dictionaries in Systematical Order

Tie ĉi nur unulingvaj sisteme ordigitaj *ĝeneralaj vortaroj* estas registritaj. Pliaj unu- aŭ plurlingvaj vortaroj estas notitaj en Parto 2 je la koncernaj lingvoj (ekz. la Hecker-vortaroj, unuopaj verkoj bulgara, ĉina, franca, itala, rusa k.a.). Bildvortaroj kutime same estas ordigitaj laŭ temoj, vd. la sekvan ĉapitron 8.

Multaj *terminaroj* same estas sisteme ordigitaj, sed listigitaj en Parto 3 je la unuopaj fakoj.

Literaturo: **Koutny**, Ilona. De nociklasifiko ĝis temvortaroj. Esperanta vortprovizo en temgrupoj. En: **Kiselman**, Christer; **Mattos**, Geraldo (red.). Lingva Planado kaj Leksikologio. Kontribuajoj al internacia simpozio, Zagrebo 2001-07-28/30. Chapecó-SC; Brasília-DF: Fonto 2001.

7.1 Sistemaj frazaroj laŭ Oskar Hecker (1907-1909)

Superrigardo:

— **2009:** Bernardo [t.e. Bernhard Pabst]. La sistemaj vortaroj laŭ prof. Hecker (1907-1909). En: Ipernity (2009-02-22).

Oskar (post la ortografia reformo en 1901 *Oskar*) Hecker (1867-1937) estis germana lektoro (help-profesoro) de la itala lingvo ĉe la imperiestra universitato de Berlino. Kiel instruilo de la itala por germanoj li kreis sisteman frazaron laŭ komunikaj situacioj („La pieda vojaĝo“, „Juro“, „Societo kaj regno“ k.t.p.). La eldono germana-itala aperis unuan fojon en 1897. La eldonejo poste petis parolantojn de aliaj lingvoj

traduki la frazaron el la germana al tiuj lingvoj kaj publikigis la lingvo-kombinojn kun unueca fasado en kvar serioj:

- A dulingvaj frazaroj (32 vol.)
- B trilingvaj frazaroj (6 vol.)
- C kvarlingvaj frazaroj (6 vol.)
- D seslingva frazaro (1 vol.)

La tradukon al Esperanto faris „Dr. A. von Mayer M.A., Instruisto de l' Esperanto Lower Mosley Street lernejoj, Manchester“ kaj prezidanto de la esperantista grupo en Manĉestro. Hecker mem probable ne parolis Esperanton. Aperis jenaj volumoj kun lia Esperanto-traduko:

Serio A – dulingvaj frazaroj

- A 1 germana → itala: La modelo de ĉiuj aliaj volumoj
- A 2 – A 4 germana → angla / franca / hispana
- A 5 germana → Esperanto**
- A 6 – A 8 germana → norvega-dana / pola / rusa
- A 9 – A 11 angla → itala / franca / hispana
- A 12 angla → Esperanto**
- A 13 – angla → norvega / pola
- A 15
- A 16 franca → hispana
- A 17 franca → Esperanto**
- A 18 – franca → norvega / pola / rusa
- A 20
- A 21 itala → Esperanto**
- A 22 hispana → Esperanto**
- A 23 norvega/dana → Esperanto**
- A 24 pola → Esperanto**
- A 25 pola → rusa
- A 26 rusa → Esperanto**
- A 27 – aliaj lingvo-kombinoj (sveda → itala k.t.p.)
- A 31
- A 32 germana → portugala
- Sume** Ok inter 32 lingvo-kombinoj havas Esperanton

Serio B – trilingvaj frazaroj

- B 1 germana → franca → angla
- B 2 franca → angla → itala
- B 3 franca → angla → Esperanto**
- B 4 franca → pola → germana
- B 5 pola → rusa → Esperanto**
- B 6 franca → itala → germana
- Sume** Du inter ses lingvo-kombinoj kun Esperanto

Serio C – kvarlingvaj frazaroj

- C 1 germana → franca → angla → itala
- C 2 germana → franca → angla → Esperanto**
- C 3 rusa → franca → angla → germana
- C 4 rusa → franca → angla → Esperanto**
- C 5 hispana → franca → angla → Esperanto**

C 6 **germana → pola → rusa → Esperanto**
Sume Kvar inter ses lingvo-kombinoj kun Esperanto

Serio D – Seslingva frazaro

D 1 **germana → franca → angla → itala → rusa → Esperanto**
Sume La sola seslingva frazaro ankaŭ enhavas Esperanton

Spec. el la ĉapitro „Domo kaj loĝejo“ el A 5 germana → Esperanto (la streketoj en la germana indikas parolpaŭzetojn kaj akcentojn):

Toilette machen – Faru tualeton

der Toilet'tentisch – la tualeta tablo

er steht am Waschtisch – ĝi [nome la tualeta tablo] staras apud lavtablo

die Wasch'schüssel – la lava pelvo

die Was'serkanne – la akva kruĉo

fort'giessen; der Eimer – forverŝi; la sitelo

Wa'schungen mit kaltem, lau'warmem, heissem Wasser – lavado per malvarma, varmeta, varmega akvo

k.t.p.

Das Gas; das Gaslicht – La gaso; la gaslumo

Gas'flamme – gasflamo

das Gasglühlicht – la gasa ardlumo

der Glüh'körper , ~strumpf – la ardotubo

....

(sebst'tätiger) An'zünder – (memaga) eklumigilo

k.t.p.

Jen la sep plurlingvaj vortaroj de la serioj B ĝis D. La dulingvaj vortarojn de la serio A vd. ĉe la koncernaj lingvoj en la ĉapitro „Tradukvortaroj“.

1907 **Hecker**, Oscar; **Mayer**, A. v. [trad. al Esperanto]; **Besson**, P.; **Hamann**, [F.] A.. Systematical Vocabulary French-English-Esperanto according to the german text of Oscar Hecker Vocabulaire systématique Français-Anglais-Esperanto d'après le texte allemand par Oscar **Hecker** (Prof. Heckers Wortschatz für Reise und Unterricht **Nr. B3**). ĉ. 12.000 kapvortoj kaj frazoj. Berlin: B. Behr, [1907]. [9], 318 p. — pr. Herrosé & Ziemsen, Wittenberg. 17x15 cm. Laŭtema vortaro.

Franca → angla, Esperanto

1907 **Hecker**, Oscar [germana]; **Hamann**, F.A. [franca]; **Besson**, P. [angla]; **Mayer**, A.v. [trad. al Esperanto]. Systematisch Geordneter Worschatz Deutsch-Französisch-Englisch-Esperanto. Vocabulaire systématique. Systematical Vocabulary. Sistema Vortaro (Prof. Heckers Wortschatz für Reise und Unterricht **Nr. C2**). Berlin: B. Behr, [1907]. [9], 630 p. — pr. Herrosé & Ziemsen, Wittenberg. 17x11 cm. Laŭtema vortaro kun ĉ. 12.000 kapvortoj kaj frazoj.

Germana → franca, angla, Esperanto

1907 **Hecker**, Oscar; **Löwenthal**, W. [rusa]; **Besson**, P. [angla]; **Hamann**, F.A. [franca]; **Mayer**, A.v. [trad. al Esperanto]. Systematisch Geordneter Worschatz Russisch – Französisch – Englisch – Esperanto. Sistematisches Slovar'. Vocabulaire systématique. Systematical Vocabulary. Sistema Vortaro (Prof. Heckers Wortschatz für Reise und Unterricht **Nr. C4**). Berlin: B. Behr, [1907]. [9], 630 p. — pr. Herrosé & Ziemsen, Wittenberg. 17x11 cm. Laŭtema vortaro kun ĉ. 12.000 kapvortoj kaj frazoj.

Rusa → franca, angla, Esperanto

- 1907 **Hecker**, Oscar; **Mayer**, A. v. [trad. al Esperanto]; **German**, Ludomil; **Löwenthal**, W. Systematisch Geordneter Wortschatz Polnisch-Russisch-Esperanto. Systematycznie Ułożony Systematyczny Słownik (Prof. Heckers Wortschatz für Reise und Unterricht **Nr. C 5**). Berlin: B. Behr, [1907]. [9], 318 p. — pr. Herrosé & Ziemsen, Wittenberg. 17x15 cm. Laŭtema vortaro. ĉ. 12.000 kapvortoj kaj frazoj.
Pola → rusa, Esperanto
- 1907 **Hecker**, Oscar; **Palacios**, R. de [hispana]; **Hamann**, F.A. [franca]; **Besson**, P. [angla]; **Mayer**, A.v. [trad. al Esperanto]. Systematisch Geordneter Wortschatz Spanisch–Französisch–Englisch–Esperanto. Vocabulario Sistemático. Vocabulaire systématique. Systematical Vocabulary. Sistema Vortaro (Prof. Heckers Wortschatz für Reise und Unterricht **Nr. C5**). Berlin: B. Behr, [1907]. [9], 630 p. — pr. Herrosé & Ziemsen, Wittenberg. 17x11 cm. Laŭtema vortaro kun ĉ. 12.000 kapvortoj kaj frazoj.
Hispana → franca, angla, Esperanto
- 1907 **Hecker**, Oscar; **German**, Ludomil [pola]; Löwenthal, W. [rusa]; **Mayer**, A.v. [trad. al Esperanto]. Systematisch Geordneter Wortschatz Deutsch-Polnisch-Russisch-Esperanto. Systematycznie Ułożony Systematyczny Słownik. Sistema Vortaro (Prof. Heckers Wortschatz für Reise und Unterricht **Nr. C6**). Berlin: B. Behr, [1907]. [9], 630 p. — pr. Herrosé & Ziemsen, Wittenberg. 17x11 cm. Laŭtema vortaro kun ĉ. 12.000 kapvortoj kaj frazoj.
Germana → pola, rusa, Esperanto
- 1907 **Hecker**, Oscar [koncepto, itala]; **Hamann**, F. A. [franca]; **Besson**, P. [angla]; **Löwenthal**, W. [rusa] **Mayer**, A.v. [trad. al Esperanto]. Systematisch Geordneter Wortschatz Deutsch-Französisch-Englisch-Italienisch-Russisch-Esperanto. Vocabulaire systématique. Systematical Vocabulary. Vocabulario Sistemático. Systematyczny Słownik. Sistema Vortaro (Prof. Heckers Wortschatz für Reise und Unterricht **Nr. D1**). Berlin: B. Behr, [1907]. [13], 300, 340 p. — pr. Herrosé & Ziemsen, Wittenberg. 17x15 cm. Laŭtema vortaro kun ĉ. 12.000 kapvortoj kaj frazoj.
Germana → franca, angla, itala, rusa, Esperanto

7.2 Aliaj sistemaj vortaroj

- 1942 **Setälä**, Vilho (1892-1985) [W] k.a. Suomi Svenska English Deutsch Français Polski Russkij Esperanto Dansk Norsk Italiano Español Português. Helsinki: Kustannusosakeyhtiö Otava, 1952. 96 p. — 20x7 cm. Laŭtema vortaro kun laŭalfabetaj indeksoj por ĉiu lingvo. ĉ. 1.200 kapvortoj.
Finna, sveda, angla, germana, franca, pola, rusa, Esperanto, dana, norvega, itala, hispana, portugala
- 1980 **Mariano**, Michele. Esperanto-vortaro per temo-tabelo. Ascoli Piceno: Lina Gabrielli 1980. 12, 142 p. — 30 cm. Serio: Plejado - Scienca eldon-serio 1. ĉ. 5000 vortoj laŭteme arangitaj. Kun alfabetaj indekso. Spec. (kapvorto „ridi“): ridi – satiro, sardona, sarkasmo, moki, pikema – ŝerci, malserioza, petoli, rikani, blagi, gajigisto, joviala, fola, bonhumorigi, karikatur, travestii, parodii (plus mal-vortoj).
Fono kaj rec.:
— **1978**: **Mariano**, Michele. Esencaj ideoj pri projekto por novtype laŭtema vortaro. En: Scienca Revuo 1978:3, p. 135-142.
— **1980**: Kordylewski, Leszek. En: HdE 1980:8.
— **1981**: Waringhien, G. Helpo de granda valoro. En: Esperanto [UEA] 1981:10, p. 171-172.
Unua Represo Ascoli Piceno: Gabrielli (Marto) **1982**, 142 p. — 100 ekz.

- IEMW.
- 1986 **Mariano**, Michele. *Sisteme Ordigita Vortaro*. Parizo: Lina Gabrielli 1986. 526 p. — Horizontala grandformato. Tajpita. Siglo **SOV**. Serio: Plejado - Scienca eldon-serio 3. Laŭtema aranĝo de PIV 1970 per tabeloj.
- 1992 **Eichholz**, Rüdiger (red.). *Plena Pekoteko* — Vd. en ĉap. 2 „Difinvortaroj“.
- 1999 **Walker**, Bill (komp.). *General Certificate of Secondary Education – GCSE*. Esperanto-Angla Vortlisto. 1999. — Detalojn vd. Parto 2, Tradukvortaroj – Angla.
- 2011 **UDC Summary**. [Resumo de Universala Decimala Klasifiko en esperanta traduko]. Hago: UDC Consortium 2011. — En la retejo de udcc.org. La UDK-resumo enhavas ĉ. 2600 klasojn el entute pli ol 70.000. La (kompleta) esperanta traduko estas unu el pli ol 50 (kompletaj aŭ partaj) tradukoj al aliaj lingvoj. Eblas peti de udcs@udcc.org unu- aŭ plurlingvajn eldonojn de la resumo. Spec. (el la klaso „juro“):
- 3 SOCIAJ SCIENCOJ
 34 Juro. Jurisprudenco. Leĝoj
 347 Civila Juro
 347.2 Leĝaro pri nemoveblaĵoj. Rajtoj rilate nemoveblaĵojn. Aĵoj. Moveblaj posedaĵoj.
 Inkluzivas: Bienojn, posedaĵojn

8. Bildvortaroj – Bildwörterbücher – Pictorial Dictionaries

Superrigardo:

— **2013**: Desespero (ps.). Al la vorto tra la bildo. En: Ipernity (2013-02-09).

Aparte duba kaj diskutebla estas la distingo inter ĝeneraltemaj bild-vortaroj kun *konsultocelo* (ofte kun indekso) kaj *lernolibroj*, uzantaj aparte multajn bildojn *instrucele*. Okaze ambaŭ celoj miksiĝas kaj restas nur la – eble subjektiva impresio – pri la ĉefa celo. Konforme al la ĝenerale vasta kompreno de la nocio *vortaro*, uzata de BKB, estas notitaj ankaŭ tiaj verkoj, kiujn oni povas *ankaŭ* uzi kiel bildvortaron (ekz. la „bildkurson“ „Ĉu vi parolas tendare?“, 1974, vd. malsupre).

Terminaroj de *unuopaj fakoj* ofte ankaŭ uzas bildojn por klarigi nociojn. Ilin oni serĉu en Parto 3 ĉe la responda fako (ekz. la verkojn „Bildlibro pri bestoj“ aŭ „Ĉinaj protektataj bestoj“ en la ĉapitro „zoologio“).

ĉ **Delmas**, G[abriel] (1861-?) [W]; **Rochelle**, E[rnest] [ed.]; **Poissonier**, 1907 E[mile] (ilustr.); **Beaufront**, L[ouis] de [trad.]. *Delmas'aj helpaj bildoj por la praktika instruado de l' modernaj lingvoj per bildaro*. Bordeaux: Association Bordelaise por la Propagando de la Fremdaj Lingvoj [k.a.], s.j. [ĉ. 1907].

1a vol. Bildoj 1 ĝis 6. [8], [8] p.; — 35x24 cm.

2a vol. Bildoj 7 ĝis 16. [12], [12] p. — 35x24 cm. Foto (titolo). Foto (urbo, fervojo)

Traduko de la franca *Tableaux Auxiliaires Delmas pour l'Enseignement pratique des Langues vivantes par l'image*. Bordeaux 1903. Ekzistas ankaŭ tradukoj en germana, angla, hispana, itala, rusa kaj „flandra“.

ĉ. **Beaufront**, L[ouis] de [trad.]. *Klariga libreto de l' "Delmas'aj helpaj bildoj" - por la praktika instruado de l' modernaj lingvoj per la senpera metodo kaj bildaro*. Bordeaux: Delmas, s.j. 108 p. — Foto (titolo). Foto (bildo 4). Traduko de la franca *Livret explicatif des Tableaux auxiliaires Delmas pour l'enseignement pratique des langues vivantes par la méthode directe et par*

- l'image*. Bordeaux: G. Delmas, 1903, 90 p. — in-16.
- 1919 **Goldschmidt**, Thora; **Dietterle**, Johannes (1866-1942) [trad.]. Bildotabuloj por la instruado de Esperanto. 36 bildoj kun klariganta teksto, ekzercoj, ekzemploj kaj gravaj aldonoj (Fundamenta gramatiko kaj *Ekzercaro* de D-ro Zamenhof, nonsistemaj tabeloj kaj Esperantaj dokumentoj). La 36 bildoj okupas la maldekstrajn paĝojn. Sur la dekstraj aperas dialogoj kaj demandoj pri la traktataj temoj.
[1a eld] Leipzig: Hirt **1919**. 103 p.
2a kor. eld. Leipzig: Hirt **1921**. 103 p.
3a kor. eld. Leipzig: Hirt **1923**. 103 p. — Rec.:
 — **2009**: Bernardo. Mufo, banto, kurfeto, franĝo En: *Ipernity* (2009-01-21). — Kun bildoj.
 — **2013**: Desespero (ps.). Al la vorto tra la bildo. En: *Ipernity* (2013-02-09). — Kun bildoj.
- 1932 **Benson** 1932. Vd. Sekcion Ĝ: Multlingvaj Vortaroj Ĝeneralaj.
- ĉ. **Eichholz**, Rüdiger [red.] (1922-2000) [W]. Esperanta Bildvortaro. 1a eld. en presprovaĵa formo. Mississauga (Ont.): Esperanto press. s.j. [ĉ. 1970]. — Nur jam ĉ. duono de la ĉ. 25.000 kapvortoj tradukitaj. Kun tri cirkuleroj per kiuj la laboroj estis kunordigitaj. Rec.:
 — **1971**: Ab [= Bormann, Arthur]. En: *IIS* 1971/1, p. 17.
- 1974 **Corsetti**, Renato; **La Torre**, Mauro. Ĉu vi parolas tendare?. Bildkurso por labortendaroj. Rotterdam: Tutmonda Esperantista Junulara Organizo [TEJO] 1974. 3, [64], 25 p. — A5-broŝ. Malgranda enkonduko en baza esperanta frazaro klarigita per desegnaĵoj; p. [58]-[64] perbilde klarigas laborilojn kiel segilo, tranĉilo, hakilo, tondilo k.t.p. Sen indekso.
- 1979 **Watts**, Tony R. **Praktika bildvortaro de Esperanto**. Oxford, Oxford University Press, 1979. 96 p. — pr. C.J. Mason & Son Ltd, Bristol. 23 x 15 cm. Tradukinto ne konata. Laŭtema bildvortaro bazita sur la angla Oxford English Picture Dictionary kun ĉ. 1.500 kapvortoj surbaze de PIV 1970 kaj ĉ. 600 ilus. Ne-PIV-aj vortoj notitaj kun fontoj en p. 85. Foto (titolo). Foto (ĝinzo). Rec.:
 — **1979**: Waringhien, G. En: *Esperanto* [UEA] 1979:7-8, p. 129.
 — **1979**: Benczik, V. En: *Hungara Vivo* 1979:5, p. 195.
 — **1981**: Krause, E.-D. Praktika bildvortaro de Esperanto. En: *der esperantist* 1981:3, p. 70: „... praktika valoro eksterduba ... rezulto de [la] terminologia laboro ... konvinka“.
 — **2011**: Bernardo: Pantalonoj el Ĝenovo. En: *Ipernity* (2011-05-08).
- 1988 **Eichholz**, Rüdiger [red.] (1922-2000) [W]. Esperanta Bildvortaro. Bailieboro (Ont.): Esperanto Press, **1988**. 880 p. 368 ilus. — 20 x 13 cm. ISBN 0-919186-32-7. Siglo: **EB**. Laŭtema bildvortaro kun ĉ. 25.000 kapvortoj surbaze de la 2a germana eld. 1958 (1a 1935).
2a kor. eld. Bailieboro (Ont.): Esperanto Press, **1989**. 880 p. 368 ilus. — 20 x 13 cm. Preskaŭ identa kun la 1a eld. 1988, korektitaj nur terminoj 225/62 kaj 212/64.
Repr. 2012 de la 1a eld. 1988 kiel netraserĉebla bild-pdf (50,3 mb, 2012-02-02), rete elŝutebla. Rec.:
 — **1988**: N.i. Jen la bildvortaro kiu klarigas la tutan mondon. [Pri Eichholz, R. Esperanta Bildvortaro. Bailieboro 1988]. En: *Monato* 1988:09:06, p. 25.
 — **1988-1990**: Farjon de Lagatinerie, Jacques-Franky. Post dudekkvarjara gravedeco... En: *Akademias Studoj*. Bailieboro, Ont. Vol. 1988-1990. p. 334-340.
 — **1988-1990**: Krause, Erich-Dieter. Grandioza verko por la praktika esperantisto. En: *Akademias Studoj*. Bailieboro, Ont. Vol. 1988-1990. p. 333.
 — **1991**: Vaitilavičius, Adomas La bovuno kornobatas Esperanton, se la prezidantuno ne defendos ... En: *Litova Stelo* 1991/2 (78), p.16-18: Kontraŭ -un kaj -uk, proponitaj en EB. Kontraŭ -j por ŝtatnomoj.
 — **1994**: Pabst, Bernhard. Bildvortaro premiita. Nova eldono preparata. En: *Esperanto*

- Aktuell 1994/8, p. 5: IEK atribuis OSIEK-premion 1994 al Esperanta Bildvortaro; Eichholz planas novan eldonon kaj alvokas al kunlaboro. Mallongigita versio en Terminoteko 1995:5:1 (11), p. 23-25.
- **1994**: Zilah, Eugène De. En: Gazeto 1994:9:5.
- **1995**: Pabst, Bernhard. Ĉu vi jam scias pri vortaroj, ke ... [Pri planita, tamen ne aperinta nova eldono de EB]. En: Gazeto 56 (31-Jan-1995), p. 31: Noto pri la preparlaboroj por nova eldono de la Bildvortaro (EB2), alvoko al kunlaboro.
- 1990 **Vukov**, Peter. Esperanto-14lingva speleologia bildvortaro. Kaposvár: Gajaj Migrantoj; Somogy Departementa Esperanto-Asocio, 30 p. — 3 ilustr. 83 esperantaj terminoj, tradukitaj al la lingvoj germana, ĉeĥa, angla, hispana, franca, itala, hungara, litova, portugala, rumana, rusa, sveda, slovakaj kaj slovena.
- 1991 **Chaves**, Sylla (1929-2009) [W]. Originala Esperanta bildvortaro [W]. [1a eld.] São Paulo: Esperanto-Asocio de São Paulo, **1991**. sen paĝo-numeroj. — 21 cm = A5-broŝ. ilustr. Foto. Vortoj bildigitaj sur 92 ilustritaj paĝoj. Pli ol 3.000 kapvortoj.
Repr. São Paulo: Esperanto-Asocio de San-Paŭlo **1993**. 170 p. — Foto kaj priskribo. Rec.:
— **1993**: Mac Gill, Stefan. Kategorie studi. Chaves, Sylla. Originala Ea bildvortaro. Sao Paulo: E-Asocio 1991. En: Esperanto (UEA) 1993:6, p. 112-113.
— Bernardo. Chaves, Bildvortaro 1991-1993. En Ipernity.
- 1994 **Amery**, Heather; **Cartwright**, Stephen (1947-2004) [ilus.]; **Grimley Evans**, Edmund [trad. al Esperanto] (ĉ. 1970-) [W]. Mil unuaj vortoj en Esperanto. Stoke-on-Trent: s.n. [Esperanto-Asocio de Britio], 1994, 63 p. —
Repr. **2004**, 63 p. — Foto (titolo). Pliaj Fotoj.
- 1995 **Dazun**, Edmond (1910-2001) [W]. **Andrieu**, André (1932-?) [W]. Sin Nutri en la Naturo. Beauville: Amika Esperanto-Rondo, 1995. 223 p. — Klarigoj pri manĝeblaj (kaj venenaj) plantoj kun multaj desegnoj de la priskribitaj plantoj. Kun „Latin-Esperanta Leksikono“, t.e. indekso alfabeto ordigita laŭ la scienc-latina. Spec.:
PADUSO = grapolĉerizujo (*Prunus padus*). Migdalaco. Arbedo. La fruktoj, nigraj, pizograndaj, estas ne tute bongustaj sed manĝeblaj.
PAPAŬO (*Asimina triloba*). Anonaco. Malgranda arbo. Originas el sudorienta Nordameriko. Produktas flavajn fruktojn, kiuj estas manĝataj pro sia parfumeo aroma, sukplena karno.
- 2012 **Desmet**’, Petro (1934-) [W]; **Horvath**, Jozefo (1949-) [W]. Bildvortaro. Antverpeno: Flandra Esperanto-Ligo [FEL] 2012. 800 p. — ISBN 978 90 77066 48 5. Surbaze de „DUDEN – Das Bildwörterbuch“ 6a rev. germana eld. Mannheim 2005. Siglo: **EB**.
Indekso 2012-02, 156, 2 p. — A4 kaj supl. de 2 p. ne kunbindita, sed aparte elŝutenda de la retejo de FEL kiel traserĉebla pdf de 1,3 mb. Spec. Rec.:
— **2010**: Smedt, Petro de; Bernardo [t.e. Bernhard Pabst]. Hundo bonrasa estas bona por ĉaso. En: Ipernity (2010-06-14): Pri hundorasoj en EB.

9. Inversaj kaj Rimvortaroj – Rückläufige und Reimwörterbücher - Reverse and Rhyming Dictionaries

Superrigardo pri la vortaro-speco:

- **2009**: Bernardo. Dorse antaŭen ni rajdas sur delfeno inverse tra l’ vortaro. En: Ipernity (2009-04-01). — Kun fotoj de la vortaroj de Rhodes, Parisot /Cart, Parnasa Gvidlibro, Pabst.
- 1904 **Kolowrat**, G[eorges]. Rimoj en Esperanto. St.-Peterburgo: [G. Kolowrat], 1904. 8 p. — 23x14 cm.

- 1905 **Rhodes**, Joseph (1856-1920) [W]. Vortaro de Esperantaj rimoj. Manlibreto por la farado de Esperantaj versaĵoj. Keighley: "The Esperanto Society", 1905. 23, [1] p. — pr. Ogden & Shuttleworth, Keighley. 20x13 cm. ĉ. 5.000 radikoj.
2a eld. (repr.) Saarbrücken: Artur E. Iltis, **1984**. 23 p. — 21 cm = A5-broŝ. Foto. Jubilea Eldon-serio III. Esperantologio 9.
- 1909 **Parisot**, J.; **Cart**, Th[éophile] (1855-1931) [W]. Esperanta rimaro. En: Esperanta versfarado kaj rimaro laŭ verkoj de d-ro Zamenhof kaj aliaj aŭtoroj.
2a eld. Paris: Presa Esperantista Societo, **1909**. p. 17-41 [de 41, [2] p. entute]. — pr. Centra Presejo Esperantista V. Polgar-Politzer, Paris. 19x13 cm.
3a eld. (repr. de la 2a eld. Paris 1909) Saarbrücken: Iltis **1990**. — ISBN 3 927613 14 2. Iltis-Serioj III. Esperantologio 5. — Rec.:
 — **1992: Thierry**, Jean. Schwartz multe uzis ĝin. Paul Parizot [? tiel!], Théophile Cart: Esperanta versfarado kaj rimaro. En: Iltis-Forumo 1992, n. 4, p. 24.
 Spec.:
OS
 -os.
 ĥaos
 ambos
 fos
 azigos
 kokos
 flos
 glos
 hipoglos
 kolos
 ŝlos
 k.t.p.
- 1918 **Avoto** [pseŭd. de Alexander William **Thomson**] (1896-1982) [W]. Rimvortaro Esperanta. London: Brita Esperantista Asocio, 1918. v, [1], 34 p — pr. Garden City Press Ltd, Letchworth. 14x11 cm. 5.412 rimoj. — Rec.:
 — **1934: Polo**, Marko [ps.]. Rimvortaro Esperanta de Avoto. En: Oomoto 10a jaro 1934, n-ro 10 (110), p 33: „La snobaj neologismoj kaj ankaŭ la pornografiaj esprimoj mankas el [!] ĝi, sekve ĝi estas fidinda helplibro por tiu, kiu volas verki sanajn poemojn.“
- 1929 **Jaumotte**, Maur[ice] (1899-1970) [W]. Kompleta Esperanta rimvortaro. En: "Belga Esperantisto" Jun./dec. 1929. Antverpeno. 1929 n-ro: 172 p. 119-124 - 174 p. 140-145 - 175 p. 164-169 - 176 p 184-189 - 177 p. 204-209, 178 p. 224-229.
2a rev. plil. eld.: 1930. Antverpeno: Belga Esperanto-Instituto. 70, [2] p. — 16x10 cm. broŝ. 2a eld. kompletigita per pli ol 400 pliaj vortoj. Inverse ordigita laŭ silaboj, ekz. „orv“, „os“, „osk“, „osm“, „ost“ k.t.p. Spec.:
OSTR
 ostr
 klostr
 rostr
- OŜ**
 galoŝ
 kloŝ
 poŝ
 broŝ
 groŝ
- 1932 **Kalocsay**, K[álmán] (1891-1976) [W]; **Waringhien**, G[aston] (1901-1991) [W]. Poezia fakvortaro. En: Kiel fariĝi poeto aŭ **Parnasa gvidlibro**.

- Budapest: Literatura Mondo, 1932, p. 157-175 [de 176 p. entute]. — 19x13 cm. Vortaro de poeziaj vortoj kun difinoj en Esperanto.
- 1932 **Waringhien**, G[aston] (1901-1991) [W]. Esperanta rimaro. En: Kiel fariĝi poeto aŭ **Parnasa gvidlibro**. Budapest: Literatura mondo, 1932, p. 91-155 [de 176 p. entute]. — 19x13 cm.
2a rev. plil. eld. rev. R[oger] **Bernard**. Warszawa: Pola Esperanto-Asocio en kunlaboro kun “Heroldo de Esperanto”. **1968**. 157, [2] p. — 20x15 cm.
3a rev. eld. Pisa/Madrid: Edistudio/Heroldo de Esperanto, **1984**. 207, [1] p. — pr. Technostampa, Pisa. 21x15 cm.
- 1972 **Schlueter**, Klaus. Inversa vortaro de Esperanto laŭ la 6a eldono de Plena vortaro de Esperanto kun suplemento. Nürnberg: Ludwig Pickel, 1972. [4], 35, [1] p. — 21x15 cm = A5-broŝ. 7.883 radikoj. La unua per komputilo, helpe de trukartoj, farita inversa vortaro de Esperanto. Kutima mallongigo **IV**. — Rec.:
— **1969**: N.I. „Inversa Vortaro“ prespreta - kompilita per IBM-komputilo. En: Heroldo de Esperanto 1969, n-ro 5, p. 3.
- 1987 **Cooley**, Jonathan. Esperanta rimvortaro. Egham: 1987. 79 p. — 21 cm = A5-broŝ. ĉ. 20.000 vortoj.
- 1989 **Pabst**, Bernhard (1960-) [W]. Inversa vortaro de Esperanto. Paderborno: 1989. 22, 91 p. — 21 cm = A5-broŝ. **Foto**. Vortaro (vortlisto) ordiganta ĉiujn kapvortojn de PIV 1970, PIVS 1987 kaj Esperanta Bildvortaro 1988 laŭ inversa sinsekvo de literoj ek de la lasta de la radikoj. Kun tri aldonoj, i.a. oftec-statistiko de literoj. En 2014 ankoraŭ la plej ampleksa siaspeca. Kutima mallongigo **IVE**. e-versio (IBM, DOS) ne publikigita. — Rec.:
— **1989**: **Eichholz**, Rüdiger. „Inversa Vortaro de Esperanto“ de Bernhard Pabst. En: Lumo [Kanado] 1989, aŭtuno, p. 28-29 (repr. el Fokuso (Budapest) n. 8). Plia repr. en: Akademijaj Studoj 1988-90, p. 331-332.
- 1989 **Vatré**, Henri (1908-1998) [W]. Rimaro. En. Neologisma Glosaro. Postrikolto al PIV.
3a eld. Saarbrücken: Iltis **1989**, p. 73-87.
- 2003 **Hilland**, Josef; **MacGill**, Stefan. Inversa Vortaro Kolumne. s.l. 2003. [26 p.]. — A4. **Rete** konsultebla pdf (ĉ. 160 kb, 2003-04-24). Nur majuskle skribitaj radikoj, ordigitaj laŭ radikfino. Korpuso ne specifigita (ĉu Schlüter 1972 do PV 1934?). Spec. (komenco de lit. P):
ĈAP
GAP
KAP
HANDIKAP
ESKAP
UZUKAP
LAP
KLAP
MAP
- 2010 **Inversa Indekso**. En: Reta Vortaro [ReVo]. ĉ. 2010. — Programa rutino, kiu ordigas la kapvortojn de ReVo alfabete laŭ la radikfino. Kontinue kreskas kun la kresko de ReVo. Specimeno je 2014-02-05, komenco de litero P:
ĉap/o - keĉap/o - gap/i - agap/o - kap/o - handikap/i - eskap/i - uzukap/i - lap/o - klap/o - map/o - nap/o - k.t.p.
- 2010 **Esperanto Rhyming Dictionary**. s.j. [ĉ. 2010 aŭ pli malfrue]. — Adapto de inversiga programo al Esperanto. Paralelaj eldonoj en multaj lingvoj, angla, germana, k.t.p. Senkoste **rete** uzebla datumbazo laŭ h-konvencio. Korpuso ne eksplacita. Ĝi enhavas kunmetitajn vortojn el pluraj radikoj plus vortkategoria finaĵo. Resendo de la rezulto laŭ la kutima malinversa alfabeto

ordo, do laŭ la vort-komenco. Resendo ofte sen la diakritaj literoj (*jeti* anstataŭ ĝuste *ĵeti* aŭ *jheti*). Spec.:

Serĉante rimojn je „chapo“ (aŭ ĉapo) oni difinu la nombron de la rimantaj finaj literoj, inkluzive de la vortkategoria vokalo (do chapo, ne chap). Se oni elektas la minimumon „2“ la datumbazo resendas 205 radikojn je ~po. Se oni elektas „3“ estas jenaj 26 ~apo-vortoj: agapo, chapo, drapo, etapo, frapo, kanapo, kapo, klapo, kontraŭpapo, lapo, magnetkapo, mapo, napo, pafilkapo, [papo mankas!], rapo, sapo, satrapo, savklapo, sinapo, sparadrapo, sunfrapo, terkapo, trapo, uzukapo, vangofrapo, vertocapo.

10. Etimologiaj Vortaroj – Herkunftswörterbücher - Etymological Dictionaries

1907 **Bastien**, Louis. Naŭlingva Etimologia Leksikono de la Lingvo Esperanto. Paris: Presa Esperantista Societo, **1907**. xviii, 249 p. — 18x11 cm. 2.445 kapvortoj. Malgraŭ la nomo ne vere etimologia vortaro, sed komparaj tabeloj Esperanto → latina, franca, itala, hispana, portugala, germana, angla, rusa, kiuj montru la internaciecon kaj facilan lerneblecon de Esperanto por eŭropanoj. La rusa en la cirila alfabeto laŭ la malnova ortografio de antaŭ 1918.

Skanaĵo de **2014-12-16** en archive.org, elŝutebla i.a. kiel pdf. Rec.:

— **1908**: N.i. Naŭlingva Etimologia Leksikono. En: La Revuo 1908:2:6 (18), p. 300-301: "Tiuj tabeloj de S-o Bastien estas vere elokventaj." .. la kono de Eo estos la plej bona enkonduko al la lernado de ĉiuj lingvoj."

2a plil. eld. Rickmansworth: The Esperanto Publishing Company Ltd, **1950**. xvii, 317 p. — pr. Leicester Co-operative Printing Society Ltd, Leicester. 19x12 cm. 4.155 kapvortoj. Alie ol en la unua eld. la rusa nur en latinalfabeta transskribo. Spec.:

paco – pax - pacifique (*pacema*) – pace – paz – paz - Pazifist (*pacemulo*) - peace - -

pacienco – patientia – patience – pazienza – paciencia – paciência – Patient (*malsanulo*) –
patience – patient (*paciento*)

pacifismo - ...

paĉulo - - - - patchouli – pasciuli – pachuli – patchuli – Patschuli – patchuli - paĉuli

Rec.:

— **1951**: Middelkoop, Adrianna. [sen titolo]. En: Scienca Revuo 1951:3:3 (11), p. 116-117.

1925 **Migliorini**, Bruno (1896-1975) [W]. Kontribuaĵoj al Esperanta Etimologio. En: Itala Eo-Revuo 1925:12:11, p. 170-173: Repr. el Kataluna E-isto Aprilo 1925. Nur pri „komunaj (apelativaj) nomoj, kiuj devenas de propraj nomoj ...: personaj, lokaj aŭ gentaj“, de akademio, alabastro, armoniako ĝis verdirgro, vulkano, zuavo.

1955 **Azorin**, Francisko [Izquierdo] (1885-1975) [W]. Ilustrita vortaro de Esperanto kun bazo seslingva kaj etimologia de ĉiu radikvorto. Mexico: Editorial Stylo, 1955, lv A-K. xi, [5], 642 p. — 24-17 cm. Inkluzivas etimologie rilatajn vortojn en ses aliaj lingvoj. ĉ. 20.200 kapvortoj. 612 bildoj.

1982 **Carlevaro**, Tazio (1945-) [W]. Slipoj de etimologia vortaro de Esperanto. En: Planlingvistiko 1982:1:1, p. 1-2 kaj felietone daŭrigita de 1983 ĝis 1986:5:17.

1989 **Vilborg**, Ebbe (1926-) [W]. Etimologia Vortaro de Esperanto [EVE]. [ĉiuj vol.] Malmö: Eldona Societo Esperanto. — 24 cm.
vol. 1, 1989: A-D, 104 p. — ISBN 91-85288-17-9.
vol. 2, 1991: E-Ĵ, 114 p. — ISBN 91-85288-19-5.
vol. 3, 1993: K-M, 128 p. — ISBN 91-85288-21-7.
vol. 4, 1995: N-R, 124 p. — ISBN 91-85288-22-5.

vol. 5, 2001: S-Z, 196 p. — ISBN 91-85288-23-3.

La oficiala radikaro ĝis la 8a Oficiala Aldono 1974 (OA 9 de 2007 mankas), do ĉ. 4800 eroj, kun indikoj pri la unua aŭ almenaŭ plej frua, konstatebla apero, parencaj vortoj en sep etnaj lingvoj kaj ekvivalentoj en kvar planlingvoj (ĉefe Ido kaj Interlingua) plus skizo de la praorigino kun postaj ŝanĝoj; aparta sekcio pri morfologigaj elementoj kaj afiksoj en vol. 5. Alfabeto ordigita laŭ la esperantaj vortoj kun franca, angla, germana, hispana, rusa, pola, okaze sveda tradukoj, nelatinaj alfabetoj (rusa) nur transskribitaj al latina. La fokuso estas sur la lasta transira paŝo de nacia(j) lingvo(j) al esperanta formo kaj signifo. Kun abunda diskuto de la etimologia faka literaturo. La prahistorio de etimo nur supraĵe (ofte nur ĝis la latina aŭ antikva greka). La unuaj aŭ plej fruaj uzoj de radikoj el OA 9, do parta daŭrigo, nun en Pabst, Berlina Komentario pri la Fundamento de Esperanto, 2014. Fono:

— **1986:** Vilborg, Ebbe. Etimologia vortaro de Esperanto: diverĝa opinio. En: Filologo 1986:31-32 (Dec.), p. 5.

— **1997:** N.i. Etimologia Vortaro de Esperanto. En: Esperanto Aktuell 1997:2-3, p. 15: Anoncas aperon de la kvina (kaj lasta) parto de EVE por aŭtuno 1997.

Rec.:

— **1994:** Broadribb, Donald. Etimoj nepre konsultindaj. [Pri Vilborg, E. Etimologia vortaro de Eo. Vol.2-3. Malmö 1991-93]. En: Esperanto [UEA] 1994, p. 173: Kun foto de Vilborg. „gravega aldono al la e-ologio, kaj nepre konsultinda“.

— **2003:** Brosch, Cyril. La Etimologia Vortaro de Vilborg. [Pri Vilborg, Ebbe. Etimologia Vortaro de Eo, vol. 1-5, Malmö 1989-2001]. Esperanto Aktuell 2003:22:03, p. 20.

1990 **Yamasaki Seikô (1929-) [W].** Etimologia vortareto pragmata de Esperanto. Mallongigita eldono. Tokio: 1990. 132 p. — 21 cm = A5-broŝ. Mallongigita eld. de Etimologia vortaro pragmata de Esperanto 1991.

1991 **Yamasaki Seikô (1929-) [W].** Etimologia vortaro pragmata de Esperanto. Nemallongigita eldono. Tokio: Libroteko Tokio, 1991. 250 p. — 26x18 cm broŝ. Ampleksigo de Yamasaki 1990, enhavas la bazajn oficialajn radikojn de la Akademio kaj la vortojn listigitajn en la vortaro Esperanta-japana de Nukina-Miyamoto. Malgraŭ la nomo ne vere etimologia vortaro, sed lernilo por ĉefe japanoj: La – ofte nur anglaj – ekvivalentoj helpu al ili memori la esperantaj vortojn. Spec.:

pac/o [A peace, H paz [prononc-indiko], It pace [prononc-indiko], < L pax, pac- >A pacify. V. Pacifiko, pagi]

pacien/a [A pacience < L patienta < passio + -enco]

pacien/i/o [!? tiel] [F patience]

patient/o [A patient < L pat-i suferi (vidu pacienca, passio) + -ent]

Rec.:

— **1992:** Gotô, Hitosi. [sen titolo]: En: La movado 1992/7: „komplete senutila“.

— **1992:** Kamaço, Georgo. [sen titolo]. En: Fonto 1992:4.

— **1993:** Hall, Adrian. Informbudo kaj bombonejo. [Pri: **1.** Yamasaki, Seikô. Etimologia Vortareto Pragmata. Tokio 1991; **2.** Cherpillod, André. Mil ekzotaj vortoj. Courgenard 1992]. En: Esperanto (UEA) 1993:6: Pri 1: „Eo-angla vortaro etimologieta“. Pri 2: „gemo, pli ĝuste gemaro“.

Jaraj suplementaj eldonoj kiel apartaj A5-broŝ., ĉiuj ĉe Libroteko Tokio

1a eld. 1991 [?]

2a eld. 1992 [?]

3a eld. 1993 [?]

4a eld. 1994, 13 p.

5a eld. 1995 [?]

6a eld. 1997, 31 p.

7a eld. 1998, 48, iv p. — Spec.:

- Pacifik/o** (BRO) [IV: A *Pacific*: *pacifika* paca, pacfara < *pac/o* + -IFIK/I. V. *pacifism/o*, *pacifist/o*]
 8a eld.
 9a eld.
 10a eld. 2004, viii, 167, vii p. — 21x15 cm.
- 1992 **Cherpillod**, André (1939-) [W]. Mil ekzotaj vortoj. La etimo de 1250 esperantaj vortoj de ekstereŭropa deveno. Courgenard: aŭtoro 1992. 122 p. — 21 cm = A5-broŝ. Etimologia vortaro de ĉ. 1.250 vortoj, kies etimoj venas ĉefe el araba, hungara, japana, turka k.a. lingvoj. Spec. (komenco de litero P):
- paĉulo**. La angla-franca **patchouli** venas, tra la hindia [originala skribo] *paĉoli*, de la tamula [originala skribo] *paĉa* „verdiĝi“ kaj [originala skribo] *ilai* „folio“.
- pagajo**. Larĝapedala remilo. La franca **pagaie** venas de la indonezia **pengayoeh**, vorto uzata en la Molukoj.
Angla → ĉina, franca, hispana, itala, portugala, rumana, germana, nederlanda, sveda, dana, norvega, pola, ĉeĥa, serbokroata, hungara, finna, turka, indonezia, Esperanto, rusa, greka, araba, hebrea, jida, japana, svahila.

2009 **Manhitu**, Yohanes (ed.). Multlingva frazlibro. Roterdamo: Oceania Komisiono de UEA, 2009 [?], 143 p. — 21 cm = A5-broŝ. Foto. Centoj da esprimoj grupigitaj laŭ temoj, en jenaj lingvoj:

Esperanto → indonezia, davana, tetuma, kupanga, angla, franca, hispana, portugala.

Parto 3: Terminaroj –

Teil 3: Terminologien –

Part 3: Terminologies

Averto – Hinweis – Warning

Pro tempomanko en Parto 3 ankoraŭ **mankas** konsiderinda nombro de (ĉefe lasta-tempaj, elektronikaj) terminaroj. Ni antaŭdankas pro indikoj pri lia kompletigo al la kontakt-adreso en la kolofono.

Aus Zeitgründen **fehlen** im Teil 3 noch eine signifikante Anzahl (hauptsächlich jüngerer, digitaler) Terminologien. Wir danken im Voraus für Hinweise zur Vollständigkeit an die Kontaktadresse im Impressum.

Due to lack of time, a significant number of (mainly recent, digital) terminologies are **still not registered** in this Part 3. We express our gratitude for any indications on missing works which should be sent to the contact address noted in the imprint.

1. Serie kaj grupe aperintaj terminaroj

1.1 Jarlibroj de IEL / UEA, dua parto (1941-1962)

Inter 1942 kaj 1962 aperis en la „dua parto“ de la jarlibroj de Internacia Esperanto-Ligo (IEL) kaj poste en tiuj de Universala Esperanto-Asocio (UEA) jenaj terminaroj, prepare al plivastigo de PV 1930/1934 kaj transiro al PIV 1970. Preskaŭ ĉiuj intertempe ekzistas kiel rete konsulteblaj skanaĵoj ĉe www.eventoj.hu/steb. Detalojn vd. en la laŭfaka listo.

- 1941 Aeronautika terminaro
- 1942 Terminaro por infan-ludoj
- 1944 Muzika Terminaro
- 1947 Kudra kaj Trika Terminaro
- 1949 Marista Terminaro, unua parto
- 1950 Marista Terminaro, dua parto
- 1954 Matematika Terminaro
- 1958 Gastronomia Terminaro: <http://www.ipernity.com/blog/37943/137676>
- 1959 Teknika Terminaro pri Ŝoseoj kaj Pontoj
- 1961 Meteorologia Terminaro [tiel! legu prefere „Meteorologia Terminaro“]
- 1962 Esperanta Morsa Kodo

1.2 Per-komputora termino-kolekto (Pekoteko 1985-1994)

„Pekoteko“ estis sistemo por registri kaj diskuti esperantigojn de nocioj. Ĝin evoluigis Rüdiger Eichholz (1922-2000) surbaze de la skribprogramo *WordPerfect 4.2* en 1985. Ĉefaj kunlaborintoj estis Bernhard Eichkorn (plantnomoj), Bernhard Pabst (juro kaj neologismoj ĝenerale) kaj Edward Spitaels (elektronikaj muzik-instrumentoj). Per Pekoteko estis daŭrigita priterminaj diskutoj per helik-poŝta interŝanĝo de komputilaj disketoj, diskutoj, kiuj antaŭe okazis per la tajpita, paperforma Slipara Vortaro (SV). *Plena Pekoteko* (PP 1992) estas libroforma eldono de la terminaraj diskutoj kaj rezultoj inter 1985 kaj 1990(tri vol. kun kune 1816 p.). Krom kaj ekster la plena kolekto aperis pluraj terminaroj kaj labor-dokumentoj uzantaj la sistemon, vd. malsupre. La strukturo de Pekoteko estis jena:

xxx

Broŝurforme aperis jenaj verkoj laŭ la sistemo Pekoteko (1987 en formato A4, ĉiuj postaj en formato A5):

1987	Komputikaj terminoj (labor-dokumento)
1989	Juraj terminoj (labor-dokumento).
1990	Pekoteko-nocioj 85/001-85/486 (ĉefe hidraŭliko, terminologio, komputiko)
1990	Pekoteko-nocioj 86/001-86/199 (ĉefe terminologio, komputiko)
1990	Pekoteko-nocioj 87/001-87/691 (Novaj terminoj el la Esperanta Bildvortaro)
1990	Pekoteko-nocioj 88/001-88/448 (Dokumentado)
1990	Pekoteko-nocioj 89/001-89/338 (Dokumentado)
1990	Elektronikaj muzik-instrumentoj (labor-dokumento)
1992	Plena Pekoteko 85-90. 3 vol. kun kune 1816 p., vd. Parton 1, ĉap. 3.

Evoluo de Pekoteko 1985-1989

Jaro	Nombro de registraĵoj	Kilobajtoj
1985	486	120
1986	670	240
1987	1100	310
1988	1630	631
1989	3500	1 500

Pluraj terminaroj estis transformitaj al la formato de Pekoteko, ekz. la Biblioteka Terminaro de Portmann 1989, (parte) la Ne-PIV-aj Vortoj de Cherpillod 1988.

Ekster Pekoteko, kun nur malmulte modifita aranĝo, aperis la terminaroj de plantnomoj de la Rondo de Esperantaj Flaŭristoj (REF), gvidata de Bernhard Eichkorn, vd. tuj sekve je 1.3.

Post la apero de PP 1992 la agado en kadro de Pekoteko ekstagnis pro diversaj kialoj (morto de Spitaels, agado de Eichholz por MEVo (vd. tuj malsupre 1.4), agado por revizio de PIV 1970, transiro al pli moderna programaro, komenco de reta kunlaboro k.a.). Meze

1.3 Terminaroj de Plantnomoj (REF)

La terminaroj de plantnomoj de la Rondo de Esperantaj Flaŭristoj (REF), gvidata de Bernhard Eichkorn, baziĝas sur la sistemo de Pekoteko (vd. supre je 1.2), tamen uzis *WordPerfect 5*. Priskribo estas ankoraŭ verkinda.

1.4 Multlingvaj Elektronikaj Vortaregoj (MEVo 1990-1995)

MEVo estis la lasta projekto de Rüdiger Eichholz (1922-2000).

2. Terminaroj laŭ fakoj – Terminologien nach Sachgebieten – Terminologies according to subjects

Aeronaŭtiko – Luftfahrt - Aviation

- 1913 **Armon**, R., d’; **Archdeacon**, Ernest [trad. al Esperanto] (1863-1950) [W]. Lexique Aéronautique en 6 langues: français, anglais, allemand, espagnol, italien, Esperanto. Paris: [1913]. 212 p. — 18x13 cm. Rec.: — 1929 BIL 3179: „Novaĵoj: areo, ĉanĝi, junto, keĵlo, konekti, kuplo, mapo, stifto“. Franca → angla, germana, hispana, itala, Esperanto
- 1941 **Durrant**, E[rnest] D[onald]. Aeronaŭtika terminaro. En: IEL-jarlibro 1941 Dua Parto. Rickmansworth: Internacia Esperanto-Ligo, 1941. p. 17-52 (= 36 p.

kaj 3 ilus. sur p. 50-52). — pr. Sumfield & Day Ltd, Eastbourne. 15x12 cm. Ĉ. 275 sisteme ordigitaj esperantaj terminoj kun difinoj en Esperanto kaj tradukoj al la angla, sen indeksoj.

Skanaĵo kiel traserĉebla pdf (2,5 mb) de 2013-12-20 konsultebla en STEB.
Spec.:

Supersona rapido – Rapido pli granda ol la rapido de sono en fluido. (*Supersonic speed*).

Vortico – Fluida turnaĵo kun rotacia moviĝo. (*Vortex*). **Linia vortico**, **postkorpa vortico**, **lamena vortico**.

Esperanto → angla

1948 **Turner**, Fred. Aeronautika terminaro sveda-Esperanta. Stockholm: Teknika sekcio de Sveda Esperanto-Federacio, 1948. IV p. 5 ilus. — 30x21 cm.

Sveda → Esperanto

2002 **Ledon**, Gilbert R. (1931-2003) [W]. Aviada terminaro. 1000 Terminoj. 23 ilustraj platoj. Aeronautika vortaro angla – esperanta. 4000 esprimoj en 13 laŭtemaj ĉapitroj. Baza aviada frazeologio. Chapecó- SC: Fonto 2002, 287 p. — 21x14 cm. Kvar verkoj en unu volumo: 1. La terminaro enhavas 1000 esperantajn terminojn kun difinoj; 2. La platoj estas kvazaŭ bildvortaro de aeronautikaj terminoj; 3. La vortaro estas dulingva terminaro; 4. La nuresperanta frazeologio enhavas la ĉefajn frazojn por komunikado inter aviadilo kaj kontrolo.

Angla → Esperanto

Alpismo – Alpinismus - Alpinism

Vd. je / siehe / see Sporto.

Arkitekturo kaj Konstrutekniko – Architektur und Konstruktionstechnik – Architecture and Construction

1932 **Azorin**, Francisko [Izquierdo] (1895-1975) [W]. Universala terminologio de la arkitekturo (arkeologio, arto, konstruo k. metio). Madrid: Presejo Chulilla y Angel, 1932. 215 p. — 20x14 cm. ĉ. 2.000 ilustr. Vortaro arkitektura kun difinoj en Esperanto. ĉ. 2.000 kapvortoj.

Esperanto → sanskrita, greka, latina, gota, araba, hebrea, hispana, portugala, itala, franca, angla, germana, rusa, pola, sveda

ĉ. **Broise**, A[uguste] (1901-1974) [W]. Glossary of highway engineering terms.

1955 Inĝeniera terminaro pri ŝose-konstruo. s.l.: s.j. 41 folioj. — Ŝajne unikaĵo en IEMW.

1957 **Broise**, A[uguste] (1901-1974) [W]. Teknika leksikono pri vojo. Longué: 1957. 98 folioj. — Ŝajne unikaĵo en IEMW.

1958 **Moberg**, K. J. [W]. Byggnadsteknisk ordlista svenska-esperanto m.fl. språk. [Konstruteknika terminaro sveda-esperanta kaj alilingva]. Konstruteknika terminaro. Malmö: Förslagsföreningen Esperanto, 1958. 99, [2] p. 2 ilus. — pr. Telestryrelsens Dupliceringsavdelning, Stockholm. 21x15 cm = A5-broŝ. tajpita. Serio: Teknika sekcio de Sveda Esperanto-Federacio – Terminaro 4. Unua parto tradukvortaro sveda → Esperanto kaj okaze pliaj lingvoj (p. 9-57), sen indeksoj. Dua parto konstruteknika terminaro kun difinoj en Esperanto laŭ la stilo de PV 1934, okazaj trad. al sveda, angla, franca, germana kaj aliaj lingvoj kaj okazaj ilustr. (p. 60-99). Sen indeksoj de la cellingvoj. Spec.:

packgarn – stupo.

packning – (ŝtop)garnaĵo. A. packing. Fn. tiiviste. G. Dichtung, Liderung, Packung.

packsten – ŝtonaro, batŝtono. (E)

pajloplato – Konstruoplato farita el kunpremita pajlo ĉe 180° C k premo de 3-4 tunoj havanta grandan izolemon kontraŭ malvarmo. Ĝi estas eĉ iom brulrezista. Sv. halmplatte, solomit.

palisa almetpeco – Vd. batŝtipo.

paliseti (tr) – Per latetoj, palisetoj, fostetoj ks. en la tereno fiksi konturon de konstruota entrepreno. A. lay-out. F. piqueter. G. Abstecung [tiel, legu: abstecken]. Sv. utsättning, sätta ut (631.5).

Sveda → Esperanto, angla, dana, franca, finna, germana, hispana, itala, nederlanda, pola, rusa k.a.

Esperanto → Sveda k.a. lingvoj

- 1959 **Broise**, A [uguste] (1901-1974) [W]. Teknika terminaro pri ŝoseoj kaj pontoj. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 1959. p. 101-268.— 15x12 cm. 67 ilus. Serio: UEA-jarlibro 1959. ĉ. 900 kapvortoj.

Esperanto → angla, franca, germana

- 2001 **Mook**, Fabien van. Terminareto pri ventolado en konstruaĵoj. Rete konsultebla 2001-2003. Sisteme ordigita. ĉ. 180 nocioj kun difinoj kaj terminaraj ekvivalentoj en Esperanto, nederlanda kaj angla. — Spec.:

Numero: 51

esperante **aera filtrilo**

esperante aparato por purigo de aero, kiu forigas precipe fluidajn kaj solidajn partikulojn de la aero

nederlande **luchtfilter**

angle **filter**

Esperanto → nederlanda, angla

- 2002 **Werner**, Jan (1933-) [W]. **Brandenburg**, Willi; **Mook**, Fabien van; **Obradović**, Đorđe; **Trojan**, Josef. Terminaro de Betono kaj de Betonistaj Laboroj. Brno 2002, 40 p. — A4. Foto. Sisteme laŭ klasoj (ligentoj, volumenaĵoj, k.t.p.) ordigita terminaro kun terminoj kaj difinoj en Esperanto, angla, germana kaj ĉeĥa, kelkaj en la nederlanda. Rete disponebla ekde 2001 (dekuma unikodo). 344 kapvortoj. — Spec.:

finatoro - ŝosea maŝino destinita por prilaboro de betonmiksaĵo (surmeto, kompaktingo, ebenigo, surfaca glatigo) ĉe area tavolo aranĝo de la produkto (ŝoseo, dromo, ekstera aŭ interna areo) el cementbetono aŭ asfaltbetono (bitumizita gruzo). - (en) finisher, (de) Finisseur m, Fertiger m, (cs) finiĉer m.

Esperanto → angla, germana kaj ĉeĥa, kelkaj en la nederlanda

- 2006 **Broccatelli**, Umberto (1931-2010) [W]. **Orlandini**, Pier Vittorio, **Clerici**, Ranieri. = Termini architettonici: dizionarietto italiano-esperanto. [Arkitekturaj terminoj: vortaro kaj terminaro itala-esperanto-itala]. Okaze de la Universala kongreso 2006 en Florenco. 2006. 8 p. — 150 kapvortoj kun difinoj, rete konsultebla.

Esperanto → itala.

Itala → Esperanto

Astronomio – Astronomie - Astronomy

- 2002 **Astronomia Esperanto-Klubo** (AEKo); **Rapley**, Johano (t.e. John, 1927-2007) [W]; **Jaques**, Helio; **Sözüer**, Lars; k. a. Astronomia Terminaro [W]. 2002. —

Versio 1.5 s.j. [2002 (?)] — Sekurec-kopio nur rete konsultebla je url:

<http://www.eventoj.hu/steb/vortaroj/astronomia-terminaro.htm>.

Versio en 2011 — Malaperita el la reto, sed sekurec-kopio trovebla je url:

<http://web.archive.org/web/20110207220604/http://esperanto.org/AEK/AT/>

2373 kapvortoj kun difinoj en Esperanto kaj (partaj) tradukoj al multaj lingvoj.

Funkcioj kaj prezentado similaj al ReVo 1999, vd. Parto I, ĉap. 1 pri Difinvortaroj. En 2015-01 ne plu redaktata. Lingvoj kun pli ol 500 tradukitaj kapvortoj je 2010-06 estas laŭ nombro de tradukoj la portugala, angla, germana, hispana, franca, itala, rusa, turka, ĉeĥa, latva, dana, pola. Spec. (komenco de la indekso germana-Esperanto, litero P):

Paarvernichtung = para malkreo

Pallas = Palaso

Pan = Pajno

Pandora = Pandoro

parabolischer Spiegel = paraboloida spegulo

parabolische Umlaufbahn = parabola orbito

Parabolspiegel = paraboloida spegulo

absorb/a koeficient/o



Mezuro pri la kapablo de iu medio absorbi radiadon, kalkulita per la inverso de la longo post kiu la en tiu medio incidanta radiado malpliintensiĝas je e-on-foje ĝia komenca intenso.

	absorpční koeficient
	Absorptionskoeffizient
	absorption coefficient
	coeficiente de absorción
	coefficient d'absorption
	gleypistuðull
	coefficiente di assorbimento
	coeficiente de absorção
	коэффициент поглощения

2009 **Wimmer**, Paweł. Astronomia vortareto. 2009. — Nur rete konsultebla. 236 esperantaj kapvortoj alfabete ordigitaj, sen difinoj laŭ suba specimeno.

brili - świecić się, lśnić

bruna nano - brązowy karzeł

ĉiela korpo - ciało niebieskie

ĉiela mehaniko - mechanika nieba

ĉielekvatoro - równik niebieski

ĉielo - niebo

ĉielsfero - sfera niebieska

Esperanto → pola

Aŭtomobila Teknologio kaj Aŭtomobilismo

Superrigarda artikolo pri aŭtoterminaroj:

— 2010: Bernardo. „Ventŝirmilfostgarnaĵo“. En: Ipernity (2010-04-17).

Vd. ankaŭ / siehe auch / see also: Parto I: Bildvortaroj

ĉ. 1935 **Automobile Association**, The. Manual of Conversation. For the use of tourists. In English, French, Dutch, German, Italian, Spanish, Danish and Esperanto. Brussels: L'Alliance Internationale de Tourisme. s.j. [ĉ 1935]. 116 p. — 20x13 cm. Frazaro.

Angla → franca, nederlanda, germana, itala, hispana, dana, Esperanto

1965 **Jaumotte**, Maur[ice] (1899-1970) [W]; **Grattapaglia**, G[iuseppe] (1933-) [W] k.a. Nia Seslingva Aŭto-Terminaro. En: Aŭto-revuo. n-ro 1-6. Wilrijk-Antverpeno: Internacia Esperanto-Klubo Aŭtomobilista, 1965. 8, 5, 10, 10, 14, 8 p. — 27x21 cm. Fotoj: 1/1965, 1/1965, p. 17. 2/1965, bildoj (nutra). Aŭto-

- mobilisma vortareto. ĉ. 1.600 terminoj.
 Esperanto → angla, franca, germana, itala, nederlanda
- 1967 **Eyama** Tokiziroo. Aŭta terminaro Esperanta-japana-angla - Japana-Esperanta-angla. Tokio: Asake-Syoboo, **1967**. 126 p. — 24x17 cm.
2a plil. eld. 1969. 143 p. — 21x15 cm. A5-broŝ. Kun tri fotoj.
 Esperanto → japana, angla.
 Japana → Esperanto, angla
- neeld. Neeldonita tajposkripto de „Teknika Aŭtomobil-Vortaro“ (TAV). s.j. 282 p.
 — A4. Parte antaŭe felietone en Aŭto-Revuo 1965-1967. Rec.:
 — **2010**: Bernardo [t.e. Bernhard Pabst]. Ventŝirmilfostgarnaĵo. En: *Ipernity* (2010-04-17):
 „...pli ol 6100 terminoj [...] Multaj eraroj en la etno-lingva parto (...), tre malbona stilo de la Esperantaj terminoj („ventŝirmilfostgarnaĵo“) ...“.
 Esperanto → angla, franca, germana, hispana, itala, nederlanda

Biblioteka Scienco – Bibliothekswissenschaft - Library science

Enhavas ankaŭ la temojn „libroj kaj skriboj“. / Enthält auch das Thema „Bücher und Schriften“. / Includes the topic „books and scripts“.

- 1989 **Portmann**, Doug[glas A.]; **Koralo** [pseŭd.]. Biblioteka terminaro - kun aldonaj terminoj en la fakoj de inform-scienco, eldonado, pres-arto, kaj dokumentado. [Ĉina] Eldonejo de Akademiaj Revuoj; TEBA [t.e. Tutmonda Esperanta Biblioteka Asocio], 1989. 239 p. — 18x13 cm. bind. ISBN 7-80045-498-3. **Foto**. (Parte) kun difinoj en Esperanto. La partoj Esperanto, angla, franca, germana, hispana havebla sur komputila disketo, (re-)aranĝita kaj aktualigita ĉ. 1992 laŭ la sistemo Perkomputora Termino-Kolekto (Pekoteko). ĉ. 1.200 terminoj kun indeksoj en la cel-lingvoj. Spec.:

- 2001 **Kjai**, Abdollah; **Vaŝe**, Ĵeromo (trad.). Terminaro de persa kaj araba belskribo kun ilustrado. 2001- . — Nur rete konsultebla je
 url: <http://persaskribarto.free.fr/tekstoj/pers-orien-04-glos.htm>.
 Je 2010-06, 54 kapvortoj kun esperantaj difinoj (skribitaj nur minuskle) laŭ jena spec.:
polva grando — غبار
 plej eta skribo, strekita per malpli ol 0,5-mm-a kalambeko. arabe *ghubâr*, perse *ghobâr*, tio estas „polvo“.
 Esperanto → persa

Biologio – Biologie – Life Sciences

Vd. ankaŭ la sekcion „Zoologio kaj Entomologio“.

- 1988 **Nomura** Tadatsuna. Japana-Esperanta terminaro de biologio = Nihongo esuperanto seibutsugaku yogoshu. Kumamoto: Shinguma Insatsu, 1988. 742 p. —
Japana → Esperanto, angla.
- 1994 𐄂𐄂𐄂 **Lewin**, Ralph A. Internacia vortaro de mikroba genetiko. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1994. 117 p. — 19 cm. Terminaro de mikroba genetiko kaj molekula biologio; anglaj ekvivalentoj, difinoj en Esperanto kaj la ĉina. Esperanto, angla, ĉina
- 2005 **London**, Klivo. La origino de specioj, glosaro. [2005?]. Nur rete konsultebla, url: <http://www012.upp.so-net.ne.jp/klivo/origino/novaglosaro.html>. 152 kapvortoj kun difinoj en Esperanto laŭ jena spec.:
Drakokolombo
Anglia raso de kolomboj, karakterizitaj de fortika malakra beko kaj granda karunklo super la beko.
Dukotiledona
Rilatas al florplantoj kies embrioj havas du kotiledonojn (ĝermfoliojn). Vidu 'kotiledono'.
Elitroj
Paro de malmolaj kovriroj kiuj protektas la delikatajn flugilojn de skaraboj kaj aliaj insektoj kiam ili ne flugas. Elitroj estas modifiĝintaj antaŭflugiloj.
Entomologio
La scienca studo pri insektoj.

Botaniko kaj Hortikulturo – Botanik und Hortikultur – Botany and Horticulture

Vd. ankaŭ / siehe auch / see also „Biologio“ kaj „Forstfako“.

- ĉ. **Malmanche**, A.L. Botanika Klasifiko. Rueil-Malmaison (S. et O.): Aŭtoro s.j. 1936 [ĉ. 1936]. 92 p. — 31x21 cm. Klasifiko de la plantaro kun esperantaj terminoj por klasoj, subklasoj, serioj, ordoj kaj genroj. El la antaŭparolo:
„... Por la terminaro ni sekvis la konsilojn de la Plena Vortaro, kiu mem inspiriĝis de la terminaro uzata en Anglujo, Francujo, Germanujo, ktp.; alo (ordo), aco (familio), oido (subfamilio), ido (tribuso). ...”.
Rec.:
— 1936: N.i. [xx]. En: Scienca Gazeto Jan. 1936, p. 23.
- 1938 **Neergaard**, Paul (1907-1987) [W]. Terminaro hortikultura seslingva Esperanta angla dana sveda germana franca kun difinoj en Esperanto. Paris: Sennacieca Asocio Tutmonda, 1938. 29 p. — 17x14 cm. Laŭtema terminaro hortikultura kun difinoj en Esperanto, inkl. de laŭalfabeta indekso en ĉiu lingvo. ĉ. 200 terminoj.
Esperanto → angla, dana, sveda, germana, franca
- 1946 **Neergaard**, Paul (1907-1987) [W]. Fitopatologia kaj mikologia terminaro. Kopenhago: J.E. Ohlsens Enke, 1946. —
Esperanto → angla, dana
- 1958 **Moll**, J. W.; **Slijper**, Chr. F.W. [trad.] Terminaro pri la ekstera morfologio de la florphavaj plantoj (Anthophyta) – laŭ „Handboek der Plantbeschrijving“ (lernolibro pri la priskribo de plantoj) de J.W. Moll. En: Scienca Revuo, Purmerend, vol. 10, 1958, n-ro 1 (37), p. 2-35. — Sisteme aranĝita botanika terminaro, kun esperantaj difinoj kaj scienc-latinaj terminoj. Kontrolita de G.F. Makking. Rete konsultebla (pdf, 8,6 mb). 144 nocio-nestoj laŭ jenaj spec.:

LIMBOPINTO (apex)

16. Limbopinto povas esti

- a. *akuta* (acutus), iom post iom mallargiĝinta ĝis pintiĝo: *Salix alba* L.
- b. *obtuza* (obtusus), la supra duono de la limbo pli-malpli similas duoncirklon; *Bellis perennis* L., *Berberis vulgaris* L.
- c. *abrupt-akuta* (acuminatus) kun elstara pinteto; [...].
- d. ĝis g. [...].

ĜERMO (embryo)

144. Ĝermo konsistas el:

- a. *ĝermradiko* (radiculus), kiu [...]
- b. ĝis d. [*ĝermlobo, ĝermtigo, ĝermtufo* ...]

Esperanto → latina

- 1982 **Pilger**, W[outer] F. (1942-2006) [W]. Provizora privata listo [PPL] de komunlingvaj nomoj de plantoj de nordokcidenta Eŭropo. Lelystad: Vulpolibro [t.e. Aŭtoro]. 1982. 72 p. — 21 cm. ISBN 90-70074-31-1. 950 kapvortoj sen difinoj, sed kun scienc-latina nomo kaj identiga numero de *Flora Europaea*. Rete konsultebla, specimenon vd. sube. Kp. PPL pri „legomoj“ = Pilger 1997.

pino ruĝa (*Pinus sylvestris*) 026-007-007000000000

pino nigra (*Pinus nigra*) 026-007-006@00000000

pino aŭstra (*Pinus nigra nigra*) 026-007-006a00000000

pino mara / [pinastro] (*Pinus pinaster*) 026-007-002@00000000

pino blua / pino Vejmuta (*Pinus strobus*) 026-007-020000000000

pino monta (*Pinus mugo*) 026-007-008000000000

Esperanto → latina.

- 1982 **Markheden**, Malte. Svedaj arboj kaj arbedoj: propono al vortaro sveda-Esperanta-latina, Esperanta-sveda-latina. Sjöhgaga: Aŭtoro, 1982. 31 p. — Esperanto, latina, sveda.

- 1986 **Zheng** Ding-zhi (red.). Nomenklatur de ĝeneralaj ornamfloraj vegetaĵoj. Guangxi, Guilin: Guangxi-a botanika instituto, Guilin-a Esperanto-asocio, 1986. 101 p. — 18x13 cm broŝ. Foto. Kun (nur) ĉina indekso. Aperis kiel bonveniga donaco okaze de la UK 1986 en Pekino. Spec.:

Paeonia anomala L. – Ural Peony – Peonio anomala L. – [ĉina termino]

Paeonia delavaye Franch – Delavaj Peony – Peonio delavaja Franch – [ĉina termino]

Scienc-latina → angla, Esperanto, ĉina

- 1988 ††† **Johansson**, Sten (1950-) [W]. Sveda floraro. 840 plantnomoj.

2a eld. Norrköping: Al-fab-et-o, **2000**. 63 p. — 21 cm.

Sveda → scienc-latina, Esperanta

- 1988 **Markheden**, Malte. Svedaj arboj kaj arbedoj. Sjöhgaga: Aŭtoro. 1988 (aldono 1996). 26, 7 p. — 21 cm = A5. Proponoj de sciencaj kaj komunlingvaj nomoj. Vortlisto.

2a eld. [? kp. Markheden 1982].

Esperanto → latina, sveda.

- 1994 **Giloteaux**, Lilli. Arboj: plurlingva terminaro. Croix: Aŭtoro, 1994. 16 p. — 21 cm = A5-broŝ. 63 arbonomoj en 6 lingvoj, kun ilustraĵoj pri ĉiu planto kaj ties frukto.

Scienc-latina → germana, franca, nederlanda, angla, Esperanto

- 1994 **Lewin**, Ralph A. Internacia vortaro de mikroba genetiko. Pekino: Ĉina Esperanto-Ligo, 1994. 117 p. — ISBN 7-5052-0184-0. Foto. — Rec.:

— **1996**: *Monato*, 1996, n-ro 2, p. 16-17.

en, eo, zh

- 1995 **Dazun**, Edmond (1910-2001) [W]. **Andrieu**, André (1932-?) [W]. Sin Nutri en la Naturo. Beauville: Amika Esperanto-Rondo, 1995. 223 p. — Klarigoj pri manĝeblaj plantoj kun multaj desegnoj de la priskribitaj plantoj. Por spec. vd.

- la ĉapitron „Bildvortaroj“
- 1995 **Eichkorn**, Bernhard [ed.] (1934-) [W]. Plurlingva nomaro de sovaĝaj plantoj en Eŭropo. Villingen-Schwenningen: Editoro, 1995. 800 p. — lingvoj: de, en, eo, fr, la, nl, sv. Pluraj antaŭaj eldonoj. Ankaŭ sur 3,5-colaj disketoj en WordPerfect 5.2 laŭ la sistemo de Perkomputora Termino-Kolekto.
- 1996 **Giloteaux**, Lilli. Arboj en Aŭstralio kaj suda Eŭropo. 6-lingva terminaro. Croix: 1996. 20 p. — 21 cm = A5. Foto. 82 arbonomoj kun bildoj de ĉiu planto kaj frukto. Rec.:
— 1997: *Monato*, 1997, n-ro 10, p. 19.
Scienc-latina → germana, franca, nederlanda, angla, Esperanto
- 1997 **Pilger**, Wouter F. Provizora privata listo [= PPL] de nomoj de [manĝeblaj] legomoj en nord-okcidenta Eŭropo. 1997 — Nur rete konsultebla. 189 kapvortoj ordigitaj laŭ botanikaj familioj kun difinoj en Esperanto kaj tradukoj al de, en, eo, fr, la, nl laŭ posta specimeno. Komputilaj prezentoformoj: dekuma unikodo, iso-lat-3 kaj x-ortografio. Kp. PPL „plantoj“ = Pilger 1982.
fam. Basellaceae
Basella sp. (baselo)
baselo; Malabara spinaco - AN Ceylon spinach, Malabar nightshade; FR Baselle blanche; GE Malabar Spinat, Indischer S.; NL Basella
skizo: relative grandaj, sufiĉe karnecaj, brilaj folioj, verdaj aŭ ruĝaj, rondecaj aŭ korformaj
uzo: kiel spinaco aŭ portulako (kuiro)
gusto: iom ŝlimeca
origino: S.Or. Azio; nun ĉie en tropikaj regionoj
- 1999 **Ullrich**, Ingward (1931-) [W]. Nomaro de la forsta ligneca flaŭro de Eŭropo, scienc-latina-Esperanta-germana. Eberswalde: Förderverein *Lexicon Silvestre*. 1999. 174 p. — 30 cm. ISBN 3-931262-38-3. 469 kapvortoj (= plantonomoj) ordigitaj laŭ la scienc-latina.
Prilaborita **eld. 2009**, 225 p. kun nova titolo, vd. tie.
Latina → Esperanto, germana.
- 1999 **Johansson**, Sten. Sveda floraro: svedaj, latinaj kaj Esperantaj nomoj de 838 plantoj sovaĝe kreskantaj en Svedio. [Skövde]: Al-fab-et-o, **1999**. 63 p. — 838 kapvortoj sen difinoj.
2a eld. [Skövde]: Al-fab-et-o. **2000**. 63 p. — 840 kapvortoj sen difinoj. Rete konsultebla je: <http://www.angelfire.com/ok/stenjo/flor/>.
Sveda → scienc-latina, Esperanto
- 2008 **Marinković**, Pribislav. Vortaro de fruktoj, legomoj kaj spicoj. Beogrado: , 2008. 48 p. ilustr. — Sen dif.
Esperanto, serbokroata
- 2009 **Ullrich**, Ingward (1931-) [W]. Nomenklature de la forsta ligneca flaŭro de Eŭropo. Eberswalde: Förderverein *Lexicon Silvestre*, 2009. 225 p. — 30 cm = A4. ISBN 9783931262679. Kp. Ullrich 1999. Kvinlingva: scienclatina, Esperanto, germana, angla, franca.
- 2011 **Pluhař**, Zdeněk (1936-) [W]. Česko-Esperantsky a Esperantsko-Česky Slovníček Lečivých Rostlin. Ĉeĥa-Esperanta kaj Esperanta-Ĉeĥa Vortareto de Medicinaj Vegetaloj. — Pli ne konata.
2a plil. eld. s.l.: aŭtoro **2011**. 33 p. — A4. Nur rete konsultebla, en 2014-12 tamen malaperinta (pdf 320 kb, 2011-02). Spec.:
pajlo, papava / avena makova / ovesna slama
pano, akora (*kandita akoro*) puŝkvorcovy chleb, (*kandovany puŝkvorec*)
papaverino, papavino (*unu el opiaj alkaloidoj*) papaverin (*jeden z alkaloidů opia*)
papavero (= **papavo**) (*lat. Papaver somniferum*) mak sety
papaveto (= **grenrozo**) (*lat. Papaver rhoeas*) mak vlči
papavokapsulo makovice

Demografio – Demographie - Demography

- 1974 **Faktorová**, F. k.a. Demografia vortaro. Praha: Institut demografie, 1974. 91 p. — 24x17 cm.
Esperanto → ĉeĥa, angla, franca, hispana, rusa

Ekologio kaj Naturprotektado – Ökologie und Naturschutz – Ecology and Nature Conservation

- 1985 **Eilart**, J.; **Eisen**, F. Estona-Esperanta-rusa naturprotekta vortaro. Tallinn: 1985. 13 p. — 28 cm. 168 terminoj sen difinoj.
Esperanto → estona, rusa

Ekonomiko, Komerco kaj Asekuro – Wirtschaft, Handel und Versicherung – Economy, Trade and Insurance

- 1903 **Berthelot**, Paul (1881-1910) [W]; **Lambert**, Charles [W]. **Vortareto**. En: Komercaj leteroj en Esperanto. Paris: Hachette, 1903. 47 p. — 8 okt. Komerca terminaro.
2a eld. 1905.
Esperanto → angla, franca, germana
- 1905 **Bullen**, George W. (ĉ. 1842-1912) [W]. Commercial & Legal Terms Shipping Terms Ships, Boats, Rigging, Parts of Ships, Machinery. En: Lessons in Esperanto appearing in Cassell's Popular Educator 1905 Edition. p.XXXI-XXIV. London: Cassell & Co. Ltd, 1905. 23x17 cm. [2], XXIV p.
Angla → Esperanto
- 1906 **Bullen**, George W. (ĉ. 1842-1912) [W]. Commercial Vocabulary Commercial and Legal Terms Shipping Terms Ships, Boats, Rigging, Parts of Ships, Machinery En: The Standard Course of Esperanto being the "Popular Educator" Lessons, based on Dr. Zamenhof's 'Ekzercaro' with Notes and Additions p. 76-85. London: Cassell & Co. Ltd, 1906. viii, 101, [1] p. — 16x10 cm.
2a eld.: 1907.
Angla → Esperanto
- 1908 **Berthelot**, Paul; **Lambert**, Charles. Vortareto. En: Komercaj leteroj en Esperanto kun vortareto kvarlingva. Paris: Hachette, 1908. 48 p. — 18x12 cm.
Esperanto → angla, franca, hispana, germana
- 1921 **Kreuz**, Robert (1894-1936) [W]; **Urban**, M. Vortaro de komercaĵoj. Frankfurt: Messeamt/Foiro, 1921. 12 p. — Foto 1 (kovrilpaĝo). Foto 2 (p. 6-7). Komerca terminaro.
Esperanto → germana
- 1924 **Handbuch** – Frankfurter internationale Messen. Frankfurt (M.): Messeamt 1924. 650 p., ald. reklampaĝoj. — Varlistoj en germana, angla, franca, itala, hispana kaj Esperanto.
Germana → angla, franca, itala, hispana, Esperanto
- 1925 **Bobin**, Marcel; **Cart**, Th.; **Lajarte**; **Page**; **Butin**, Max (1888-1960) [W]. Provizora listo de plej ofte uzataj komercaj vortoj. Paris: 1925. 8 p. — 23x18 cm. BIL 3183b. Litografiita folio.

- Probable apud Esperanto en la franca, angla kaj germana (?).
- 1925 **Eiselin**, J.B. Nederlandsch-Esperanto Handelstermen benevens 1500 Spreekwoorden en Uitdrukkingen. 's-Hertogenbosch, L.C.G. Malmberg, 1925. 100 p. — 19x13 cm. Komerca terminaro. ĉ. 1.500 terminoj.
Nederlanda → Esperanto
- 1926 **Common Commercial Terms in English & Esperanto**. Welwyn Garden City, The Esperanto Institute Limited, [1926]. 12, [4] p. — 19x12 cm. Siglo CCT. Komerca terminaro.
Angla → Esperanto
- 1926 **Kreuz**, Robert (1894-1936) [W]. Warenliste Varolisto Handelswörterverzeichnis. En: Esperanto in Handel und Verkehr. Leipzig: Ferdinand Hirt & Sohn, 1926. 112 p. — pr. Breitkopf & Härtel, Leipzig. 22x15 cm. Vortareto de komercaj varoj.
Germana → Esperanto
- 1927 **Butler**, M[ontagu] C[hristie] (1884-1970) [W]. Commercial Terms Used in Esperanto. En: Roston's Rapid Esperanto Course. London: The Linguaphone Institute, 1927, p. 35-41 [de 41 p. entute]. — 19x13 cm.
Esperanto → angla
- 1927 **Kreuz**, Robert (1894-1936) [W]; **Mazzolini**, Alessandro (1857-1934) [W]. Komerca vortaro en Esperanto. S. Vito al Tagliamento: A. Paolet, 1927. xi, [1], 93, [2] p. — 17x12 cm. Foto. Komerca vortaro kun difinoj en Esperanto. Inkl. de tabeloj de valutoj, britaj kaj metrosistemaj pezoz kaj mezuroj, specifaj pezoz kaj telegrafiaj kodoj. 1.402 kapvortoj.
- 1927 **Kreuz**, Robert (1894-1936) [W]; **Schutkowski**, O[tto]. Varolisto en Esperanto. Vara Vortaro. Frankfurt a.M., Foira Oficejo, 1927. 44 p. — 30x20 cm. Komerca vortaro.
Germana → angla, franca, itala, hispana, Esperanto.
- 1931 **Sós**, Ernest. Dictionnaire actuariel des langues Esperanto=Allemande=Anglaise et Française. Versicherungstechnisches Wörterbuch in den Sprachen Esperanto, Deutsch, Englisch und Französisch. Actuarial Dictionary of the Esperanto=German=English and French languages. Budapest: [D-ro Ernest Sós]; Bruxelles. 1931. 19 p. — pr. Imprimerie Établissements Emile Bruylant. 24x16 cm. Kvarlingva asecura terminareto kun 145 kapvortoj.
Esperanto → germana, angla, franca
- 1935 **Primul Indicator** al Reprezentantilor de Comerț din București. București: Camera de Comerț si Industrie din București s.j. [1935]. 212 p. — Adresaro de 2 069 komercaj reprezentantoj en Rumanio, eld. de la Ĉambro de Komerco kaj Industrio de Bukaresto; enhavas varolistojn en la rumana, franca, germana, angla kaj Esperanto.
Rumana → franca, germana, angla, Esperanto
- 1974 **Munniksma**, F[eiko]. (ed.) (1915-1990) [W]; **Venture**, A[lec] (1910-1991) [W]; **Waringhien**, G[aston] k.a. International Business Dictionary in nine languages. Internacia komerca-ekonomika vortaro en naŭ lingvoj. English Esperanto Deutsch Español Français Italiano Nederlands Português Svensk. Deventer: Kluwer, 1974. xvi, 535 p. — 22x15 cm. Inkl. de difinoj en la angla kaj Esperanto, de laŭalfabeta indekso por ĉiu lingvo kaj de listo de nomoj landaj kaj valutaj. Kunlaborintoj:
(en) A. Venture; F. Munniksma. (eo) F. Munniksma; G. Waringhien; A. Albault; C.A. Pruissen. (de) W. Bormann; L. Röhl; B. Vogelmann; R. Haferkorn. (es) L. Mimó Espinalt; M.D. Nieuwenhuis. (fr) R. Tavernier; E.L.M. Wensing; J. Thierry; R. Bernardo; (it) G.

- Polerani; Centro por Esperanto en Komercio, Industrio kaj Turismo, Milano. (nl) F. Munniksma. (pt) C. Domingues. (sv) E. Carlén.
2.812 terminoj.
Angla → Esperanto, germana, hispana, franca, itala, nederlanda, portugala, sveda
- 2a eld. (repr.) 1975. Foto.**
- 3a plil. eld. ... en 11 lingvoj.** Beijing: China Esperanto-Press. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, **1990**. xxx, 688 p. — 22x? cm. bind. ISBN 7-5052-0025-9. **Foto.** 3a eld. kunordigita de Bruno Vogelmann. Aldonaj kunlaborintoj (ja) Matumoto Ken'iti; Izumi Yukio. (zh) Zhou Yu; Zhao Peiying.
Angla → Esperanto, germana, hispana, franca, itala, nederlanda, portugala, sveda, ĉina, japana.
- 1981 s.i. **Ekonomia fakterminaro.** En: Monda Ekonomio. Seminario de TEJO en la Eŭropa Junulara Centro en Strasburgo. 1981, p. 48-58. — A5-broŝ. ĉ. 120 esperantaj terminoj kun difinoj. Spec.:
Adaptita teknologio. Adaptia teknologio estas la mobilizo de teknikaj scioj por la solvado de iu teknika problemo, kiu sin montris en evolulandoj per enlandaj kaj eksterlandaj rimedoj, kiuj orientiĝas laŭ la ekonomiaj kaj sociaj kondiĉoj de la evolulando.
- 1985 **Wiersch, Hans; Braun, F.J.** k. a. Économie finance monnaie, glosaro de la Komisiono de la Eŭropaj Komunumoj. Welzheim: IKEF Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo, **1985**. 4 + 64 + 10 p. — 30 cm = A4-broŝ. 1150 kapvortoj sen difinoj laŭ „Glossaire économie, finance, monnaie” [mallongigite: Ekofomo] de la Komisiono de la Eŭropaj Komunumoj, 1985.
2a eld. 1992. (trad. F.J. Braun k.a.). IKEF, **1992**. 64, 10 p. — 30 cm.
2a [ĝuste 3a] eld. [Antverpeno]: Flandra Esperanto-Ligo **2000**. 75 p. — Esperanto → franca, angla
- 1989 ††† **Wiersch, H[ans].** (red.). Proveldono de komerca terminaro. Antverpeno: Flandra Esperanto-Ligo, 1989. 88 p., 20 p. — 30 cm = A4-broŝ. 2000 kapvortoj, el kiuj 848 ĉefaj, sen difinoj, laŭ „Key words”, terminaro de Internacia Komerca Ĉambro.
de, en, eo, es, fr, it
- 2000 ††† **Inkotermoj 2000.** Antverpeno: IKEF?, 2000. 128 p. — 21 cm. Oficialaj IĈK-reguloj por la interpreto de komercaj kondiĉoj. Esperanto + ?
- 2003 Multlingva vortaro pri profesioj, funkcioj kaj rangoj. Asocio Worsten: 2003-2008. — Nur rete konsultebla (utf-8). lingvoj: de, en, eo, pl. 339 kapvortoj sen difinoj.
- 2004 **Wiersch, Hans.** Borsa terminaro kvinlingva. Deutsch, English, Esperanto, français, Nederlands. Lovenjo; Antverpeno: Flandra Esperanto-Ligo; Esperanto 3000, 2004. 138 p. — 30 cm = A4. ISBN 9077066012. **Foto.** Fakaj terminoj en la lingvoj: germana (1208), angla (1793), Esperanto (1203), franca (1440), nederlanda (1176), sen difinoj.
- 2005 **Vanden Bempt, Marc** (1956-) [W]. Asekura terminaro seslingva. Deutsch - English - Esperanto - Français - Magyar - Nederlands [W]. Lovenjo, Antverpeno: Flandra Esperanto-Ligo, Esperanto 3000, 2005. 323 p. — 30 cm. ISBN 9077066136. **Foto.** Pli ol 2300 kapvortoj kun difinoj en Esperanto.
Rec.:
— **2007:** Matthias, Ulrich. En: Wikipedia.
Esperanto → germana, angla, franca, hungara, nederlanda
- s.j. **Butler, M[ontagu] C[hristie]** (1884-1970) [W]. Commercial Terms Used in Esperanto. Vocabulary Esperanto-English. En: Linguaphone Conversational Course Esperanto. Linguaphone Interparola Kurso Esperanto. p. 123-129.

- London: The Linguaphone Institute, s.j. xiii, 144, [3] p. — 21x14 cm.
Esperanto → angla
- s.j. **Butler**, M[ontagu] C[hristie] (1884-1970) [W]. Commercial Terms Used in Esperanto. En: Linguaphone Rapid Esperanto Course. p. 39-45. London: The Linguaphone Institute, s.j. 46 p. — pr. W. & J. Mackay & Co. Ltd, Chatham. 18x12 cm.
Esperanto → angla

Elektroniko, Elektrotekniko kaj Lumigo – Elektronik, Elektrotechnik und Beleuchtung – Electronics, Electrical Engineering and Lighting

- 1907 **Velten**, Wilhelm [W]. Glühlampen und Bogenlampen. Berlin: 1907. 40 p. — Vortaro pri inkandeskaj kaj arkaj lampoj.
Germana → Esperanto
- 1923 **Wüster**, Eugen (1898-1977) [W]. Elektrotechnische Ausdrücke in Esperanto. Berlin: 1923. 4 p. —
Germana → Esperanto
- 1933 **Elektroteknika Vortaro**. Tokio: Waseda Universitato, 1933. 73 p. —
Angla, Esperanto, japana
- 1935 **Vocabulaire Électrotechnique International**. Groupe 05 - Définitions Fondamentales Edition préliminaire présentée à l'Assemblée plénière de La Haye Juin 1935. **International Electrotechnical Vocabulary**. Group 05 - Fundamental Definitions Preliminary edition presented to the Plenary Meeting at The Hague June 1935. London: Comité Électrotechnique Français for the International Electrotechnical Commission, 1935. 63 p. — pr. Soc. Gén. d'Impr. et d'Ed., Paris. 30x21 cm.
Franca → angla, germana, itala, hispana, Esperanto
- 1936 **Ŝatelen**, M.A. Meždunarodnyi elektrotexničeski slovar'. Leningrad: Ob'jedjinnjennoye Naučno-Tečničeskoye Izdatel'stvo NKTL SSSP, 1936. 375, [1] p. — 26x20 cm. Elektroteknika terminaro. ĉ. 600 terminoj.
Franca, rusa, angla, germana, itala, hispana, Esperanto
- 1938 **Vocabulaire Électrotechnique International**. Groupe 05 Définitions Fondamentales. **International Electrotechnical Vocabulary**. Group 05 Fundamental Definitions. London: Comité Électrotechnique Français for the International Electrotechnical Commission, 1938. [7], 311, [1] p. — pr. Imprimerie Centrale des Chemins de Fer, Paris. 30x21 cm.
Franca → angla, germana, itala, hispana, Esperanto
- 1938 **Vocabulario Electrotécnico Internacional**. Buenos Aires: 1939. 302 p.
Hispana, franca, angla, germana, itala, Esperanto
- 1939 **Wüster**, Eugen (1898-1977) [W]; **Roelofs**, W[illem] P[etrus] (1910-1998) [W]. Vortaro pri Lumigoscienco. Laŭalfabeta Listo de la Nomoj el la Vortlisto. 852 terminoj. En: Benamingen op het Gebied der Verlichtingskunde met hun Vertalingen in het Duitsch, Engelsch, Fransch en Esperanto. Arnhem: Secretariaat Nederlandsche Stichting voor Verlichtingskunde, 1939 [1940]. 120p [?] — pr. G.W. van der Wiel & Co., Arnhem. 27x19 cm.
2a rev. plil. eld.: 1941. 154 p. — 27x19 cm.
Nederlanda, germana, angla, franca, Esperanto
- 1953 **Alexandersson**, Sven [W]. Elektroteknika terminaro Esperanta-sveda. Stockholm: Teknika sekcio de Sveda Esperanto-Federacio, 1953. [18] p. — pr.

- Salex, Stockholm. 21x15 cm. Kun difinoj en Esperanto.
Esperanto → sveda
- 1961 **Haferkorn**, R[udolf] (1896-1988) [W]. Esperantlingva anekso al la Internacia elektroteknika vortaro Grupo 05. Difinoj de fundamentaj nocioj. International Electrotechnical Vocabulary Group 05. Fundamental Definitions. 610 terminoj. Berchtesgaden: Terminologia Centro (ISAE kaj Akademio), 1961. 18 p. 30x21 cm.
[Franca, angla, germana, hispana, itala, pola, sveda] → Esperanto
- 1963 **Siwicki**, Kazimierz k.a. Internacia Elektroteknika Vortaro Esperanta-Pola. Grupo 05 Fundamenta Terminaro. Grupo 10 Maŝinoj kaj Transformiloj-Międzynarodowy Słownik Elektryczny Polsko-Esperancki Dział 05 Terminy Podstawowe Dział 10 Maszyny i Transformatory. Warszawa: Polski Związek Esperantystów, 1963. 2 vol. po 21x15cm. vol. 1: [2], 54 p. Baza terminaro elektroteknologia; vol. 2: 41 p. Terminaro pri elektraĵ maŝinoj kaj transformiloj.
Pola ↔ Esperanto
- 1965 **Siwicki**, Kazimierz k.a. Internacia Elektroteknika Vortaro Esperanta-Pola, Angla, Franca, Germana, Itala, Sveda. Grupo 07 Elektrotekniko. Grupo 08 Elektroakustiko. Międzynarodowy Słownik Elektryczny Polsko-Esperancki. Grupa 07 Elektronika. Grupa 08 Elektroakustyka. 937 terminoj. Warszawa: Polski Związek Esperantystów, 1965. 171 p. — 21x15 cm = A5-broŝ. Terminaro pri elektroniko kaj elektroakustiko.
Pola → Esperanto.
Esperanto → pola, angla, franca, germana, itala, sveda
- s.j. **Kristály** Tibor. Elektrofaka klariga terminaro en Esperanto. s.j. [antaŭ 1970 (?)] — Nur rete konsultebla en **STEB**. Malneto de 1081 terminoj, aranĝitaj laŭ strikte alfabeto ordo kaj difinitaj en Esperanto, ankoraŭ kun parte bazaj lingvaj eraroj (i.a. misuzo de la difina artikolo „la“, intermikso de „erao“ kaj „areo“ k.t.p.) kaj parte „vortar-metie“ mallertaj difinoj. Sola referencverko estas „PV“, kiun ĝi transprenas abunde. Pro tio la supozo, ke ĝi estas en stato de antaŭ la apero de PIV 1970. Spec. (komenco de litero P):
pantografo — Kurentodeprenilo de elektra lokomotivo kaj tramo.
paperkondensilo — Kondensilo, kies izolilo (dielekto) inter la elektrodoj estas fabrikita el papero.
paralela cirkvito — Kies konsisteroj inter du konektpunktoj konektiĝas paralele. [?! tiel!].
paramagneto — [mankas ankoraŭ ĉio].
parametro — Numerigita propraĵo, kiu karakterizas la konsisteron aŭ la jam funkciantan cirkviton. [troa uzo de la difina artikolo].

Etimologio – Ethymologie – Ethymology

Vd. Parton 1. – S. Teil 1. – See Part 1.

Etnologio kaj Etnografio – Ethnologie und Ethnographie – Cultural Anthropology and Ethnography

- 1934 **Smirnov**, P.A.; **Averin**, Bazilo (trad.). Etnografia vortareto. En: La Kirkizoj. s.j. [ĉ. 1934], p. 20. — 17x11 cm. Serio: Etnografia Biblioteko 1. Unupaĝa glosareto en broŝureto trad. el la rusa. Rec.:
— 1934: A.F. En: Scienca Gazeto 3a jaro, Julio 1934, p. 80: „... la unua tiuspeca verko en Esperanto, kiun mi [t.e. A.F.] iam vidis ...“.
- 1964 **Nakamura**, Tazuo (1911-1983) [W]. Enciklopedieto japana. Osaka: Kosmo,

1964. 217 p. — Kun elfaldebla mapo kaj kelkaj fotoj. Esperantlingva priskribo de japanaj karakterizaĵoj, (ĉefe) kulturaĵoj el ekz. arkitekturo, hejmo kaj loĝado, teatro k.t.p. Kun glosaro Esperanto-japana kaj indeksoj en ambaŭ lingvoj. La plej ampleksa kolekto de nocioj rilataj al Japanio en esperantigita formo.
- 2001 **Janzing**, Gereon. Mehrsprachiges Wörterbuch für die Ethnologie Deutsch - Englisch - Französisch - Spanisch - Portugiesisch – Russisch - Esperanto (unter teilweiser Berücksichtigung weiterer Sprachen). [= Plurlingva vortaro por etnologio]. Munkeno: Lincom, 2001. 193 p. — 1200 kapvortoj. Rec.: — **2003**: Fischer, Rudolf. Etnologia Vortaro: Valora verko kun kelkaj kapricoj. En: Esperanto Aktuell 2003:22:03, p. 21.
lingvoj: de, en, eo, es, fr, pt, ru.

Fervojo – Eisenbahn – Railways

1. Superrigardo – Übersichtsbeiträge - Overview

- 1984 **Giessner**, Joachim. Historio de IFEF 1909-1884. — Rete legebla: „Enskribi la fervojajn terminojn en kajeron“ – 100 jaroj da terminara laboro inter fervojistoj.
1a parto.
2a parto.
skizo pri 3a parto verkota (Bernardo).
- 1996 **Hoffmann**, Heinz. Terminologia Laboro inter Fervojistoj. En: Terminoteko, n-ro 14 (sept. 1996).
Republikigo en la reto (2010-08-21).

2. Terminara periodaĵo

Hoffmann, Heinz (red.). Terminara Kuriero.

3. Terminaroj

- 1923 **Habellok**, Georg (ĉ. 1880-1940) [W]. Eisenbahn-Wörterbuch - Deutsch-Esperanto - Zusammenstellung der im Eisenbahnverkehr gebräuchlichen Ausdrücke. Im Auftrage des - Verbandes Deutscher Eisenbahn-Esperantisten - bearbeitet von Georg Habellok. 1. Auflage Breslau: Selbstverlag 1923. 49 p. — 22x13 cm. Manskribita en kurent-skribo. 1.300 terminoj. — Rec.: — **2010**: Bernardo. La terminaro, kiu kostis 1,2 milionojn da markoj. En: Ipernity (2010-02-07). Foto.
2a eld. Köln: Fervojista Esperanto-Asocio, **1954**. 25 p. — 4°. Germana → Esperanto
- 1933 **Rosher**, Edward M. Fervoja terminaro. Rickmansworth: Universala Esperanto-Asocio, 1953. 67 p. — 15x12 cm. Kun difinoj en Esperanto.
Esperanto → angla
- 1939 **Rosher**, Edward M. Fervoja terminaro (konstrufako). Rickmansworth: Internacia Esperanto-Ligo, [1939]. 15 p. 2 ilus. — 16x12 cm. Kun difinoj en Esperanto. 115 kapvortoj.
- 1955 **Blin**, ?; **Blondeaux**, A[ndré]. Fervoj-teknika Leksikono. Lexique technique ferroviaire [de S.N.C.F.]. Paris: Franca Fervojista Esperanto-Asocio / Association Française des Cheminots Esperantistes, 1955. [2], 111 p. — pr. André Blondeaux, Courbevoie. 27x21 cm. 5.301 terminoj.
Franca → Esperanto
- 1958 **Rosher**, Edward M.; **Parry**, C.S. English-Esperanto Railway Technical Terms. Fervojaj Terminoj. Being largely based on a translation of the French-

- English edition of Lexique Technique Ferroviaire published by Société Nationale de Chemins de Fer 1958 (S.N.C.F.). Haslemere: Edward M. Rosher, 1958. iv, 57, [2] p. — 25x20 cm. 2.680 terminoj.
Angla → Esperanto
- 1966 **Ritterspach**, Gernot (1928-1990) [W]. Fervoja terminareto germana-Esperanta, Esperanta-germana. Kleines Eisenbahn-Fachwörterbuch Deutsch-Esperanto Esperanto-Deutsch. [Frankfurt/Main,] Germana Esperanta Fervojista Asocio, 1966. 80 p. — 16x11 cm. ĉ. 2.000 terminoj.
Germana ↔ Esperanto
- 1968 **Bácskai** István. Fervoja Terminareto Esperanta-Hungara Hungara-Esperanta. Vasúti Kis Szakszótár Eszperantó-Magyar Magyar-Eszperantó. Budapest: Hungara Sekcio de la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio / IFEF / kaj Fervojista Fakto de Hungara Esperanto-Asocio (A Nemzetközi Vasutas Eszperantó Szövetség / IFEF / Magyar Tagozata a Magyar Eszperantó Szövetség Vasutas Szakosztálya), 1968. 142, [2] p. — pr. MÁV.-ÜGH. nyomda, Budapest. 14x10 cm. ĉ. 2.000 terminoj.
Esperanto ↔ hungara
- 1968 **Engen**, Per; **Krogstie**, Per Johan. Ordbok over jernbaneuttrykk norsk - Esperanto, Esperanto - norsk. Fervoja terminaro norvega - Esperanto, Esperanto - norvega. Løten: Norske Jernbanemenns Esperantoforbund 1968. 75, 89 p.
- 1971 **Zupanić**, Josip; **Sekereš**, Ljudevit k.a. Fervoja terminareto Esperanta-serbokroata, Serbokroata-Esperanta. Mala Železnička Terminologija Esperanto-srpskohrvatski, Srpskokrvatski-Esperanto. Beograd: Jugoslavia Asocio de Fervojistoj-Esperantistoj, 1971. viii, 59, 60, vii p. — 17x12 cm. 3.000 terminoj.
Esperanto ↔ serbokroata
- 1976 **Bengtsson**, Harry. Fervoja terminaro sveda-Esperanta Esperanta-sveda. Järnvägsfackordbok svensk-esperanto Esperanto-svensk. Malmö: Sveda Esperanta Fervojista Asocio / Svenska Järnvägsanställdas Esperanto Förening, 1976. [3], VI, 167, [1] p. — pr. Jabe Offset AB, Lund. 17x13 cm.
Sveda ↔ Esperanto
- 1978 **Blondeaux**, André. Lexique Ferroviaire Français-Esperanto avec index en Esperanto, Langue Internationale. Fervoja Leksikono Franca-Esperanta kun indekso en Esperanto, Lingvo Internacia. Loctudy, Union Artistique et Intellectuelle des Cheminots Français - U.A.I.C.F. / Association Française des Cheminots pour l'Esperanto - A.F.C.E., 1978. [1], III, [1], 165 p. — pr. Imprimerie Helio-Plans, Pont-L'Abbé. 21x15 cm. 5.200 kapvortoj.
Franca ↔ Esperanto
- 1978 **Legowski**, Leszek. Mały Słownik Polsko-Esperancki i Esperancko-Polski Terminologii Kojejowej. Malgranda Pola-Esperanta kaj Esperanta-Pola Fervojista Vortaro. Bydgoszcz: Polski Związek Esperantystów, Kolo Esperantystów Kolejarzy / Pola Esperanto-Asocio, Rondo de Fervojistoj-Esperantistoj ĉe la Klubo "Esperanto" en Bydgoszcz, 1978. [2], 12, [2] p. — 20x14 cm. Fervoja terminaro.
Pola ↔ Esperanto
- 1989 ‡‡‡ **Fervoja terminaro en Esperanto**. IFEF, 1989. 100 p. — 21 cm. 8.000 terminoj.
- 1995 ‡‡‡ **Sredić**, Gvozden (red.). Fervojfaka terminologio serba-esperanto kaj esperanto-serba. Beograd: JAFE, 1995. 219 p. — 30 cm. ĉ. 8.000 terminoj.
Esperanto ↔ serba

- 1997 ††† **Fervoja terminaro esperanto-ĉeský / ĉeský-esperanto.** Budapeŝt: [Terminara Komisiono de IFEF?], 1997. 328 p. — 21 cm = A5 bind. UIC Railway Dictionary. ĉ. 8.000 terminoj. Esperanto ↔ ĉeĥa
- 1997 ††† **Fervoja terminaro esperanto-dansk / dansk-esperanto.** Budapeŝt: [Terminara Komisiono de IFEF?], 1997. 434 p. — 21 cm. bind. UIC Railway Dictionary. ĉ. 8.000 terminoj. Esperanto ↔ dana
- 1997 ††† **Fervoja terminaro Esperanto-Deutsch / Deutsch-Esperanto.** Budapeŝt: [Terminara Komisiono de IFEF?], 1997. 434 p. — 21 cm. bind. UIC Railway Dictionary. ĉ. 8.000 terminoj. Esperanto ↔ germana
- 1997 ††† **Fervoja terminaro Esperanto-English / English -Esperanto.** ĉ. 8.000 terminoj. Budapeŝt: [Terminara Komisiono de IFEF?], 1997. 21 cm. 355 p. bind. — UIC Railway Dictionary. Esperanto ↔ angla
- 1997 ††† **Fervoja terminaro esperanto-español / español-esperanto.** Budapeŝt: [Terminara Komisiono de IFEF?], 1997. 386 p. — 21 cm. bind. UIC Railway Dictionary. ĉ. 8.000 terminoj. Esperanto ↔ hispana
- 1997 ††† **Fervoja terminaro esperanto-français / français-esperanto.** Budapeŝt: [Terminara Komisiono de IFEF?], 1997. 360 p. — 21 cm. bind. UIC Railway Dictionary. ĉ. 8.000 terminoj. Esperanto ↔ franca
- 1997 ††† **Fervoja terminaro esperanto-germana.** Bremen: 1993. 183, 188 p. — 21 cm. bind. ĉ. 8.000 terminoj. Esperanto ↔ germana
- 1997 ††† **Fervoja terminaro esperanto-italiano / italiano-esperanto.** ĉ. 8.000 terminoj. Budapeŝt: [Terminara Komisiono de IFEF?], 1997. 366 p. — 21 cm. bind. UIC Railway Dictionary. Esperanto ↔ itala
- 1997 ††† **Fervoja terminaro esperanto-magyar / magyar-esperanto.** Budapeŝt: [Terminara Komisiono de IFEF?], 1997. 346 p. — 21 cm. bind. **UIC Railway Dictionary.** ĉ. 8.000 terminoj. Esperanto ↔ hungara
- 1997 ††† **Fervoja terminaro Esperanto-Nederlands / Nederlands-Esperanto.** Budapeŝt: [Terminara Komisiono de IFEF?], 1997. 393 p. — 21 cm. bind. UIC Railway Dictionary. ĉ. 8.000 terminoj. Esperanto ↔ nederlanda
- 1997 ††† **Fervoja terminaro esperanto-polski / polski-esperanto..** Budapeŝt: [Terminara Komisiono de IFEF?], 1997. 373 p. — 21 cm. bind. **UIC Railway Dictionary.** ĉ. 8.000 terminoj Esperanto ↔ pola
- 1997 ††† **Fervoja terminaro esperanto-português / português-esperanto..** Budapeŝt: [Terminara Komisiono de IFEF?], 1997. 384 p. — 21 cm. bind. **UIC Railway Dictionary.** ĉ. 8.000 terminoj Esperanto ↔ portugala
- 1997 ††† **Fervoja terminaro esperanto-român / român-esperanto.** Budapeŝt: [Terminara Komisiono de IFEF?], 1997. 338 p. — 21 cm. bind. **UIC Railway Dictionary.** ĉ. 8.000 terminoj. Esperanto ↔ rumana
- 1997 ††† **Fervoja terminaro esperanto-svenska / svenska-esperanto.** Budapeŝt: [Terminara Komisiono de IFEF?], 1997. 434 p. — 21 cm. bind. **UIC Railway Dictionary.** ĉ. 8.000 terminoj. Esperanto ↔ sveda
- 1998 ††† **Engen, P.; Krogstie, P. J.** Fervoja terminaro norvega-Esperanto / Esperanto-norvega. 1998. 165 p. — 21 cm. mimeo. Esperanto ↔ norvega
- 1998 ††† **Sredić, Gvozden (red.).** Terminaro de kombinita transporto. Beograd: 1998. 98 p. — 21 cm. ilus. Esperanto, angla, franca, germana, serba
- 1999 ††† **Li Sen (red.).** Tiêlùx cĥuì. Beijing: Ĉina Fervojista Esperanto-Asocio, 1999. 610 p. — 26 cm. bind. Fervoja terminaro kun indeksoj en Esperanto kaj la angla. ĉ. 14.000 terminoj. Ĉina, Esperanto, angla
- 2010 Internacia Unio de Fervojoj (laŭ la franca mallongigo **UIC**). RailLexic 3.0. — Ekranfoto. Datumbazo havebla sur kd (lumdisko) je www.uic.org. Konstante

daŭrigata kaj plil. En 2010-02 ĉ. 16.000 terminoj en 19 lingvoj, inter ili Esperanto. Probable la plej ampleksa Esperanto-terminaro, en kiun eniris la plej granda parto de la supre nomitaj pli fruaj fervojaj terminaroj.

Filatelo – Philatelie - Philately

- 1903 **Lemaire**, René (1876-1954) [W]. Vocabulaire Français-Esperanto contenant les mots spéciaux à la philatélie et des Modèles de Lettres. Paris: Groupe Espérantiste de Paris, 1903. 21, [3] p. 4 ilus. — pr. A. Lanier, Auxerre. 25x17 cm. Filatela vortareto. Foto 1, foto 2.
Franca → Esperanto
- 1913 **Artemjew**, P.A. Tausch-Code der “Internacia Ligo”. St. Petersburg: [1913]. 61 p. — 16x11 cm. Filatela vortareto.
Germana → franca, angla, rusa, Esperanto
- 1914 **Alfabeta tabelo de filatelaj fakesprimoj**. Hamburg: 1914. 12 p. — Filatela terminaro.
Germana → franca, hispana, Esperanto
- 1928 **Scott**, Herbert M. (1884-1925) [W]. Filatela terminaro Esperanta Angla Franca Germana kun difinoj en Esperanto. Horrem bei Köln: Heroldo de Esperanto, 1928. 47 p. — 16x12 cm. Foto de la titolpaĝo kaj priskribo. 318 kapvortoj kun esperantaj difinoj kaj tradukoj al angla, franca, germana kaj (nur okaze) aliaj lingvoj (ekz. hispana). Antaŭe en Heroldo de Esperanto 1926, n-roj 47-53 kun la (je unu sola escepto ne plenumita) peto sendi reagojn al la faritaj terminaj proponoj. Ĉefaj referenc-verkoj: Kabe (1910), la teknikaj de Vérax (1907, 1910) kaj la jam aperintaj partoj de la Enciklopedia Vortaro de Eugen Wüster (1923 ks). Foto. Specimenoj:
klapo (flap, patte, Klappe) Liberranda, ordinare gluhava parto de koverto, per kiu oni ĉi tiun fermas. [Tiu speciala signifo mankas en PIV 2002].
kubierto (insured letter stamp, vignette de recommandation, Geldbriefversicherungsschein, hispane cubierta) Unu el grandaj markoj uzataj en Kolombio kaj ĝiaj ŝtatoj por signi asekuron de leteroj enhavantaj monon. [same ne en PIV 2002].
2a eld. Rickmansworth: Internacia Esperanto-Ligo, **1946**. —
Esperanto → angla, franca, germana
- 1937 [**Šavel**. Václav]. Ŝlosilo de l' internacia filatelisto korespondado. Jablonné n. Orł.: Esp[eranto]-Presejo Ant[onín] Pražák 1937. 67 p. — 17,5x11 cm. Rec.: Ligilo, 9a jaro, 1938, n-ro. 3, p. 26. 77 filatelaj frazoj.
Esperanto → ĉeĥa, germana, franca, angla.
- 1947 **Filatela vortaro s.t. Dokumenta**. Antwerpen: Eldonejo “Phrophil”, 1947.
Nederlanda → franca, angla, germana, Esperanto
- 1962 **Kucharský**, Pavel. Cizojazyčná korespondence pro filatelisty (česká ruská německá francouzská anglická španělská madarská esperantská). Praha: Nakladatelství Dopravy a Spoju, 1962. 225, [2] p. — 16x24 cm. Filatela terminaro. La esperantaj tradukoj prizorgis Jaroslav Mařík (1913-1997) [W].
Ĉeĥa → rusa, germana, franca, angla, itala, hispana, hungara, Esperanto
- 1990 **Giloteaux**, Lilli. Filatela terminaro. Lexique philatélique français-Espéranto. Croix: Aŭtoro, 1990. 20 p. —
Franca → Esperanto.

Filozofio - Philosophie - Philosophy

Vd. ankaŭ / siehe auch / see also „Religio“

- 1911 **Psikisma terminaro.** Supl. de: Esperanta psikistaro. Anvers, 1911. — Spiritisma vortareto.
- 1934 **Kamaryt, Stan**[islav] (1883-1956) [W]. Filozofia vortaro. Olomouc: Moraviaj Esperanto Pioniroj, 1934. 170 p. — pr. Hanácká Knihotiskárna, Olomouc. 18x13 cm. Terminareto filozofia kun difinoj en Esperanto. 253 kapvortoj. Rec.:
—1934: Erdey, F. En: Lingvo Libro - Senpaga suplemento al Literatura Mondo 1934:2, p. 24. Esperanto → angla, ĉeĥa, slovaka, franca, germana

Fiziko – Physik - Physics

- 1987 **Katsumori Hiroshi** (1925-2004) [W]; **Makino Satoru**; **Yamamori Junko**. Esperanta terminaro de fiziko Esperanto-japana-angla. Kasugai: Dep. of Physics, Chubu Univ.; Esperanto Soc. of Chubu Univ., 1987. 197 p. — lingvoj: en, eo, ja.
- 1992 **Katsumori Hiroshi** (1925-2004) [W]; **Makino Satoru**; **Makino Junko**. Esperanta terminaro de fiziko Esperanto-japana-angla. **2a rev. eld.** Kasugai: Chubu Univ., Fakoj de Fizikscienco kaj Esperanto-Societo **1992**. 197 p. — 21 cm = A5. Terminoj ordigitaj laŭ la tri lingvoj. Esperanto → japana, angla
- 2002 **Portella, Luiz F.** [Vortaro fizika esperanto-portugala] url: <http://www.lujz.org/vorfiz>. Porto Alegre: 2002-07-28 laŭ elŝuto de 2002-10-01 — Dekuma unikodo. laŭ la enkonduko, etkvante eldoniĝis papere je 2000-08-26, neatingebla en 2011-05. 1780 kapvortoj. lingvoj: eo, pt, sen difinoj.
- 2010 **Maradan, Mélanie**. Terminologio de la Doplera efiko = Terminologie des Doppler-effekts = Terminology of the Doppler Effect = Terminología del efecto Doppler = Terminologie de l'effet Doppler. Ĝenevo: Universitato de Ĝenevo, 2010, 226 p. — Magistriga referaĵo. Difinoj kaj notoj en ĉiu el la 5 lingvoj. Franclingva enkonduko. 140 kapvortoj kun difinoj. Rete konsultebla. lingvoj: de, en, eo, es, fr.
- 2012 **Hasan, Hasan Jakub**. Fiziko-geografia terminaro. Vd. Geografio. Esperanto → angla, bulgara

Fonetiko – Phonetik - Phonetics

- 1933 **Recueil de listes de logatomes espéranto pour mesures de netteté.** Paris: Comité Consultatif International des Communications Téléphoniques à Grande Distance, 1933. 104 p. — 15.000 silaboj. Fonetikaj silaboj en Esperanto-alfabeto.

Forstfako – Forstwirtschaft – Forestry

Vd. ankaŭ / Siehe auch / See also

- 1995 **Simon, Karl-Hermann** (red.) (1930-2011) [W]; k.a. Lexicon Silvestre / Vortaro de forsta fako. Arbarkultura terminaro [W]. [ĉiuj vol.] Eberswalde: Förderverein „Lexicon Silvestre“ e. V. — Ĝis 2010 aperis 46 vol. kun po 1.000 nocioj por 15 lingvoj. Rete konsultebla.

- vol. 1: **Prima pars. / I. 1a eld. 1995.**
 vol. 1: **Prima pars. / I. 2a eld. 1997.** 84 p. — 30 cm = A4.
 vol. 2: **Secunda pars. / II. 1998.** 82 p. — 30 cm = A4.
 vol. 3: **Tertia pars. / III. 1999.** 97 p. — 30 cm = A4.
 vol. 4: **Quator pars. / IV. 2000.** 103 p. — 30 cm = A4.
 vol. 5-8: [?]
 vol. 9: **Nona pars. / IX. 2013.** 120 p. — 30 cm = A4. **Foto. Panka, Stefan** (red.). ISBN 9783931262723. Rec:
 —2010: Blanke, Detlev; Panka, Stefan (ed.) 2010: Lexicon silvestre - Beiträge zum multilingualen Wörterbuch des Forstwesens - Kontribuoj pri la multlingva vortaro de la forstfako, *Förderverein "Lexicon Silvestre" e.V.*, Eberswalde 2010, 183 p. ISBN 978-3-931262-68-6.

Fotografio kaj Kino – Fotografie und Kino – Photography and Cinema

- 1906 **Vérax**, Ch[arles] (1873-1943) [W]. Vocabulaire Français-Esperanto technologique des termes les plus employées en photographie et dans ses rapports avec la chimie, la physique et la mécanique. En: Foto-Revuo 1906-1907. Paris: Charles Mendel, 1907?
2a rev. eld. Paris: Photo Revue, **1907.** [2], 44 p. — pr. Darantière, Dijon. 18x12 cm. Enhavas fotografiajn terminojn.
 Franca → Esperanto
- 1906 **Verks**, Karlo [pseŭd. de Charles **Vérax** (1873-1943) [W]]. Teknikaj vortoj kaj esprimoj uzataj en fotografa optiko kaj ilia franca traduko. En: Elementa Fotografa Optiko. Paris: Presa Esperantista Societo, 1906. 79p. — 19x12 cm. 155 terminoj.
 Esperanto → franca
- 1997 **Valente**, Giuseppe. Fotografia fakvortaro kun perdiskede anglaj kaj italaj ekvivalentoj = Vocabolario tecnico di fotografia con i termini corrispondenti inglesi ed italiani su floppy disc = Technical photography dictionary with English and Italian equivalent terms on floppy disk. Triesto: T.E.A. (Triesta Esperanto-Asocio), 1997. 38 p. — 21 cm = A5-broŝ. kun 3,5 cola komputila disketo. Rete konsultebla. ĉ. 700 esperantaj kapvortoj kun PIV-stilaj difinoj. Ĉefaj referenc-verkoj PIV 1970 kaj EB 1988. Spec.:
LUKSO. Unuo de lumiga intenso (PIV, 652)
LUMANCO.** Kvanto da lumenergio eligita aŭ reflektita de objekto.
 Lumbara sako, lumbenka, lumĉelo, lumdiado, lumenlektra ĉelo, lumeno k.t.p.
 Esperanto → angla, itala
- 2008 **vaŝe**, ĵ. [**Vaché**, Jérôme]. Terminareto de kino. Vikilibro 2008 ss. — Nur rete konsultebla. 142 kapvortoj kun difinoj (2011-06) laŭ jena specimeno:
panoramo
 plano dum kiu la filmilo turniĝas horizontale, montrante al sinsekvaj ĉirkaŭdirektoj.
 en: panning
 fr: panoramique horizontal
peplofilmo
 filmo prezentanta aventurojn en la antikva greka-romia medio ("peplo" estas tiuepoka speco de tuniko).
 en: peplum, sword-and-sandal film
 fr: péplum
 it: peplum
 Esperanto → angla, franca, itala

Gastronomio kaj Manĝaĵoj – Gastronomie und Essen – Gastronomy and Food

Vd. ankaŭ / siehe auch / see also „Hejmo kaj Familio“.

- 1911 **Teichfeld**, Ignaco (1874-?) [W]. Bonan apetiton. Warszawa: Ig. Teichfeld, 1911. 4 p. — 174 kapvortoj.
2a eld. 1912. 4 p. — 29x22 cm.
Esperanto → angla, franca, germana, pola, rusa
- 1958 **Urban**, Erhard (1887 [?] -1869) [W]. Gastronomia terminaro kun fakterminaro por kelneroj kaj kuiristoj. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 1958. 127 p. — pr. Zwagers, Rotterdam. 15x11 cm. ĉ. 1.750 terminoj.
— Rec.:
— **2009**: Bernardo [t.e. Bernhard Pabst]. Bonan apetiton, sinjoro Urban! En: Ipernity (2009-03-21). Kun foto de la titolpaĝo kaj specimenaĵoj enskriboj.
Esperanto → angla, ĉeĥa, franca
- 1967 **Smørrebrød Danaj sandviĉoj**. Copenhagen: Plumrose, s.j., 1967. 8 p. — 22x11 cm. 85 terminoj.
- 1991 Esperanta Gvido al Usona Sub-nutraĵo = Esperanto Guide to U.S. Junk Food. Stato 1991-05-04. En: Terminoteko, 1993-05-21, n-ro 2, ankaŭ rete. 98 kapvortoj sen difinoj, aranĝita laŭ la sistemo Pekoteko. Tradukoj precipe en la angla kaj germana lingvoj.
de, eo, en, es, fr
- 1993 **Diestel**, Wolfram (ed.) (1969-) [W]. Kukobakado. Terminoj, receptoj, enigmoj, ludoj, taskoj. Lepsiko: 1993. 34 p. — 21 cm = A5-broŝ. Terminaro, receptoj i.a. Havebla sur 3,5-cola e-kaseto de la epoko. En la reto. Kunlaborintoj: Rau Cornelia, Matsuoka Tsuyoshi, Behr Kornelia, Brischke Lars-Avid, Haase Martin, Michalke Steffen, Rau Uli, Matthias Ulrich, Diestel Ulrike, Diestel Wolfram, Rausch Sigrid, Knopf Brunhilde. 119 kapvortoj.
- 2007 **vaŝe**, ĵ. [t.e. Jérôme Vaché], k.a. Vikilibro: kuirvortaro. 2007- . Esperantaj terminoj kun difinoj kaj tradukoj al franca kaj rusa, okaze ankaŭ al kelkaj aliaj lingvoj. 233 kapvortoj je 2011-06. Spec.:
agariko
lamenfungo blanka, mezgranda, el kiu unu speco estas vendata sub la nomo ĉampinjono.
de: Blätterpilz, Egerling, Champignon
en: mushroom
fr: agaric
hu: csiperke(gomba)
ru: пластинчатый гриб
Esperanto → franca, rusa, okaze pliaj lingvoj, angla, germana, hispana.

Genealogio – Genealogie – Genealogical Research

- 2002 **Wojtakowski**, Edward; **Worsztynowicz**, Grzegorz. Multlingva genealogia vortaro.
url: http://worsten.org/vortaroj/genealogia_vortaro.htm (ne plu atingebla en 2015-03).
Asocio Worsten, 2002-2010. — utf-8, aliaj lingvoj es (6), fr (14) hu (5), it (20), la (7), nl (5). 48 kapvortoj sen dif.
lingvoj: cs, de, en, eo, pl

Geografio kaj Geodezio – Geographie und Geodäsie – Geography, Geodesy

Vd. ankaŭ / siehe auch / see also Toponimio / Toponymie / Toponymy.

- 1904 **Fruictier**, Paul (1879-1947) [W]. Tabelo da vortoj. En: Internacia Scienca Revuo. vol. 1, n-ro 12, p. 353-384. Paris: Hachette, 1904. 32 p. — pr. Paul Brodard, Coulommiers. 25x16 cm. Scienca teknika vortaro. ĉ. 6.000 kapvortoj.
Esperanto → franca, angla, germana
- 1907 **Esperantisto n° 10.072** [pseŭd.]. Provo de Esperanta nomigado de personaj nomoj. Valencia: Pubul y Morales, 1907. 77, [2] p. — pr. Tipografia Moderna, Valencia. 15x10 cm. Vortaro de personaj nomoj.
Latina, greka, hispana → Esperanto
- 1976 **Czatka** Dénes (eld.); **Winkler**; **Haszpra** Ottó (trad.); k. a. Hatnyelvű geodéziai szakszótár - magyar nyelvű értelmezéssel (angol, Esperantó, francia, magyar, német, orosz). Geodezia fakterminaro en ses lingvoj.
1a vol., Budapest : Budapesti Geodéziai és Térképészeti Vállalat, **1976**. 322 p.
2a vol., Budapest : Budapesti Geodéziai és Térképészeti Vállalat, **1978**. 388 p.
3a vol., [?].
4a vol., topografio. Budapest: Budapesti Geodéziai és Térképészeti Vállalat, **1981**. 343 p. —
Angla → Esperanto, franca, hungara, germana, rusa
- 1993 **Grobe**, Edveno (1927-) [W]. Eta Arizona Vortaro, vol. 11, 100 specialaj arizonaj vortoj kun difinoj kaj ekzemplaj frazoj. Tempeo: Arizona Stelo [t.e. la aŭtoro], [1993?] — US-leteroformato. Bestoj, plantoj, manĝaĵoj k.t.p. tipaj de Arizono. 100 kapvortoj kun dif.
lingvoj: eo, en
- 2012 **Hasan**, Hasan Jakub. Fiziko-geografia terminaro. Eldonejo Amadeus 2012. 75 p. — ISBN 978-954-9897-27-2. Esperantaj terminoj, kiujn uzas la fizika geografio kun tradukoj en angla kaj bulgara lingvoj kaj indekso.
Esperanto → angla, bulgara

Geologio kaj Mineralogio – Geologie und Mineralogie – Geology and Mineralogy

- 1965 **Cailleux**, A. k.a. Eléments de géologie en six langues. Paris: SEDES, 1965. 190 p. Germana, rusa, hispana, Esperanto, franca, angla
- 1983 **Dudich**, Endre (1934-) [W]. Geologia leksikoneto. En: Ĉu vi konas la teron?. Budapeŝto: Scienca Eldona Centro de Universala Esperanto-Asocio, 1983, p. 132-140. — 23x16 cm. Foto. 161 kapvortoj kun dif. en Esperanto. Spec.:
paleo- (malnovgreka): maljuna, malnova, olda, aĝa.
paleogeografio: [...]
palinologio (poleno-scienco): scienco pri la poleneroj kaj sporoj de plantoj, ne gravas ĉu nuntempaj aŭ terhistorie maljunaj. Ĝi pristudas la distribuitecon de sporoj kaj poleneroj en la sedimentoj por fari stratigrafiajn kaj paleogeografiajn konkludojn.
patrin-roko, pegmatita, pelagia regiono, periglacia regiono k.t.p.
- 1988 **Høeg**, T[om] A[rbo] (1926-1992) [W]. Mineralnavn kvarts - kvarco - quartz. Oslo: Universitetsbiblioteket i Oslo [UBO], 1988. 264 p. — 25 cm. Foto. Mineralogia terminaro kun kemiaj formuloj.
Norvega → Esperanta → angla
- 1989 **Høeg**, Tom Arbo (1926-1992) [W]. Geologia vortaro. Oslo:

Universitetsbiblioteket i Oslo [UBO], 1989. 117 p. — 24 cm. Serio: UBO Skrifter 18. Foto. Difinvortaro kun tradukoj al la norvega kaj angla kaj dulingva indekso norvega - esperanta..

Esperanto ↔ norvega

- 2006 **Procházka**, Václav; **Kavka**, Josef (1922-) [W]. Geologia vortaro ĉeĥa-Esperanta. Ĉesko-esperantský geologický slovník. 2006. — (Nur) rete konsultebla. 300 kapvortoj. — Spec. (komenco de lit. P):
paleontologicky (doložený) paleontologie (pruvita)

pánev	baseno
pararula	paragnejso
parciální tavení	parta fand(iĝ)o
pelit	pelito
pemza	pumiko
peň	trunko
peridotit	peridotito
permafrost	permafrost

Hejmo kaj Familio – Heim und Familie – Home and Family

Vd. ankaŭ / siehe auch / see also „Sporto kaj Ludoj“.

- 1947 **Verda**, M.; **Verda**, V. [pseŭd. de Myrtle kaj William Green]. Kudra kaj trika terminaro. Rickmansworth: Universala Esperanto-Asocio, 1947. 21 p. 15 ilus. — pr. Sumfield & Day Ltd, Eastbourne. 15x12 cm. Foto. 173 esperantaj kapvortoj kun difinoj.

2a eld.: Oakville, Ont[ario], Esperanto Press [t.e. Rüdiger Eichholz], **1960**. 21, [3] p. — 16x12 cm. Rete konsultebla kiel pdf (ĉ. 3 mb – 2014-01). Spec.:

Pelto : preparita felo, ĝenerale belhara, uzebla por fari aŭ ornami vestojn.

Perkalo : delikata, sed dense teksita katuno, tia kia oni uzas por fari naztukoj.

Pliaj kapvortoj: **Plasto**, **Plumo(j)**, **Pluŝo**, **Punto**, **Reps**o k.t.p.

- 1999 **Lindstedt**, Jouko (red.) (1955-) [W]. Hejma vortaro. Vortareto de hejmaĵoj en Esperanto. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 1999. 63 p. — 21 cm. ISBN 92-9017-065-4. Foto. 530 terminoj kun esperantaj difinoj kaj tradukoj al la sube nomitaj 13 lingvoj. Alfabetoj hebrea, japana kaj rusa transskribita al latina alfabeto. Sen indeksoj de la celloĝoj [!].

2a eld. (repr.) Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, **2000**. 63 p.

Reta versio intertempe forigita kaj kunfandita en ViVo (vd. „Neologismoj, Glosaroj“). — Spec.:

tomat/o La frukto de la herbo *Lycopersicon esculentum*; tiu frukto mem. AN tomato FI tomaatti FR tomate f. GE die Tomate HE [hebrea en latina transskribo] agvanja HI tomate m. HU paradicsom IT pomodoro JA [japana en latina transskribo] tomato NE tomaat v.(m.) PL ? PT tomate RU [rusa en latina transskribo] pomidor SV tomat

Fono:

— **1990**: Roff, Derek. Projekto de malneto de vortaro pri hejmaĵoj. En: Cirkulaĵo por esperantlingvaj paroj kaj familioj n. 11 Jul. 1990, 21 p.

— **1990**: Golden, Bernard. Komentoj kaj konsiloj rilate kompiladon de "Vortaro pri Hejmaĵoj". En: Cirkulaĵo por esperantlingvaj paroj kaj familioj n. 12 Dec. 1990.

Rec.:

— **1999**: En: Esperanto Aktuell 1999:18:8, p. 18.

— **2000**: Van Damme, Guido. Ĉu vi kapablas paroli pri hejmaj aferoj? En: Monato 2000:21:06, p. 31: „iom ne-matura kaj ne tre utila“.

— **2010**: Bernardo. En: Ipernity (2010-01-08): „... Tre dubinda kaj preskaŭ komplete nehelpla verketo.“

— **2010**: Cezaro (t.e. Hans-Georg Kaiser). „Ankaŭ min ĝi ne tre kontentigis, ĝi kuŝas neuzata

en bretaro.“

Esperanto → angla, finna, franca, germana, hebrea, hispana, hungara, itala, japana, nederlanda, portugala, rusa kaj sveda.

2005 **Koutny**, Ilona (1953-) [W]. Angla-Esperanta-Hungara etvortaro pri Homa vivo kaj Loĝado. Poznań: ProDruk, 2005. 156 p. — 17 cm. ISBN 8389887193. Foto. ĉ. 2 × 1200 kapvortoj sen difinoj.

Angla → Esperantoo, hungara.

2007 **Ducloyer**, Jean-Pierre. Mil vortoj en franca hejmo. Esperanta-Franca Vorttrezoro. – Mille mots pour la maison. Lexique Français-Espéranto. Rennes: FEB, 2007. 80 p. — 21 cm = A5-broŝ. ISBN 2952097828. Foto. 1000 kapvortoj. Ŝajne ekzistas ankaŭ trilingva eldono franca, esperanta, ĉina (?). Esperanto ↔ Franca

Heraldiko – Heraldik – Heraldry

Vd. ankaŭ / Siehe auch / See also Genealogio.

1979 **Klement**, Jaroslav (1935-1986 – [W]). Heraldiko, Veksilologio. Terminaro en Esperanto. České Budějovice: Esperanto-Klubo “La Progreso”. 1979. 80, [130] p. — 20x21 cm. ilus. Foto. Laŭtema vortaro.

Esperanto, angla, ĉeĥa → germana, franca, rusa

1996 **Starodubcev**, Nikolaj N. Iljustrirovannyj slovar po geral'dike - 1005 terminov na ruskom, ukrainskom, anglijskom, èsperanto, francuzskom, nemeckom, latinskom jazykach [Heraldika terminaro, 1005 terminoj en la rusa, ukraina, angla, Esperanto, franca, germana kaj latina. Ilustrita vortaro pri heraldiko]. Doneck: „Doneččina“, 1996, 345 p. — 21 cm. bind. ilus. ISBN 5-87420-084-8. Fotoj: titolpaĝo, paĝoduo 94-95). 1.005 terminoj ordigitaj laŭ la rusa alfabeto kaj klarigitaj de bildoj. Kun indeksoj de la ses cellingvoj. — Rec.:

— 2009: Bernardo. Heraldiko – kavaliroj kaj siaj ŝildoj. En: Ipernity (2009-03-29).

Rusa → ukraina, angla, Esperanto, franca, germana, latina

Hidraŭliko – Hydraulik - Hydraulics

1982 **García Blázquez**, F[élix]. Hidraŭlika sanitara terminaro. Caracas: Aŭtoro 1982. 46 p. — 21 cm. de, en, eo, es, fr.

1982 **Rybář**, Jan (1929-2005) [W]. **Eichholz**, Rüdiger, **Manceau**, Jacques, **Werner**, Jan. Terminaro de hidraŭlaj meĥanismoj. Praha: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, 1982. 52 p. — 21 cm = A5-broŝ. tajpita. Sisteme ordigita kun esperantaj terminoj kaj difinoj kaj tradukoj al angla, ĉeĥa, franca, germana kaj rusa. „Registroj“ (indeksoj) de ĉiuj lingvoj. Spec.:

1.1 hidraŭla meĥanismo

Ekipaĵo eluzanta likvoj kaj aliajn substancojn en likva stato por transportado de energio el de movanta al movata elementoj kaj por transportado de informoj.

A: hydraulic power mechanism

Ĉ: hydraulický mechanismus

F: mecanisme hydraulique

G: hydraulischer Mechanismus

R: [rusa termino en cirila skribo]

Spec. el la esperanta indekso (komenco de lit. P):

permeablo, ~ dinamika, ~ interna, ~linearigita, pilotvalvo, premiferenco, premenergio de likvo, k.t.p.

1982 **Rybář**, Jan (1929-2005) [W]. Hidraŭlaj meĥanismoj, terminaro. Hydraulic Power Mechanisms Terminology. Kladno: Terminologia Esperanto-Centro de

UEA, 1982. 65 p. — Serio: TEC 0001 Panglotta 0001. Kun 5,5-cola disketo.
Esperanto → angla

Industrio kaj Metioj – Industrie und Handwerk – Industry, skilled crafts and trades

Abelkulturo – Bienenzucht - Apiculture

1932 **Gerber**, Karlo. Abelkultura terminaro. En: Lingva Kritiko. n-roj 11 kaj 12. Köln: Heroldo de Esperanto, 1932 kaj 1933 — 86 kapvortoj.

Ombrelfabrikado – Schirmherstellung – Umbrella Manufacturing

1920 **Edmonds**, Charles H.; **Long**, Bernard (1879-1959) [W]. Terminoj uzataj en la fabrikado de ombreloj. London: Brita Literatura kaj Debata Societo, [1920?]. 4 p. — 19x13 cm.

Peltoj – Pelze - Furs

1921 **Terminoj uzataj en la komerco pri peltoj**. London: Brita Literatura kaj Debata Societo, [1921]. 4 p. — 19x13 cm. Inkl. de zoologiaj terminoj latinaj.
Angla → Esperanto

1980 **Středa**, Lubomír. Názvosloví kožešnických strojů, zařízení a náradí. Terminaro de pelt-industriaj maŝinoj, ekipaĵoj kaj ilaro. Praha: Vydavatelství úřadu pro normalizaci a měření [UNM], 1980. 51 p. — 21x15 cm. Teknika terminaro pelt-industria surbaze de terminaro de la ĉeĥa normo-instituto, al kiu Esperanto estas aldonita.

Ĉeĥa → slovaka, angla, germana, franca, hispana, Esperanto

1998 **Středa**, Lubomir. Terminaro de feloj. Názvosloví kůží. Terminologija ŝkur. Terminology of skins and hides. Terminologie der Felle. Terminologia de cueros. Dobřichovice: Kava-Pech, 1998. 95 p. — 20 cm. ilustr. ISBN 80-85853-42-6. Terminaro Esperanta-ĉeĥa kun indeksoj angla, germana, hispana, rusa kaj slovaka.

Potfarado – Töpferei - Pottery

2000 Howard Martin, k. a. Multlingva Vortaro pri Potaj Vortoj. 2000-2001. 20 p. — Nur rete konsultebla je <http://www.dinoclay.com/>. 695 kapvortoj sen difinoj. La pdf-a dosiero paraleligas esperantan, anglan kaj francan versiojn laŭ la suba specimeno (esperantaj majuskloj tiel en la originalo):

English	Esperanto	Français
pot	Poto	Pot
vessel	Ujo	Réceptent, vase
rim	Rando	Bord
lip	Lipo	Lèvre
spout	Beko	Bec
handle	Tenilo	Anse
foot	Piedo	Pied
lid	Kovrilo	Couvercle

Lingvoj: da, de, en, eo, es, fr, it, nl, pt, sv.

Sukerfarado – Zuckerherstellung – Sugar Production

- 1997 **Longue Epée**, Claude. Sukerfarado - sukerfariloj - sukerfarejoj: provo de klarigo kaj de faka terminaro. [Wintzenheim]: TAKE, 1997. 51 p. — lingvoj: ar, de, eo, en, fr, ru, zh

Ŝufabrikado – Schuhherstellung – Shoe Manufacturing

- 1962 **Gregor**, D[ouglas] B[artlett]. The Shoeman's Foreign Terms. Leicester: Halford Publishing Co. Ltd, 1962. 104 p. — Teknika terminaro ŝuindustria. Angla → franca, germana, hispana, itala, sveda, nederlanda, Esperanto

Teksado – Weben – Weaving

- 2009 **Li Weicheng**. Elektitaj Tekstilaj Voltoj [tiel, legu: Vortoj] en Esperanto. [2009?]. — Retejo en 2014-01 ne plu atingebla. Laŭserte 370 kapvortoj. Esperanto → ĉina

Vino – Wein - Wine

- 2000 **Wiersch**, Hans (trad.), **Mook**, Fabien van (ed.). Vitokulturo – vinologio. Glosaro de la germana-franca junulara instituto. TAKE, 2000. — Traduko al Esperanto fare de Hans Wiersch. Enretigo fare de Fabien van Mook, helpe de dosiero de André Grossman. Enretigo je 13-2-2000. Lasta modifo je: 2001-05-11. Komentoj estas libere aldoneblaj. 901 kapvortoj, ordigitaj laŭ franca alfabeto. Spec. (komenco de lit. P):

france **paillage**
germane **Strohabdeckung**
esperante **pajla kovrado**
Referkodo: 559.

france **pampre**
germane **Rebstock**
esperante **vitobranĉo; vitujo**
Referkodo: 565.
Franca → germana, Esperanto

Juro – Recht - Law

- 1932 **Liebeck**, Siegfried (1885-?) [W]. Juristisches Wörterbuch Deutsch-Esperanto. Berlin: Verlag Max Haase, 1932. 86, [1] p. — 18x12 cm. Jura vortareto. Germana → Esperanto
- 1946 **Mildwurf**, A[dolf] (1900-?) [W]. Leĝa terminaro. En: Jarlibro 1946. Rickmansworth: Internacia Esperanto-Ligo, 1946. 11 p. — 15x12 cm. 174 esperantaj terminoj kun difinoj. Ankaŭ kiel pdf (890 kb, 2013-11). Spec.:
- Patento** dokumento por ekskluziva rajto ekspluati eltrovon.
Peticio : Petskribo : ekz. petskribo direktata al parlamento aŭ al reĝo, k.c.
Pledo : defendo antaŭ tribunalo.
Prerogativo : ekskluziva privilegio.
Preteksto : ŝajna motivo eldirita por kaŝi la efektivan.
Pretendi : postuli ion, pri kio oni asertas, ke oni havas rajton super ĝi.
Primogenituro : unue-naskiteco ; la privilegio de la unue- naskito ĉe la tronheredo, k.c.
Privilegio : aparta rajto aŭ favoro, koncesiita al iu ekster la komuna rajto.
- 1984 **Dubravszky** Ladislao (t.e. László ĉ. 1905-1999) [W]. Sugestoj por kompletigo de la jura/diplomatia terminaro. Kopenhago: Internacia Esperanto-Asocio de

- Juristoj [IEAJ], 1984. 27 p. — Foto. Kun antaŭparolo de Ivo Lapenna. Kun dif. lingvoj: de, en, eo, fr. Rec.: — **1986**: „Intermonato“ Jan. 1986.
- 1986 **Traxler**, Karel (1914-2012) [W]. Ĉeĥa-Esperanta jura vortaro. Praha: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, 1986. 137 p. — 21 cm. ĉ. 10.000 kapvortoj kaj esprimoj.
Ĉeĥa → Esperanto
?? 1986 Traxler Karel, k. a. Jura vortaro ĉeĥa-esperanta esperanta-ĉeĥa. Právníký slovník: Esperantsko-český česko-esperantský. Prago: Ĉeĥa Esperanto-asocio, 1986. 137 p. ISBN 80-900014-8-3. Libroserio „Vortaroj”, 10 000 kapvortoj.
url: <http://www.literatura.bucek.name/traxler/traxler.html>
Ĉeĥa → Esperanto
- 1986 **Traxler**, Karel (1914-2012) [W]. Esperanta-ĉeĥa jura vortaro. Praha: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, 1986. 164 p. — 21 cm. ĉ. 10.000 kapvortoj kaj esprimoj.
Esperanto → ĉeĥa
- 1989 **Thom**, R. E. C. Jura terminaro. [Glasgow]: Eldonejo Kardo, 1989. 45 p. — A5-broŝ. Foto. Kelkaj malmultaj juraj terminoj, ĉerpitaj el PIV 1970 kaj trad. al la angla.
Esperanto → angla
- 1990 **Høeg**, Tom Arbo (1926-1992) [W]. Juraj vortoj kaj esprimoj. Oslo: Universitetsbiblioteket i Oslo, 1990. 118 p. — 24 cm. ISBN 82-7000-161-9. UBO Skrifter 21 [t.e Publikigaĵoj de la Universitata Biblioteko de Oslo]. Foto. Difinoj, ekzemploj kaj fontindikoj en Esperanto.
- 1994 **Horbaĉuk**, Vasyľ T.; **Poddubnij**, Fjodor I.; **Tuĥvatullina**, Liana I., **Ŝilo**, Gennadij M. Jura vortaro : Esperante-ruse-ukraine-angla : kun kurta Esperanto-gramatiko. Law dictionary : English-Esperanto-Russian-Ukrainian. Juridiĉeskij slovar' : rusko-ĉesperanto-ukraino-anglijs'kij. Jurydyčnyj slovnyk : ukraĭns'ko-esperanto-rosijs'ko-anglijskij. Slavjansk': Akademia Centro de Administro, Entreprenado „Juro Slavjansk”, 1994. 402 p. — 22 cm. bind. Foto. En Esperanto kun indeksoj rusa, ukraina kaj angla. 2.587 terminoj.
Esperanto → rusa, ukraina, angla

Kemio, Elektrokemio, Farmacio kaj Farmakologio – Chemie, Elektrochemie, Pharmazie und Pharmakologie – Chemistry, Electrochemistry, Pharmacy, Pharmacology

- 1911 **Rousseau**, Célestin k.a. Farmacia Vokabulario. En: Poliglota Vade-Mecum de Internacia Farmacio, Extracta ex diversis Pharmacopoeis, cum Vocabulario ex 9 Linguis per Esperanto. Paris: Hachette, 1911, p. 81-160 [de 288 p. entute]. — pr. Imprimerie Levé, Paris. 25x16 cm. 1.120 terminoj farmakologiaj kaj terapeŭtaj, inkl. de laŭalfabeta indekso en ĉiu lingvo, p. 163-227.
Esperanto → angla, franca, germana, hispana, nederlanda, itala, rusa, sveda, latina
- 1913 **Vortaro de Kemio**. En: Esperanta Nomenklaturato de Kemio kaj Vortaro de Kemio. Paris: Internacia Scienca Asocio Esperantista, 1913. [1], 14 p. — 25x18 cm. Kemia terminaro kun 52 kapvortoj.
Esperanto → angla, franca, germana, itala
- 1922 **Rousseau**, Célestin. La Nomenclature Pharmaceutique Internationale. Paris:

- Hachette, 1922. 104 p. —
Latina, Esperanto, franca
- 1924 **Rapport** de la Commission de la Nomenclature Pharmaceutique. Fédération Internationale Pharmaceutique 1924 [?]. 174 p. — Listoj de kemiaĵoj, drogoj kaj medicinaj herboj, uzataj en la farmakopeioj de 16 landoj. Kun normaj latinaj terminoj kaj tradukoj al Esperanto.
Latina → Esperanto
- 1925 **Hayashi H.**; **Tamura K.**; trad. Eskulapida Klubo de la Tokia Imperia Universitato. Farmakologia Praktiko por Studentoj. Tokio: Eskulapida Klubo, [1925?]. 84 p. — 19x13 cm.
Esperanto → japana
- 1927 “Hermesa Rondeto” [pseŭd. de **Masanobu Hadano** k.a.]. Leksikono de ĥemio kaj farmacio. Tokio: Hermesa Rondeto, Farmacia Fako, Tokia Imperia Universitato, 1927 kaj 1929. 3 vol. [10], 195, [4] p. — 23x16 cm. Leksikono de kemiaj kaj farmaciaj terminoj.
Japana → Esperanto
- 1928 **Maeda** Tutomu. Koloidkemia Terminaro Esperanto-Angla, Germana, Franca kaj Reciproka. Tokio: Tutomu Maeda, 1928. — 423 terminoj.
2a eld. 1929. [2], 27, [1] p. — 25x18 cm. Terminoj uzataj en la koloida kemio.
Esperanto → angla, germana, franca.
Angla → Esperanto, germana, franca
- 1930 “Hermesa Rondeto” [pseŭd. de **Masanobu Hadano** k.a.]. Seslingva Vortareto de Medikamentoj laŭ Japana Farmakopeo Esperanta-Latina-Japana-Germana-Angla-Franca. Tokio: Nankodo, 1930. [4], 31, 174, [2] p. — 18x9 cm. Vortaro de medikamentoj kaj medicinaj preparaĵoj kun aparta indekso en ĉiu lingvo.
Esperanto → latina, japana, germana, angla, franca
- 1948 **Dellian**, C. Racia kaj internacia kemia nomenklaturaro. München 1948.
- 1956 **Duncan**, D[onald] R. (1907-1969) [W]. English-Esperanto Chemical Dictionary (Angla-Esperanta Kemia Vortaro). London: British Esperanto Association, Inc., 1956. 56 p. — pr. Letchworth Printers Ltd, Letchworth. 19x13 cm. Enhavas terminojn uzitajn en la kemio teoria, laboratoria kaj industria kaj rilataj fakoj. ĉ. 3.000 kapvortoj.
Angla → Esperanto
- 1958 **Pióro**, Jan. Kemia Vortaro Esperanta-Pola kaj Pola-Esperanta. Poznań: Jan Pióro, 1958. 86 p. — 30x20 cm. Vortaro de internaciaj kemiaj afiksoj kaj elementoj.
Esperanto ↔ pola
- 1958 **Pióro**, Jan. Kemiaj afiksoj internaciaj. 121 afiksoj. Warszawa: Jan Pióro, 1965. 57 p. — 21x15 cm. Listo de internaciaj kemiaj afiksoj kaj elementoj kun mallongigoj.
1a eld.: 1958.
2a eld.: Warszawa: Wydawnictwa Naukowo-Techniczne, 1965. 40 p. — 17x12 cm.
3a eld.: Warszawa: Wydawnictwa Naukowo-Techniczne, 1966. 36 p.
- 1968 **McCarthy**, John [trad.]. Teknikaj terminoj rilate al elektrodeponado Esperanto-angla Angla-Esperanto. En: Glasstone, Samuel; McCarthy, John (trad.). La Fundamentoj de Elektrokemio kaj Elektrodeponado. Monroeville, Penn., Interparl, 1968. p. 105-122. [de 124 p. entute]. — pr. Imprenta Miguez Ltda, Montevideo. 19x13 cm.

- Esperanto ↔ angla
- 1981 **Westermayer**, Manfred. Internacia kemio-vortaro. Esperanta-angla-germana. International chemical dictionary. Internationales Chemie-Wörterbuch. Tübingen: Manfred Westermayer, 1981. [8], 71 p. — 21x16 cm = A5-broŝ. Trilingva glosaro de kemiaj terminoj ordigita laŭ esperanta alfabeto. Ekzistas samspecaj verketoj ordigitaj laŭ la germana kaj angla. 3 400 terminoj.
Esperanto → angla, germana
- 1981 **Westermayer**, Manfred. Internationales Chemie-Wörterbuch. Tübingen: Manfred Westermayer, 1981. [5], [85] p. — 21x16 cm = A5-broŝ. Kemia terminaro. Enhave kaj forme sama kiel la Internacia kemio-vortaro 1981 de la sama aŭtoro, tamen ordigita laŭ la germana. 3.400 terminoj.
2a eld.: 1982. 75 p. — 21x15 cm.
Germana → Esperanto, angla
- 1982 **Westermayer**, Manfred. International chemical dictionary = Internacia kemio-vortaro = Internationales Chemie-Wörterbuch. Tübingen: eldonis la aŭtoro, 1982. 75 p. — ISBN 3-923596-12-X
lingvoj: de, en, eo
- 1986 **Popov**, M.T. Pri karboksilo, karboksaco kaj karboksato. Gundelfingen: 1986. 8 p. — 21 cm.
- 1990 **Portmann**, Doug. Listo de novaj terminoj – precipe kemiaj – uzataj en projekto „ĜOBK“. Raporto de la Redaktoro N-ro 6. En: Eichholz, Rüdiger (red.). Akademias Studoj 1988-1990. Bailieboro (Ontario): esperanto press 1990. p. 276-300. — A5-broŝ. „ĜOBK“ signifas Ĝenerala, Organika kaj Biologia Kemio kaj estis projekto traduki en Esperanton anglalingvan kemian lernolibron. Alfabeto ordigitaj esperantaj terminoj kun difinoj kaj trad. al la angla kaj foje la germana, franca kaj japana. Spec.:
- paration'o** – parathion. Komerca nomo por insekticida substanco.
paskal'o – pascal. Unuo de premo de la internacia SI-sistemo de mezuroj.
patr'in'a nuklid'o – parent nuclide; G. Mutternuklid; F nucléide père. La komplementa termino estas „filina nuklido“, kiun vidu. Westermayer proponis „origina [nuklido]“.
pel'fort'o – driving force; G. Treibkraft; J. suisinryoku.
pel'gas'o - ...
- Esperanto → angla, germana (franca, japana)
- 1993 **Portmann**, Doug; **Rogers**, Donald. Kemia kaj scienc-teknika vortaro. ĉ. 10.000 kapvortoj. Naperville: DP [t.e. Doug Portmann], 1993. 295 p. — 28 cm = US-broŝ. Foto. La plej ampleksa terminaro pri kemio kaj apudaj fakoj el Naperville, Illinois, Usono, en densa malgranda skribo. Trilingva, Esperanto, angla, germana, kun „glosaro“, t.e. nur-Esperanta difin-parto, kaj indeksoj de la angla kaj germana.
Esperanto → angla, germana
- 1997 **Ŝvarc**, Boris Naumoviĉ. Русско-эсперантский химический словарь [Rusa-esperanta kemia vortaro]. Severodvinsk, 1997. 109 p. 3800 kapvortoj. <http://www.eventoj.hu//steb/vortaroj/rusa-esp-kemia-vortaro.zip> (densigita doc-formato).
- 2009 **Pluhař**, Zdeněk (1936-) [W]. Ĥemia vortaro Esperanta-Ĉeĥa kaj Ĉeĥa-Esperanta. Dobřichovice: KAVA-PECH 2009.

Komputiko – Computerwissenschaft – Computer Sciences

- 1972 **Siklaky** István; **Ruisz** Rezső k.a. A vállalatirányítási számítógép-alkalmazás fogalmainak több nyelvű szótára Magyar Nemet Angol Orosz Eszperantó.

- Budapest: Számítástechnikai, Oktató Központ, 1972. 464 p. — 19x12 cm.
Terminaro kaj esprimaro komputosciencaj. Aparta laŭ alfabeto listo en ĉiu lingvo.
Hungara, germana, angla, rusa, Esperanto
- 1983 **Cabák**, F. Komputika vortaro Esperanta-ĉeĥa, ĉeĥa-Esperanta. Praha: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, 1983. 30 p. — 21 cm. mimeo.
Esperanto ↔ ĉeĥa
- 1985 **Bertin**, C[hristian]. (red.) (1949-) [W]. Computer Dictionary English-Esperanto. Cesson-Sévigné: 1985. 106 p. — 21 cm = A5-broŝ. (malneto). ĉ. 3.800 terminoj.
Angla → Esperanto
- 1985 **Kalckhoff**, Gerhard (1907-2003) [W]; **Pick**, Antony C. (1941-) [W]; **Broise**, Auguste (1901-1974) [W]. Komputada baza terminaro. Hamburgo: 1985. 52 p. — 21 cm = A5-broŝ. 369 esperantaj terminoj kaj difinoj kun tradukoj al angla, germana kaj franca kaj indeksoj de la cellingvoj. Spec.:
198 **memorilo** – Parto de komputilo, kiu akceptas, konservas kaj transmetas datenojn. – storage – Speicher (m) – mémoire (f).
Esperanto → angla, germana, franca
- 1987 **[Eichholz, Rüdiger (1922-2000) [W]]**. Labor-dokumento: Komputikaj terminoj registritaj ĝis majo 1987. Bailieboro, Ontario: Esperanto Press 1987. 27 p. — A4. Registraĵo laŭ Per-komputora termino-kolekto (Pekoteko), n-ro 85/002 ĝis 86/184. Kun esperantaj terminoj kaj difinoj, UDK-numeroj kaj tradukoj al angla, franca kaj germana. Esperanta kaj angla indeksoj. Spec. (el la angla indekso):
memory, main ~, nonvolatile ~, permanent ~, primary ~, programmable read-only ~ k.t.p.
Esperanto → angla, franca, germana
- 1989 **Kovács** Magda; **Bujdosó** I[ván] [trad.]. Mikrokomputila kaj mikroelektronika fakvortaro angla-germana-hispana-Esperanto-hungara. Budapest: LSI, 1989. 3 vol. . — 23 cm. Alfabeto listo de unuopaj vortoj aŭ esprimoj. — Foto.
vol. 1, 294 p.
vol. 2, 258 p.
vol. 3, P-Z, 288 p.
- 1990 **Eichholz**, Rüdiger. Esperantaj klavo-nomoj de la Persona Komputoro de IBM. En: En: Eichholz, Rüdiger (red.). Akademiaj Studoj 1988-1990. Bailieboro (Ontario): esperanto press 1990. p. 32-34. — A5-broŝ. Sisteme ordigita laŭ apero sur usona klarvaro. Indikas simbolon, esperantan terminon, anglan terminon. Spec.:
Eskap-klavo - <Esc> - Escape key
po-signo - <@> - At [en 2015 pli kutima „heliko“]
numer-signo - <#> - Number [en 2015 pli kutima „krado“]
Esperanto → angla
- 1990 **Eichholz**, Rüdiger. Esperantaj nomoj de komputoraj karakteroj. En: Eichholz, Rüdiger (red.). Akademiaj Studoj 1988-1990. Bailieboro (Ontario): esperanto press 1990. p. 34-40. — A5-broŝ. Sisteme ordigita laŭ Askio. Indikas simbolon, esperantan terminon kaj okaze anglan terminon. Spec.:
91 [rekta krampo maldekstra [Left Bracket]
92 \ inversa oblikva streko [Backslash]
93] rekta krampo dekstra [Right Bracket]
Esperanto → angla

- 1990 **Spitaels**, Edward. Labor-dokumento: Terminaroj pri elektronikaj muzik-instrumentoj registritaj ĝis Junio 1990. Bailieboro (Ontario): esperanto press 1990. 70, [4] p. — A5-broŝ. laŭ la sistemo *Pekoteko*, vd. la superrigardon supre, kun trad. al angla kaj nederlanda. Kun indeksoj anglaj, esperantaj kaj sistemaj laŭ UDK. Spec. (komenco de la angla indekso, lit. P):
PAD, patch, patch bank, Patch Bay, patch card/cartridge, patch editor program, pattern •
rythme, PCM, percussion instrument, performance controller k.t.p.
Esperanto → angla, nederlanda
- 1995 **Pokrovskij**, Sergio (1949-) [W]. Komputika Leksikono. Jekaterinburg: Sezonoj **1995**. 365 p. — 1960 terminoj esperantaj kun difinoj kaj tradukoj al la angla, krome en la alfabeto ordo estas notitaj 2020 anglaj terminoj kun siaj esperantaj tradukoj, tiel ke la verko estas uzebla kiel dulingva vortaro.
Rev. novaj eld. nur rete konsulteblaj je
<http://www.esperanto.mv.ru/KompLeks/HEJMO.html>

Kongresoj kaj Konferencoj – Kongresse und Konferenzen – Congresses and Conferences

- 1959 **Figliera**, Gian Carlo (1929-) [W]; **Zjawínska**, Z.; **Dobrzyński**, Roman. Seplingva Kongresfaka Terminareto En: **Kongresa Libro**. Varsovio: Loka Kongresa Komitato, 44a Universala Kongreso de Esperanto, 1959. 334, [1] p. — 21x13 cm. Terminaro bezonata ĉe internaciaj kongresoj. 116 kapvortoj.
Esperanto → angla, franca, germana, itala, pola, rusa
- 1959 **Tadolini**, Luigi. Glossario dei Congressi Italiano Esperanto Francese Inglese Tedesco. Roma: Corriere dei Congressi, 1959 [1960]. 16 p. — pr. Nuova Grafica Romana, Roma. 16x11 cm. Terminaro pri internaciaj kongresoj. 200 terminoj.
Itala → Esperanto, franca, angla, germana

Kudrado kaj Trikado

Vd. / S. / See „Domo kaj Hejmo“.

Lignometio – Holzhandwerk - Woodcraft

- 1934 **Plehn**, Hans Joachim (1905-1985) [W]. Sägen-Wörterbuch (Erklärungswörterbuch der Handsägen für Holzbearbeitung) in fünf Sprachen Deutsch-Englisch-Französisch-Italienisch-Esperanto mit deutschen Begriffsbestimmungen. Wien: Verlag Internationaler Holzmarkt, 1934. 32 p. — pr. Ignaz Steinmann, Wien. 21x15 cm. Sisteme aranĝita mansegila terminaro kun difinoj en la germana kaj tradukoj al angla, franca, itala kaj Esperanto. 118 terminoj. Spec. Plia spec.:
Lochsäge, deren Spitze als Bohrer ausgebildet ist: Bohrersäge — [Borilo-segilo]
Gärtner-Steifsäge mit rechteckigem Blatt: Türkische Handsäge — [Ĝardensegilo ortangula]
Germana → angla, franca, itala, Esperanto
- 1943 **Munns**, Donald Walter. List of Woodcraft Terms in Esperanto. ĉ. 70 terminoj. En: The Torch, Woodcraft Folk, 1943-1944.
2a eld.: En: The British Esperantist. vol. XXXV, n-ro 483/484, p. 65. London: British Esperanto Association, Inc., 1945. 22x14 cm. 1 p. Lignometia terminaro. 64 terminoj. Angla → Esperanto

Lingvistiko – Linguistik – Linguistics

- 1964 **Broise**, Auguste (1901-1974) [W]. Vortareto pri ĝenerala lingvistiko - proponaĵo. Vocabulaire français-Espéranto de linguistique générale. s.l.: 1964. 22 folioj. — Ŝajne unikaĵo en IEMW.
- 1982 **Kuznecov**, S. N. Bazaj nocioj kaj terminoj de interlingvistiko = Osnovnye ponjatija i terminy interlingvisiki. Moskvo: Universitato de Popola Amikeco, 1982. 80 p.
- 2003 **Koutny**, Ilona. Angla-Esperanta-Hungara etvortaro pri Lingvo kaj Komunikado (kun ekzercoj). Poznań: ProDruk, 2003, 140 p. — 17 cm. ISBN 8388518712. Foto. Serio: Celtrafo, AEH2. ĉ. 2 × 1200 kapvortoj. Aranĝita laŭ temoj, sen difinoj, kun 250 lingvonomoj.
Angla → Esperanto - Hungara
- 2005 **Wennergren**, Bertilo. Gramatika vortareto. En: Plena Manlibro de Esperanto Gramatiko (PMEG). ĉap. 44. — Rete konsultebla je 2014-02-07. 76 kapvortoj kun difinoj en Esperanto plus sinonimoj. „Tradukas“ inter tradicia gramatika lingvaĵo kaj la aparta lingvaĵo uzat en PMEG. Spec.:
Frazparto, kiu diras, en kiu maniero, en kiu loko, en kiu tempo, per kiu ilo
komplemento k.t.p., okazas la ĉefverbo. Ĉiu frazparto krom ĉefverbo, subjekto, objekto kaj perverba priskribo, estas komplemento. Tradicie nomata “adjekto”.
- 2008 **Koutny**, Ilona; **Brosch**, Cyril; **Jaskot**, Maciej; **Vogt**, Horst. Germana-Esperanta-Pola etvortaro pri Lingvo kaj Komunikado (kun ekzercoj). Poznań: ProDruk, 2008. 144 p. — ISBN 978-83-89887-99-3. Serio: Celtrafo, GEP2. Aranĝita laŭ temoj, sen difinoj, kun 250 lingvonomoj. ĉ. 2 × 1200 kapvortoj.
Germana → Esperanto - Pola
- 1982 **Werner**, Jan. Esperanta terminologio de terminologia fako. Prago: Ĉeĥa Esperanto-asocio, Scienca-teĥnika sekcio, 1982. 14 folioj. Laŭ rekomendo de ISO, Internacia Norma Organizaĵo. lingvoj: cs, eo, en
- 2003 **Haveman**, Roel. Terminareto pri tradukado. 2003-2006. Nur rete konsultebla (2014-01). — 50 kapvortoj en 2003, 110 en 2006 kun dif. en Esperanto kaj tradukoj al la angla. Spec.:
Arkaismo, **arĥaismo** *Archaism*. Eluziĝinta vorto aŭ vortformo. Tradukistoj povas uzi arkaismojn por redoni malnovcan etoson. En Esperanto tio estas malfacila, ĉar Esperanto havas relative malmultajn arkaismojn. Tiucele oni kelkfoje elpensas neologismojn, kiuj rolu kiel kvazaŭarkaismoj.
Esperanto → angla

Literaturo kaj Retoriko – Literatur und Rhetorik – Literature and Rhetoric

- 1950 **Lapenna**, Ivo. [Vortofiguroj, Pensofiguroj]. En: Retoriko.
1a eld. Parizo **1950**.
2a eld. Rotterdam **1958**.
3a kor. eld. Rotterdam **1971**. p. 170-178. — Du subĉapitroj, kiuj per esperantaj difinoj klarigas retorikajn terminojn kiel elipso, hiperbato, konjunkcio, hiperbolo, litoto k.t.p.
- 2006 **Dahlenburg**, Till-Dietrich. „Pli lume la mallumo zumas“. Novjorko: Mondial 2006. — Nova eld. 2013 kun nova titolo, vd. tie. Spec.:
ADINATO*
Maleblo de la diritaĵo; parafrazo de la nocio "neniam". Kp. Ind. I, parafrazo.

Printempo

(Karolo Pic)

Aĝa serur'. Malŝlosu ĝin!

[...]

Aŭskultu! Sonas sunhorloĝ'.

(Pic 1984 : 39)

- 2008 **Rutan, Dave.** Science Fiction Glossary in Esperanto. [Sciencfikcia glosaro en Esperanto] 2008. — 120 uson-anglaj kapvortoj, ĉerpitaj el diversaj sciencfikciaj romanoj, sen difinoj, kun fontoindikoj kaj trad. al Esperanto. Nur rete konsultebla je la url: <http://koplushia.tripod.com/Esperanto/sf-esperanto.html>. Sekurec-kopio 2015. Spec.:

Personal force shield	-	Persona ŝirmilo
Phase shift	-	Fazŝanĝo
Phaser	ST:TOS	Faz-pistolo, fazilo
Photon torpedo	ST:TOS	Fotona torpedo
Psychohistory	Asimov	Psikohistorio
Positronic brain	Asimov	Positrona cerbo

Angla → Esperanto

- 2013 **Dahlenburg, Till-Dietrich.** Figuraj retorikaj en beletro esperanta. Esperantlingva vortaro kun difinoj kaj ilustraĵoj el la internacia literaturo. Novjorko: Mondial 2013. 311 p. — 22 cm. ISBN 9781595692559. Foto. Retorika terminaro kun difinoj en Esperanto kaj ekzemploj el esperantaj tradukoj de la internacia literaturo. Antaŭa, malsamtitola eldono estas Dahlenburg 2006, vd. spec. tie.

Maroveturado – Seefahrt - Seafaring

- 1908 **Rollet de l'Isle, M[aurice]** (1859-1943) [W] k.a. Alfabeto vortaro. En: Provo de marista terminaro. Paris: Hachette, 1908, p. 65-74. vi, [1], 74, [1] p. 23 ilus. — pr. Paul Brodard, Coulommiers. 20x15 cm. Foto.

- 1908 **Rollet de l'Isle, M[aurice]** (1859-1943) [W] k.a. Provo de Marista Terminaro. Paris: Hachette, 1908. vi, 75 p. — 21x15 cm. 23 ilus.

Skanaĵo rete konsultebla (pdf, ĉ. 1 mb).

Esperanto → angla, germana, franca, hispana, itala, nederlanda

- 1949 **Clissold, Peter** [W]. Marista terminaro.

1a parto. En: Jarlibro – Dua Parto. Rickmansworth: Universala Esperanto-Asocio, **1949**. — 15x12 cm. Terminoj sisteme ordigitaj.

2a parto. En: Jarlibro – Dua Parto. Rickmansworth: Universala Esperanto-Asocio, **1950**. 62, [1] p. 8 ilus. — pr. Leicester Co-operative Printing Society Ltd, Leicester. 15x12 cm. 332 terminoj sisteme ordigitaj kun kvinlingva terminaro ordigita laŭ Esperanto. Sen indeksoj de la celloĝoj.

Ambaŭ partoj kune kopiitaj kiel pdf en:

url: www.eventoj.hu/steb.

Spec.:

13. HAVENOJ KAJ ALIREJOJ

Havenojn oni trovas sur marbordo en ŝirmataj golfoj, estuaroj, fjordoj, riveroj. Roko kaj rifoj el sablo (sablaĵoj), ŝlimo, ŝtonetaro kaj malprofundaĵoj ofte malhelpas la eniron.

Flotbarilo dum milito iufoje defendas la enirejon. La **ŝanelo** estas montrita per lumturoj, lumŝipoj, kondukiloj, buoj.

